# La MIRINDA SORĈISTO de OZ



L. FRANK BAUM

# La MIRINDA SORĈISTO de OZ

De L. Frank Baum

Ilustrita de

W. W. Denslow.




1900

## Tradukita de
## DONALD BROADRIBB

Ĉi tiu eldono konsistas el reviziita formo de la traduko kiu unue aperis en 1996. La ilustraĵoj estas nove skanitaj, kaj la plejparto de la desegnaĵoj malantaŭ la teksto estas reproduktita kun surpresita Esperanta teksto. Tamen la aktuala eldono estas provizora, ĉar unu-du malantaŭtek-staj ilustraĵoj estas nekompletaj pro sia kompleksceco. Laŭeble, la enpaĝigado kaj la lokado de la tekstoj kaj entekstaj ilustraĵoj fidele reproduktas tiujn de la originala Anglalingva eldono.

*La Mirinda Sorĉisto de Oz*
De Baum, L. Frank (Lyman Frank), 1856 –1919
Ilustrita de Denslow, W[illiam] W[allace], 1856 –1914
Tradukita el la Angla en Esperanton de Broadribb, Donald (Donald Richard), 1933 –.
Traduko © Donald Broadribb 2001
Unue eldonita en la Angla kiel *The Wonderful Wizard of Oz* de George M. Hill Co, 1900.
Unua Esperanta eldono: *La Mirinda Sorĉisto de Oz*, eld. BOOKLEAF PUBLISHING, Beverley WA 6302, Aŭstralio, 1996.

# ENKONDUKO.

Folkloro, legendoj, mitoj kaj fe-rakontoj estis parto de la infaneco dum la tuta historio, ĉar ĉiu sana infano havas bonkarakteran kaj instinktan amon al rakontoj fantaziaj, mirindaj kaj evidente malrealaj. La flugilhavaj feoj de Grimm kaj Andersen alportis pli da feliĉeco al la koroj de infanoj ol ĉiuj aliaj homkreaĵoj.


Tamen la tradicia fe-rakonto, servinte dum generacioj, nun estas klasifikebla kiel "eksmoda" en la biblioteko por infanoj; ĉar venis la tempo por serio de novaj "mirigaj rakontoj" en kiuj la steriotipaj ĝino, koboldo kaj feo estas eliminitaj, kune kun ĉiuj teruraj kaj sangavidaj eventoj elpensitaj de siaj aŭtoroj por indiki timigan moralon en ĉiu rakonto. La moderna eduko inkluzivas moralecon; tial la moderna infano serĉas nur distriĝon en siaj mirigaj rakontoj kaj volonte malhavas ĉiujn malagrablajn okazaĵojn.

Kun tiu penso en la menso, la rakonto pri "La Mirinda Sorĉisto de Oz" estis verkita nur por plezurigi la infanojn de la nuntempo. Ĝi celas esti modernigita fe-rakonto, en kiu la mirigo kaj ĝojo restas kaj la kordoloroj kaj koŝmaroj mankas.

L. Frank Baum

Chicago, Aprilo 1900




Copyright 1899
By L. Frank Baum
and W. W. Denslow.
All rights reserved

# LISTO DE ĈAPITROJ


ĈAPITRO I. — La ciklono.
ĈAPITRO II. — Konsiliĝo kun la Manĝtuloj.
ĈAPITRO III. — Kiel Doroteo savis la Birdotimigilon.
ĈAPITRO IV. — La vojo tra la arbaro.
ĈAPITRO V. — Ili savas la Stanan Lignohakiston.
ĈAPITRO VI. — La Malkuraĝa Leono.
ĈAPITRO VII. — La vojo al la Granda Oz.
ĈAPITRO VIII. — La mortiga papavokampo.
ĈAPITRO IX. — La Reĝino de la kampomusoj.
ĈAPITRO X. — La Pordogardisto.
ĈAPITRO XI. — La Mirinda Smeralda Urbo de Oz.
ĈAPITRO XII. — Serĉante la Fian Sorĉistinon.
ĈAPITRO XIII. — Kiel la kvar rekuniĝis.
ĈAPITRO XIV. — La Flugantaj Simioj.
ĈAPITRO XV. — Ili malmaskas Ozon la Teruran.
ĈAPITRO XVI. — La magia arto de la Granda Ĉarlatano.
ĈAPITRO XVII. — Kiel la balono lanĉiĝis.
ĈAPITRO XVIII. — For al la sudo.
ĈAPITRO XIX. — Atakataj de la batalantaj arboj.
ĈAPTRO XX. — La delikata Porcelana Lando.
ĈAPITRO XXI. — La Leono fariĝas la Reĝo de la Bestoj.
ĈAPITRO XXII. — La Lando de la Kveluloj.
ĈAPITRO XXIII. — La Bona Sorĉistino plenumas la deziron de Doroteo.
ĈAPITRO XXIV. — Denove hejme.




*Ĉi tiu libro estas dediĉita al mia bona amikino & kamarado.*

*Mia Edzino*

L·F·B·





# Ĉapitro I.

# La ciklono



Doroteo LOĜIS EN LA mezo de la granda kamparo de Kansas, kun Onklo Henriko, kiu estis kultivisto, kaj Onklino Em, kiu estis la edzino de la kultivisto. Ilia domo estis malgranda, ĉar la ligno per kiu ĝi estis konstruita devis esti portita multajn mejlojn per ĉaro. La domo havis kvar murojn, plankon, kaj tegmenton, kiuj kune konsistigis la solan ĉambron; kaj en tiu ĉambro estis rustaspekta kuirforno, ŝranko



por la teleroj, tablo, tri aŭ kvar seĝoj, kaj la litoj. Onklo Henriko kaj Onklino Em havis grandan liton en unu angulo, kaj Doroteo malgrandan liton en alia angulo. Tute ne estis mansardo, nek kelo — kvankam ja estis malgranda truo en la tero, kiun oni nomis ciklonkelo, en kiu la familio povis kaŝi sin kiam iu el la grandaj kirloventegoj blovadis sufiĉe forte por detrui ĉiun konstruaĵon renkontitan. Oni atingis tiun kaŝejon per klapohava luko en la mezo de la planko, de ĝi ŝtupetaro subenkondukis en la malgrandan, senluman truon.

Kiam Doroteo staris en la pordejo kaj ĉirkaŭrigardis, ŝi povis vidi nur la grandan grizan kamparon ĉiuflanke. Neniu arbo kaj neniu domo interrompis la larĝan ebenaĵon de la glata tereno kiu atingis la randojn de la ĉielo en ĉiu direkto. La suno bakis la kultivitan teron por fari el ĝi grizaĵon tra kiu estis fendetoj. Eĉ la herbaro ne verdis, ĉar la suno bruligis la pintojn de la longaj folioj ĝis ili estis egale grizaj kiel ĉio alia videbla. Iam oni farbis la domon, sed la suno vezikigis la farbon kaj la pluvoj forglitigis ĝin, kaj nun la domo estis egale senbrila kaj griza kiel ĉio alia.

Kiam Onklino Em venis loĝi tie ŝi estis juna, bela edzino. La suno kaj la vento ankaŭ ŝin ŝanĝis. Ili forrabis de ŝi la brilon de la okuloj kaj lasis ilin sobre grizaj. Ŝi estis maldika kaj marasma, kaj nun ŝi neniam ridetis. Kiam Doroteo, kiu estis orfino, unue venis al ili, Onklino Em estis tiom alarmita de la ridado de la infano ke ŝi


kriis kaj premis sian manon sur sian koron kiam ajn la gaja voĉo de Doroteo atingis ŝiajn orelojn; kaj ŝi ankoraŭ rigardis la knabineton mirante ke Doroteo povas trovi ion pri kio ridi.

Onklo Henriko neniam ridis. Li laboregis de la mateno ĝis la nokto, kaj ne sciis kio estas ĝojo. Li ankaŭ estis griza, de la longa barbo ĝis la krudaj botoj, kaj li aspektis severa kaj senŝercema, kaj malofte li parolis.

Toto ridigis Doroteon, kaj protektis ŝin kontraŭ griziĝo simila al tiu de ĉio alia. Toto ne estis griza; li estis malgranda nigra hundo, kun lonlongaj silkecaj haroj kaj malgrandaj nigraj okuloj kiuj briletis gajoplene ĉiuflanke de lia komika nazeto. Toto ludis dum la tuta tago, kaj Doroteo ludis kun li, kaj elkore amis lin.

Tamen hodiaŭ ili ne ludis. Onklo Henriko sidis sur la sojlo kaj rigardis maltrankvile la ĉielon, kiu estis eĉ pli griza ol kutime. Doroteo staris en la pordejo kun Toto en la brakoj, kaj ankaŭ rigardis la ĉielon. Onklino Em lavadis la pladojn.

El la malproksima nordo ili aŭdis



malaltatonan muĝadon de la vento, kaj Onklo Henriko kaj Doroteo povis vidi la longan herbaron ondiĝi pro la venanta ŝtormo. Nun el la sudo venis akra fajfado en la aero, kaj dum ili turnis siajn kulojn tiudirekten ili vidis ondetojn ankaŭ en la herbaro tiudirekta.

Subite Onklo Henriko ekstaris.

"Venas ciklono, Em," li vokis al sia edzino. "Mi prizorgos la brutojn." Li kuris al la ŝedoj kie loĝis la bovinoj kaj la ĉevaloj.

Onklino Em ĉesis labori kaj venis al la pordo. Rigardeto sufiĉis por informi ŝin pri la proksima danĝero.

"Ek, Doroteo!" ŝi kriegis; "kuru en la kelon!"

Toto eksaltis de la brakoj de Doroteo kaj kaŝis sin sub la lito, kaj la knabino iris repreni lin. Onklino Em, timoplena, malfermis la lukoklapon en la planko kaj malsuprengrimpis la ŝtupetaron en la malgrandan, senluman truon. Doroteo fine kaptis Toton, kaj eksekvis sian onklinon. Kiam ŝi transpaŝis nur duonon de la ĉambro aŭdiĝis granda kriĉo de la vento, kaj la domo skuiĝis tiom forte ke ŝi ekfalis kaj subite trovis sin sidanta sur la planko.

Io stranga okazis.

La domo ĉirkaŭturniĝis du- aŭ tri-foje kaj malrapide leviĝis en la aeron. Al Doroteo la sento similis supreniron en balono.

La norda kaj la suda ventoj renkontiĝis tie, kie staris la domo, kaj tie estiĝis la preciza centro de la ciklono. En la centro de ciklono la aero kutime estas kvieta, sed la

granda premo de la vento ĉiuflanke de la domo levis ĝin pli kaj pli alten, ĝis ĝi estis ĉe la plejsupro de la ciklono; kaj tie ĝi restis kaj forportiĝis multegajn kilometrojn tiel facile kiel oni portas plumon.

Estis tre senlume, kaj la vento hurlis timige ĉirkaŭe, sed Doroteo trovis sin facile veturanta. Post la unuaj kelkaj ĉirkaŭturniĝoj, kaj unufoja kruta ekkliniĝo de la domo, ŝi sentis kvazaŭluladon tre mildan, kian sentas bebo en lulilo.


Al Toto tio ne plaĉis. Li ĉirkaŭkuris en la ĉambro, jen tien, jen ĉi tien, laŭte bojante; sed Doroteo sidis tute senmove sur la planko kaj atendis por trovi kio okazos.

Unufoje Toto tro proksimiĝis al la malfermita luko, kaj enfalis; kaj unue la knabineto kredis lin perdita. Sed baldaŭ ŝi vidis unu orelon lian etendiĝantan supren tra la truo, ĉar la forta aeropremo tenis lin tiel ke li ne povis fali. Ŝi rampis al la truo, kaptis orelon de Toto, kaj retiris lin en la ĉambron, poste ŝi fermis la lukoklapon por ke neniu plia akcidento okazu.

Forpasis horoj post horoj, kaj iom post iom Doroteo perdis sian timon; sed ŝi estis tre solsenta, kaj la vento kriĉis tiom laŭte ĉirkaŭ ŝi ke ŝi preskaŭ surdiĝis. Unue ŝi demandis al si ĉu ŝi disbatiĝos kiam la domo refalos; sed dum la forpasado de la horoj kaj la manko de katastrofoj, ŝi perdis sian maltrankviliĝon kaj decidis atendi kviete por trovi kio okazos. Fine ŝi rampis trans la skuiĝantan plankon al sia lito, kaj kuŝiĝis sur ĝin;

Toto sekvis kaj kuŝiĝis apud ŝin.

Malgraŭ la skuiĝado de la domo kaj la hurlado de la vento, Doroteo baldaŭ fermis siajn okulojn kaj profunde endormiĝis.





*"Ŝi kaptis orelon de Toto."*

# Ĉapitro II.
# Konsiliĝo kun la Manĝtuloj.





Subita ŜOKO vekis ŝin, tiom subite kaj severe ke se Doroteo ne kuŝus sur la mola lito, ŝi eble estus damaĝita. Eĉ malgraŭ tio la batego senspirigis ŝin kaj instigis ŝin demandi al si pri kio okazis; kaj Toto voĉetis morne. Doroteo sidiĝis kaj rimarkis ke la domo ne plu moviĝas; nek estis mallume, ĉar la hela sunbrilo envenis tra la fenestro kaj inundis la malgrandan ĉambron. Ŝi eksaltis de sia lito kaj kun Toto ĉe ŝiaj kalkanoj ŝi kuris kaj malfermis la pordon.

La knabineto ekkriis mirigate kaj rigardis ĉirkaŭ sin,

ŝiaj okuloj fariĝis pli kaj pli grandaj pro la mirindaj vidaĵoj kiujn ŝi vidas.

La ciklono estis malsupren metinta la domon, tre deliate — nu, delikate por ciklono — en la mezon de mirinde bela lando. Videblis belaj herbaroj ĉiuflanke, kun elegantaj arboj sur kies branĉoj estis riĉaj kaj allogaj fruktoj. Aroj da belegaj floroj estis ĉie videblaj, kaj birdoj kun maloftaj kaj brilantaj plumaroj kantadis kaj flirtadis en la arboj kaj arbustoj. Ne malproksime estis rivereto, rapide fluanta kaj scintilanta inter verdaj bordoj, kaj murmuranta per voĉo tre plaĉa al knabineto kiu tiom longe loĝis sur la seka griza kamparo.

Dum ŝi staris fervore rigardante la strangajn kaj belajn vidaĵojn, ŝi rimarkis veni direkte al ŝi grupon de la plej kuriozaj personoj kiujn iam ŝi vidis. Ili ne estis altaj kiel la plenkreskuloj al kiuj ŝi kutimis; sed ankaŭ ili ne estis malaltaj. Efektive, ili aspektis proksimume tiom altaj kiom Doroteo, kiu estis altekreska por infano de ŝia jaraĝo, kvankam ili estis, laŭaspekte, multe pli aĝaj.
Tri estis viroj kaj unu estis virino, kaj ĉiuj estis kurioze vestitaj. Ili surportis rondajn ĉapelojn kiuj pintiĝis dekon da centimetroj super la kapoj, kun sonoriletoj ĉirkaŭ la randoj, kiuj sonetis dolĉe dum ili moviĝis. La ĉapeloj de la viroj estis bluaj; tiu de la virineto estis blanka, kaj ŝi surportis blankan robon kiu pendis en plisoj de ŝiaj ŝultroj; super ĝi estis ŝutitaj steletoj kiuj brilis kiel diamantoj en la sunlumo. La viroj estis blue vestitaj, samkolore kiel

la ĉapeloj, kaj sur la piedoj estis bone poluritaj botoj kun larĝa blua faldo ĉe la supro. La viroj, pensis Doroteo, estis proksimume samaĝaj kiel Onklo Henriko, ĉar du el ili havis barbojn. Sed la virineto estis sendube multe pli aĝa; ŝian vizaĝon kovris faltoj; ŝiaj kapharoj estis preskaŭ blankaj, kaj ŝi marŝis iom rigide.

Kiam tiuj personoj proksimiĝis al la domo kie Doroteo staris en la pordejo ili haltis kaj flustris inter si kvazaŭ timante pliproksimiĝi. Sed la maljunulineto marŝis al Doroteo, malalten klinis sin, kaj diris per dolĉa voĉo:

"Vi estas bonvena, plej nobla Sorĉistino, al la lando de la Manĝtuloj. Ni dankegas vin ĉar vi mortigis la fian Sorĉistinon de la Oriento kaj vi tiel liberigis nian popolon."

Doroteo aŭskultis tiun parolon miregante. Kial la virineto nomis ŝin sorĉistino, kaj diris ke ŝi mortigis la Fian Sorĉistinon de la Oriento? Doroteo estis senkulpa, neniun damaĝinta knabineto, kiu estis portita de ciklono multajn kilometrojn for de sia hejmo; kaj ŝi neniam mortigis ion ajn dum sia tuta vivo.



Sed la virineto evidente atendis respondon, do Doroteo diris, heziteme,

“Vi estas tre afabla; sed klare okazis ia eraro. Mi nenion mortigis.”

“Nu, via domo mortigis ŝin,” respondis la virineto, ridante, “do estas tutegale. Vidu!” ŝi pludiris, indikante la angulon de la domo. “Jen ŝiaj du piedpintoj, ankoraŭ etenditaj sub ligna bloko.”

Doroteo rigardis, kaj time krietis. Jen ja, sub la angulo de la granda trabo sur kiu kuŝis la domo, estis du etenditaj piedoj, portantaj arĝentajn ŝuojn kun pintoj.

“Ho ve! Ho ve!” kriis Doroteo, kunmetante la manojn konsternite. “La domo falis sur ŝin. Kion ni faru?”

“Nenio farindas,” diris la virineto trankvile.

“Sed kiu ŝi estis?” demandis Doroteo.

“Ŝi estis la Fia Sorĉistino de la Oriento, kiel mi diris, respondis la virineto. “Ŝi sklavigis la Manĝtulojn dum multaj jaroj,ili devis servadi ŝin nokte kaj tage. Nun ili liberiĝis, kaj ili dankas vin pro tiu



komplezo."

"Kiuj estas la Manĝtuloj?" demandis Doroteo.

"Ili estas la homoj kiuj loĝas en ĉi tiu lando de la Oriento, kie la Fia Sorĉistino regis."

"Ĉu vi estas Manĝtulo?" demandis Doroteo.

"Ne, sed mi estas ilia amikino, kvankam mi loĝas en la lando de la Nordo. Kiam ili trovis ke la Sorĉistino de la Oriento estas morta la Manĝtuloj sendis rapidan mesaĝiston al mi, kaj mi tuj venis. Mi estas la Sorĉistino de la Nordo."

"Ho, mirige!" kriis Doroteo. "Ĉu vi estas vera sorĉistino?"

"Jes ja," respondis la virineto. "Sed mi estas bona Sorĉistino, kaj la popolo amas min. Mi ne estas tiom potenca kiom la Fia Sorĉistino kiu regis ĉi tie; se mi kapablus, mi mem liberigus la popolon."

"Sed mi kredis ke ĉiuj sorĉistinoj estas fiaj," diris la knabino, kiun iom timigis renkonti veran sorĉistinon.

"Ho, ne, tio estas grava eraro. Ekzistis nur kvar Sorĉistinoj en la Lando Oz, kaj du el ili, kiuj loĝas en la Nordo kaj la Sudo, estas bonaj Sorĉistinoj. Mi scias tion, ĉar mi mem estas unu el ili, kaj mi ne povas erari. La loĝantinoj en la Oriento kaj la Okcidento ja estis fiaj sorĉistinoj; sed nun vi mortigis unu el ili, do restas nur unu Fia Sorĉistino en la tuta Lando Oz—ŝi loĝas en la Okcidento."

"Sed," diris Doroteo, post momento da pensado,

Onklino Em diris al mi ke la sorĉistinoj ĉiuj jam mortis — antaŭ multege da jaroj."

"Kiu estas Onklino Em?" demandis la maljunulineto.

"Ŝi estas mia onklino kiu loĝas en Kansas, el kie mi venis."

La Sorĉistino de la Nordo ŝajnis pensadi, kun la kapo klinita kaj la okuloj rigardantaj la teron. Post tio ŝi levis la kapon kaj diris,

"Mi ne scias kie estas Kansas, ĉar neniam antaŭe mi aŭdis la nomon de tiu lando. Sed diru al mi, ĉu ĝi estas civilizita lando?"

"Ho, jes," respondis Doroteo.

"Do jen la kialo. Mi kredas ke en la civilizitaj landoj ne plu ekzistas sorĉistinoj, nek sorĉistoj, nek magiistinoj nek magiistoj. Sed, necesas kompreni ke la Lando Oz neniam civiliziĝis, ĉar ni estas apartigitaj for de la resto de la mondo. Tial ni ankoraŭ havas sorĉistinojn kaj sorĉistojn inter ni."

"Kiuj estas la sorĉistoj?" demandis Doroteo.

"Oz mem estas la Granda Sorĉisto," respondis la Sorĉistino, flustrigante sian voĉon. "Li estas pli potenca ol ĉiuj ni aliaj kune. Li loĝas en la Urbo de Smeraldoj."

Doroteo intencis pli demandi, sed ĝuste tiam la Manĝtuloj, kiuj silente apudstaris, ekkriis laŭte kaj indikis la angulon de la domo kie kuŝadis la Fia Sorĉistino.

"Kio okazis?" demandis la maljunulineto; kaj ŝi



rigardis kaj komencis ridi. La piedoj de la morta Sorĉistino estis plene malaperintaj kaj restis nur la arĝentaj ŝuoj.

"Tiom aĝa ŝi estis," klarigis la Sorĉistino de la Nordo, "ke ŝi rapide elsekiĝis en la sunlumo. Ŝi ne plu ekzistas. Sed la arĝentaj ŝuoj estas por vi, kaj vi surportos ilin." Ŝi klinis sin kaj prenis la ŝuojn, kaj elskuinte la polvon ŝi transdonis ilin al Doroteo.

"La Sorĉistino de la Oriento multe fieris pri tiuj arĝentaj ŝuoj," diris Manĝtulo, "kaj ili havas ian sorĉokapablon; sed ni neniam sukcesis informiĝi pri ĝi."

Doroteo portis la ŝuojn en la domon kaj metis ilin sur la tablon. Poste ŝi reelvenis al la Manĝtuloj kaj diris:

"Mi multe volas reiri al miaj onklino kaj onklo?, ĉar mi certas ke ili sentos malesperon pri mi. Ĉu vi povas helpi min trovi la vojon?"

La Manĝtuloj kaj la Sorĉistino unue rigardis unu la alian, kaj poste Doroteon, kaj skuis la kapon nee.

"Ĉe la Oriento, ne malproksime de ĉi tie," diris unu, "estas grandega dezerto, kaj neniu povus transiri ĝin vivante."

"Estas same ĉe la Sudo," diris alia, "ĉar mi mem estis tie kaj vidis ĝin. La Sudo estas la lando de la Kveluloj."

"Oni diris al mi," diris la tria viro, "ke estas same ĉe la Okcidento. Kaj tiu lando, kie la Palpbrumoj loĝas, estas regata de la Fia Sorĉistino de la Okcidento, kiu sklavigus vin se vi irus tien."


"La Nordo estas mia hejmo," diris la maljunulino, "kaj ĉe ĝia rando estas la sama granda dezerto kiu ĉirkaŭas ĉi tiun Landon Oz. Neeviteble, mia karulino, vi devos loĝi ĉe ni."

Doroteo komencis plori pro tio, ĉar ŝi estis solsenta inter tiuj strangaj homoj. Ŝiaj larmoj ŝajne malgajigis la bonkorajn Manĝtulojn, ĉar ili tuj elprenis siajn poŝtukojn kaj ankaŭ komencis plori. Kaj la maljunulineto, nu ŝi deprenis sian ĉapon kaj ekvilibrigis la pinton sur la pinto de sia nazo, dum ŝi kalkulis "Unu, du, tri," solenavoĉe. Tuj la ĉapo fariĝis ardeza tabuleto, sur kiu estis skribite per grandaj, blankaj kalkosignoj:

"DOROTEO IRU AL LA URBO DE SMERALDOJ."

La maljunulineto prenis la ardezan tabuleton de sia nazo, kaj leginte la vortojn sur ĝi, demandis,

"Ĉu vi nomiĝas Doroteo, karulino?"



"Jes," respondis la infano, suprenrigardante kaj sekigante siajn okulojn.

"Do vi devos iri al la Urbo de Smeraldoj. Eble Oz helpos vin."

"Kie estas tiu Urbo?" demandis Doroteo.

"Precize en la centro de la lando, kaj ĝin regas Oz, la Granda Sorĉisto pri kiu mi parolis."

"Ĉu li estas bona homo?" demandis la knabino maltrankvile.

"Li estas bona Sorĉisto. Ĉu li estas homo, mi ne scias, ĉar mi neniam vidis lin."

"Kiel mi iru?" demandis Doroteo.


"Vi devos marŝi. Estas malproksime, kaj necesos iri tra regiono kelkfoje agrabla kaj kelkfoje malluma kaj timiga. Tamen, mi uzos ĉiun magian arton kiun mi konas por protekti vin kontraŭ danĝeroj."

"Ĉu vi bonvolos akompani min?" pledis la knabino, kiu jam komencis rigardi la maljunulineton kiel sian solan amikon.

"Ne, mi ne povos," ŝi respondis, "sed mi donos al vi mian kison, kaj neniu kuraĝos damaĝi personon kisitan de la Sorĉistino de la Nordo."

Ŝi proksimiĝis al Doroteo kaj kisis ŝian frunton delikate. Kie ŝiaj lipoj tuŝis la knabinon ili lasis rondan, brilan marketon, kiel sciiĝis Doroteo nelonge post tiam.

"La vojo al la Urbo de Smeraldoj estas pavimita per flavaj brikoj," diris la Sorĉistino, "do vi ne maltrafos ĝin.



Veninte al Oz, ne timu lin, sed rakontu al li vian historion kaj petu lin helpi vin. Adiaŭ, karulino.”

La tri Manĝtuloj profunde riverencis antaŭ ŝi kaj deziris por ŝi plaĉan veturon, kaj post tio ili formarŝis tra la arboj. La Sorĉistino amike skuetis sian kapon al Doroteo, ĉirkaŭturnis sin trifoje sur sia maldekstra kalkano, kaj tuj malaperis, kio surprizegis malgrandan Toton, kiu bojis je ŝi tre laŭte post ŝia foriro, ĉar li timis eĉ brueti dum ŝi apude staris.

Sed Doroteo, kiu sciis ke ŝi estas sorĉistino, anticipis ke ŝi malaperos precize tiel, kaj tute ne estis surprizita.



*"Mi estas la Sorĉistino de la Nordo."*

# Ĉapitro III
# Kiel Doroteo savis la Birdotimigilon.





Kiam DOROTEO DEnove estis sola ŝi komencis senti malsaton. Do ŝi iris al la ŝranko kaj tranĉis por si iom da pano, sur kiun ŝi ŝmiris buteron. Ŝi donis iom al Toto, kaj preninte sitelon de la breto, ŝi portis ĝin al la rivereto kaj plenigis ĝin per klara, scintilanta akvo. Toto kuris al la arboj kaj komencis boji je la birdoj kiuj sidadis tie. Doroteo iris revenigi lin, kaj vidis tiom allogajn fruktojn sur la branĉoj ke ŝi deprenis kelkajn, ĉar ili estis ĝuste kion ŝi volis por pligrandigi sian matenmanĝon.

Post tio ŝi reiris al la domo, kaj doninte al si kaj al

Toto grandan trinkon de la frideta, klara akvo, ŝi komencis pretigi sin por la veturo al la Urbo de Smeraldoj.

Doroteo posedis nur unu alian robon, sed ĝi estis pura kaj pendadis de hoko apud ŝia lito. Ĝi estis el katuno blank- kaj blu-plejda; kaj kvankam la bluo estis iomete fadinta pro multaj laviĝoj, ĝi ankoraŭ estis bela robo. La knabino zorge lavis sin, vestis sin per la pura katuna robo, kaj ligis sian palruĝan sunkufon al sia kapo. Ŝi prenis malgrandan korbon kaj plenigis ĝin per pano el la ŝranko, kaj metis blankan tukon sur la supron. Post tio ŝi rigardis siajn piedojn kaj rimarkis kiom malnovaj kaj trivitaj estas ŝiaj ŝuoj.

"Certe ili ne taŭgas por multa marŝado, Toto," ŝi diris. Kaj Toto suprenrigardis al ŝia vizaĝo per siaj nigraj okuletoj kaj skuis sian voston por indiki ke li komprenas kion ŝi celas diri.

Tiumomente Doroteo vidis kuŝantajn sur la tablo la arĝentajn ŝuojn kiuj antaŭe apartenis al la Sorĉistino de la Oriento.

"Ĉu eble ilia grando taŭgos por miaj piedoj?" ŝi diris al Toto. "Ili estus tute ĝustaj por longa marŝado, ĉar ili ne triviĝus."

Ŝi deprenis siajn malnovajn ledajn ŝuojn kaj provis la arĝentajn, kiuj estis tute ĝustadimensiaj por ŝiaj piedoj, kvazaŭ farite specife por ili.

Laste, ŝi prenis sian korbon.


"Venu, Toto," ŝi diris. "Ni iros al la Smeralda Urbo

kaj demandos al la Granda Oz kiel ni povos reiri al Kansas."

Ŝi fermis la pordon, ŝlosis ĝin, kaj zorge metis la ŝlosilon en la poŝon de sia robo. Kaj tiel, dum Toto trotadis sobre malantaŭ ŝi, ŝi komencis sian marŝadon.

Pluraj vojoj estis proksimaj, sed ŝi ne bezonis longan tempon por trovi la vojon pavimitan per flavaj brikoj. Post nelonge ŝi marŝadis vigle direkte al la Smeralda Urbo, dum ŝiaj arĝentaj ŝuoj klakadis gaje sur la malmola, flava vojsurfaco. La suno briladis kaj la birdoj dolĉe kantadis, kaj Doroteo tute ne estis tiom malfeliĉa kiom oni supozus pri malgranda knabino kiu estis subite forblovita el sia propra lando kaj surterigita en la mezon de fremda lando.

Ŝin surprizis, dum ŝi marŝadis, vidi kiom bela estas la pejzaĝo ĉirkaŭ ŝi. Bonaspektaj bariloj, pentritaj delikate blukolore, staris laŭlonge de la flankoj de la vojo, kaj preter ili estis abundaj kampoj de greno kaj legomoj. Evidente la Manĝtuloj estis bonaj kultivistoj kaj sukcesis kreskigi abundajn rikoltaĵojn. Kelkfoje ŝi marŝis preter domon, kaj la loĝantoj elvenis por rigardi ŝin kaj klinis sin malalten dum ŝi preteriris; ĉar ĉiuj sciis ke ŝi estas la detruinto de la Fia Sorĉistino kaj liberigis ilin. La domoj de la Manĝtuloj estis kuriozaspektaj loĝejoj, ĉar ĉiu estis ronda, kun



granda kupolforma tegmento. Ĉiuj estis blukoloraj, ĉar en ĉi tiu lando de la Oriento bluo estis la plej amata koloro.

Kiam proksimiĝis la vespero, kaj Doroteo lacis pro sia longa marŝado, kaj komencis demandi al si kie ŝi tradormos la nokton, ŝi atingis domon iom pli grandan ol la aliaj. Sur la verda gazono antaŭ ĝi estis multaj dancantaj viroj kaj virinoj. Kvin violonludantetoj ludadis kiel eble plej laŭte kaj la homoj ridadis kaj kantadis; granda apuda tablo estis plene kovrita per bongustegaj fruktoj kaj nuksoj, tortoj kaj kukoj, kaj multaj aliaj bonaj manĝaĵoj.

Oni afable salutis Doroteon, kaj invitis ŝin manĝi kaj tradormi la nokton tie; ĉar ĉi tiu estis la hejmo de unu el la plej riĉaj Manĝtuloj en la lando, kaj liaj amikoj vizitis lin por festi sian liberiĝon el la sklavigo farita de la Fia Sorĉistino.

Doroteo ĝissate manĝis kaj ŝin servis la riĉa Manĝtulo mem, kiu nomiĝis Boq. Post tio ŝi sidiĝis sur kanapon kaj rigardis dum la homoj dancadis.

Kiam Boq vidis ŝiajn arĝentajn ŝuojn li diris,

"Klare ke vi estas grava sorĉistino."

"Kial?" demandis la knabino.

"Ĉar vi surhavas arĝentajn ŝuojn kaj mortigis la Fian Sorĉistinon. Krome, via robo estas parte blanka, kaj nur magiistinoj kaj sorĉistinoj vestas sin per blankaĵoj."

"Mia robo estas blu- kaj blank-plejda," diris Doroteo, glatigante la ĉifojn en ĝi.

"Vi tre kompleze surportas ĝin," diris Boq. "Bluo estas la koloro de la Manĝtuloj, kaj blanko estas la koloro

de sorĉistinoj; tial ni scias ke vi estas amika sorĉistino."

Doroteo ne sciis respondi, ĉar ĉiuj ŝajne opiniis ŝin sorĉistino, kaj ŝi tute bone sciis ke ŝi estas nur ordinara knabineto kiu tute hazarde estis portita de ciklono al fremda lando.

Kiam ŝi laciĝis pro tiom da rigardo al la dancado, Boq kondukis ŝin en la domon, kie li donis al ŝi ĉambron en kiu estis bela lito. La tukoj estis el blua ŝtofo, kaj Doroteo profunde dormis inter ili ĝis la mateno, dum Toto kuŝadis sur la blua tapiŝo apud ŝi.

Ŝi ĝissate manĝis, kaj rigardis etan Manĝtulan bebon, kiu ludis kun Toto kaj tiris lian voston kaj voĉetis kaj ridis tiel ke multe amuzis Doroteon. Toto estis vera kuriozaĵo laŭ la homoj tie, ĉar ili antaŭe neniam vidis hundon.



"Kiom distanca estas la Smeralda Urbo?" la knabino demandis.

"Mi ne scias," respondis Boq, tre serioze, "ĉar mi neniam iris tien. Estas pli bone ke oni restu distance de Oz, krom se vere necesas. Sed la vojo al la Smeralda Urbo estas longa, kaj vi bezonos multajn tagojn. La lando ĉi tie estas riĉa kaj agrabla, sed vi devos trairi krudajn kaj danĝerajn lokojn antaŭ ol

atingi la finon de via marŝado."

Tio iomete timigis Doroteon, sed ŝi sciis ke nur la Granda Oz povos helpi ŝin reiri al Kansas, do ŝi kuraĝe decidis ne retroiri.

Ŝi adiaŭis siajn amikojn, kaj rekomencis marŝadi laŭ la vojo el flavaj brikoj. Post kiam ŝi iris plurajn kilometrojn ŝi decidis halti por ripozi, do ŝi grimpis ĝis la supro de la barilo apud la vojo kaj sidiĝis. Granda maizkampo estis aliflanke de la barilo, kaj ŝi vidis ke ne tre distanca estas Birdotimigilo, metita alte sur stangon por forpeli la birdojn de la matura maizo.

Doroteo apogis sian mentonon per mano kaj penseme rigardis la Birdotimigilon. Ĝia kapo estis malgranda sako plenigita per pajlo; surpentritaj sur ĝi estis okuloj, nazo, kaj buŝo, por simili vizaĝon. Malnova, pinta blua ĉapelo, kiu antaŭe apartenis al iu Manĝtulo, estis metita sur lian kapon, kaj la cetero de la figuro estis blua vestokompleto, multe uzita kaj paliĝinta, kiu ankaŭ estis plenigita per pajlo. Sur la piedoj estis paro da malnovaj botoj kun bluaj supraĵoj, kiajn portas ĉiu viro en tiu lando, kaj la figuro estis altigita super la maiztigojn per stango kiu estis puŝita en lian kolon.

Dum Doroteo rigardis atentoplene la kuriozan, pentritan vizaĝon de la Birdotimigilo, ŝin surprizis vidi ke unu el la okuloj malrapide palpebrumas al ŝi. Unue ŝi supozis ke sendube ŝi eraris, ĉar neniam iu el la Birdotimigiloj en Kansas palpebrumas; sed baldaŭ la figuro

amikeme skuetis sian kapon al ŝi. Tiam ŝi malsupren grimpis de la barilo kaj marŝis al la Birdotimigilo, dum Toto ĉirkaŭkuradis la stangon bojante.

"Bonan tagon," diris la Birdotimigilo, per iom raŭka voĉo.

"Ĉu vi parolis?" demandis la knabino, mirante.

"Certe," respondis la Birdotimigilo; "kiel vi fartas?"

"Sufiĉe bone, dankon," respondis Doroteo, ĝentile. "Kiel vi fartas?"

"Mi ne fartas bone," diris la Birdotimigilo ridetante, "ĉar estas tre tede stari ĉi tie nokte kaj tage por fortimigi korvojn."

"Ĉu vi ne povas malsupreniri?" demandis Doroteo.

"Ne, ĉar ĉi tiu stango estas puŝita en mian dorson. Se vi bonvolos forpreni la stangon, mi estos multe dankema al vi."

Doroteo etendis ambaŭ brakojn kaj delevis la figuron de la stango; ĉar, estante plenigita per pajlo, ĝi estis malmultepeza.

"Tre grandan dankon," diris la Birdotimigilo, kiam li estis metita sur la teron. "Mi sentas min kvazaŭ vere novan."

Doroteon perpleksigis aŭdi tion, ĉar ŝajnis al ŝi strange aŭdi viron plenigitan per pajlo paroli, kaj vidi lin riverenci kaj marŝadi apud ŝi.

"Kiu vi estas?" demandis la Birdotimigilo, kiam li estis sin streĉinte kaj oscedinte. "Kaj kien vi iras?"

"Mi nomiĝas Doroteo," diris la knabino, "kaj mi iras al la Smeralda Urbo, por peti la Grandan Ozon resendi min min al Kansas."

"Kie estas la Smeralda Urbo?" li demandis; "kaj kiu estas Oz?"

"Ĉu vi ne scias?" ŝi respondis, surprizite.

"Tute ne. Mi nenion scias. Komprenu, mi estas plenigita per pajlo, do al mi tute mankas cerbo," li respondis malĝoje.

"Ho," diris Doroteo, "min multe bedaŭrigas tio."

"Ĉu vi kredas," li demandis, "Ke se mi iros al la Smeralda Urbo kun vi, la granda Oz donos al mi iom da cerbaĵo?"

"Mi ne scias," ŝi respondis, "sed vi rajtos akompani min, se vi deziras. Se Oz ne donos al vi cerbaĵojn, vi ne estos pli malbonfortuna ol vi estas nun."

"Estas vere," diris la Birdotimigilo. "Komprenu," li





pludiris, iom sekreteme, "ne ĝenas min ke miaj kruroj kaj brakoj kaj korpo estas plenigitaj per pajlo, ĉar mi ne povas esti vundita. Se iu paŝas sur miajn piedfingrojn aŭ puŝas pinglon en mi, ne gravas, ĉar mi ne povas sentas ĝin. Sed mi ne volas ke oni nomu min stulta, kaj se mia kapo restos plena de pajlo anstataŭ de cerbo, kian havas vi, kiel mi iom povos scii ion ajn?"

"Mi komprenas vian senton," diris la knabineto, kiu vere kunsentis kun li. "Se vi venos kun mi, mi petos al Oz ke li faru ĉion eblan por vi."

"Dankon," li respondis dankeme.

Ili reiris al la vojo, Doroteo helpis lin transgrimpi la barilon, kaj ili komencis marŝadi laŭ la vojo el flavaj brikoj cele la Smeraldan Urbon.

Al Toto ne plaĉis la nova akompananto, unue. Li flaradis ĉirkaŭ la pajloplenigito kvazaŭ suspektante ke eble estas nesto de ratoj en la pajlo, kaj li ofte bojetis malamikeme kontraŭ la Birdotimigilon.

"Ne vin ĝenu Toto," diris Doroteo, al sia nova amiko; "li neniam mordas."

"Ho, li ne timigas min," respondis la Birdotimigilo. "Li ne povos damaĝi la pajlon. Permesu ke mi portu tiun korbon por vi. Ne ĝenos min, ĉar mi ne povas laciĝi. Mi diros al vi sekreton," li pludiris, dum li kunmarŝadis. "Nur unu aferon en la tuta mondo mi timas."

"Kion?" demandis Doroteo; "ĉu la Manĝtulan kultiviston kiu faris vin?"

“Ne,” respondis la Birdotimigilo; “flamanta alumeto.”




*"Evidente vi estas grava Sorĉistino."*



*Doroteo rigardis atentoplene la Birdotimigilon.*

# Ĉapitro IV.
## La Vojo tra la Arbaro.





Post KELKAJ HOROJ la vojo komencis krudiĝi, kaj la marŝado fariĝis tiom malfacila ke la Birdotimigilo ofte stumblis pro la flavaj brikoj, kiuj tie estis tre malglataj. Efektive, kelkfoje ili estis rompitaj aŭ tute mankis, tiel ke restis nur truoj kiujn Toto transsaltis kaj Doroteo ĉirkaŭmarŝis. Sed la Birdotimigilo, pro manko de cerbo, antaŭenmarŝis senpaŭze, kaj tial paŝis en la truojn kaj sterniĝis sur la malmolajn brikojn. Tamen tio neniam vundis lin, kaj Doroteo relevis lin kaj restarigis lin sur la piedoj, dum li gaje ridis kun ŝi pro la akcidento.



La kultivitaj kampoj tute ne estis tiel bone prizorgataj ĉi tie kiel en la antaŭaj lokoj. Troviĝis malpli da domoj kaj malpli da fruktarboj, kaj ju pli ili marŝis, des pli senbela kaj solsentiga fariĝis la tereno.

Je la tagmezo ili sidiĝis apud la vojo, proksime al rivereto, kaj Doroteo malfermis sian korbon kaj elprenis panon. Ŝi proponis pecon al la Birdotimigilo, sed li rifuzis.

"Mi neniam malsatas," li diris, "kaj estas oportune ke estas tiel, ĉar mia buŝo estas nur pentrita, kaj se mi tondus truon en ĝi por ke mi povu manĝi, la pajlo kiu plenigas min elfalus, kaj tio ruinigus la formon de mia kapo."

Doroteo tuj vidis ke tio estas vera, do ŝi nur kapjesis kaj plu manĝis sian panon.

"Rakontu al mi iom pri vi mem, kaj pri la lando el kiu vi venis," diris la Birdotimigilo, kiam ŝi estis fininta sian manĝon. Do ŝi parolis al li pri Kansas, kaj la kiom griza estas ĉio tie, kaj kiel la ciklono portis ŝin al ĉi tiu kurioza Lando Oz. La Birdotimigilo atente aŭskultis, kaj diris,

"Mi ne komprenas kial vi volas foriri el ĉiu tiu bela lando kaj reiri al la seka, griza loko kiun vi nomas Kansas."

"Vi ne komprenas ĉar vi ne havas cerbon," respondis la knabino. "Ne grave kiom mizeraj kaj grizaj estas niaj hejmoj, ni karno- kaj sango-homoj preferas loĝi tie ol

en iu alia lando, negrave kiom bela. Nenio egale bonas kiel la hejmo."

La Birdotimigilo ĝemis.

"Kompreneble mi ne povas kompreni," li diris. "Se viaj kapoj estus plenaj de pajlo, kiel la mia, verŝajne vi ĉiuj loĝus en la belaj lokoj, kaj sekve tute mankus homoj en Kansas. Estas bonsorte por Kansas ke vi havas cerbon."

"Bonvolu rakonti al mi, dum ni ripozas," petis la infano.

La Birdotimigilo rigardis ŝin riproĉe, kaj respondis,

"Mia vivo ĝis nun estis tiom mallonga ke efektive mi scias tute nenion. Mi fariĝis nur antaŭhieraŭ. Mi tute ne scias kio okazis en la mondo antaŭ tiam. Bonfortune, kiam la kultivisto faris mian kapon, li unue pentris miajn orelojn, tiel ke mi aŭdis kio okazas. Apudestis alia Manĝtulo, kaj kion mi unue aŭdis estis la parolo de la kultivisto,

"'Ĉu plaĉas al vi la oreloj?'

"'Ili estas nerektaj,' respondis la aliulo.

"'Ne gravas,' diris la kultivisto; 'ili tamen estas oreloj,' kio ja estis vera.

"'Nun mi faros la okulojn,' diris la kultivisto. Do li pentris mian dekstran okulon, kaj tuj kiam ĝi estis finita mi trovis ke mi rigardas lin, kaj ĉion ĉirkaŭ mi, tre interesate, ĉar tiu estis la unua fojo kiam mi ekvidis la mondon.


"'Jen iom bela okulo,' komentis la Manĝtulo kiu estis rigardanta la kultiviston; 'blua farbo bone taŭgas por okuloj.'

"'Mi pentros la alian pli granda,' diris la kultivisto. Kaj kiam la dua okulo estis finita mi povis multe pli bone vidi ol antaŭe. Post tio li faris miajn nazon kaj buŝon. Sed mi ne parolis, ĉar tiutempe mi ne sciis por kio buŝo utilas. Min amuzis rigardi dum ili pretigis mian korpon kaj miajn brakojn kaj krurojn; kaj kiam ili fine surfiksis mian kapon, mi estis tre fiera, ĉar mi opiniis ke mi estas egale bona kiel ĉiu alia persono.

"'Ĉi tiu ulo rapide timigos la korvojn,' diris la kultivisto. 'Li aspektas vera homo.'

"'Nu, li ja estas homo,' diris la aliulo, kaj mi plene konsentis kun li. La kultivisto portis min sub sia brako al la maizkampo, kaj metis min sur altan stangon, kie vi trovis min. Li kaj lia amiko baldaŭ foriris kaj lasis min sola.

"Al mi ne plaĉis esti tiel forlasita; do mi strebis sekvi ilin, sed miaj piedoj ne povis tuŝi la teron, kaj mi devis resti sur tiu stango. Mia vivo estis tre solsenta, ĉar mi konis nenion pripenseblan, mi ja antaŭ nur kelkaj momentoj konstruiĝis. Multaj korvoj kaj aliaj birdoj flugis en la maizkampon, sed tuj kiam ili ekvidis min ili forflugis, kredante min Manĝtulo; kaj tio plaĉis al mi kaj kredigis min ke mi estas tre grava persono. Post iom da tempo maljuna korvo flugis apud min, kaj zorge rigard-



inte min li sidigis sin sur mian ŝultron kaj diris,

"'Ĉu tiu kultivisto kredis povi trompi min tiel mallerte? Ĉiu inteligenta korvo vidus ke vi estas nur plenigita per pajlo.' Post tio li saltis sur la teron kaj manĝis maizon laŭvole. La aliaj birdoj, vidinte ke li ne estis damaĝita de mi, venis por ankaŭ manĝi la maizon, do post nelonge ili estis amase ĉirkaŭ mi.

"Min malĝojigis tio, ĉar ĝi pruvis ke mi efektive ne estas efika Birdotimigilo; sed la maljuna korvo konsolis min, dirante: 'Se vi nur havus cerbon en la kapo vi estus egale bona homo kiel ĉiu el ili, kaj pli bona homo ol kelkaj el ili. Nur cerbohavo valoras en ĉi tiu mondo, negrave ĉu oni estas korvo ĉu homo.'

"Post la foriro de la korvoj mi pripensis tion, kaj decidis ke mi strebos akiri cerbon. Bonsorte, vi alvenis kaj detiris min de la stango, kaj laŭ via parolo mi certas ke la Potenca Oz donos al mi cerbon tuj kiam ni atingos la Smeraldan Urbon."

"Tion mi esperas," diris Doroteo fervore, "ĉar ŝajne vi volegas posedi tion."

"Jes, mi volegas," respondis la Birdotimigilo. "Estas tre malkomfortige scii ke oni estas stultulo."

"Nu," diris la knabino, "ni ekiru." Kaj ŝi transdonis la korbon al la Birdotimigilo.

Tute ne estis bariloj ĉe la vojoflankoj nun, kaj la tero estis kruda kaj nekultivita. Kiam komencis vesperiĝi ili venis al granda arbaro, kie la arboj estis kreskintaj tiel altaj kaj proksimaj unu al la alia ke iliaj branĉoj renkontiĝis super la vojo el flavaj brikoj. Estis preskaŭ senlume sub la arboj, ĉar la branĉoj fortenis la taglumon; sed la marŝantoj ne haltis, kaj pluiris en la arbaron.

"Se ĉi tiu vojo eniras, ĝi nepre eliros," diris la Birdotimigilo, "kaj ĉar la Smeralda Urbo estas ĉe la alia finaĵo de la vojo, ni devas sekvi kien ajn ĝi kondukas."

"Ĉiu scias tion," diris Doroteo.

"Certe; tial mi scias," respondis la Birdotimigilo. "Se necesus havi cerbon por scii ĝin, mi ja ne dirus ĝin."

Post eble horo la lumo malaperis, kaj ili trovis sin stumblantaj en la mallumo. Doroteo tute ne povis vidi, sed Toto vidis, ĉar kelkaj hundoj tre bone vidas en la mallumo; kaj la Birdotimigilo deklaris sin egale kapabla vidi kiel dum la tago. Do ŝi prenis lian brakon, kaj sukcesis marŝadi sufiĉe bone.

"Se vi vidos domon, aŭ iun ajn lokon kie ni povos tradormi la noktON," ŝi diris, "nepre informu min; ĉar estas tre malkomforte marŝadi en la mallumo."

Baldaŭ la Birdotimigilo haltis.

"Mi vidas dometon dekstre de ni," li diris, "konstruitan el ŝtipoj kaj branĉoj. Ĉu ni iru tien?"

"Jes, ja;" respondis la infano. "Mi plene laciĝis."

Do la Birdotimigilo gvidis ŝin inter la arboj ĝis ili aringis la dometon, kaj Doroteo eniris kaj trovis liton de sekaj folioj en unu angulo. Ŝi tuj kuŝiĝis, kaj kun Toto apud ŝi ŝi baldaŭ profunde endormiĝis. La Birdotimigilo, kiu neniam laciĝis, staris en alia angulo kaj pacience atendis la mateniĝon.






*"'Mi fariĝis nur hieraŭ,' diris la Birdotimigilo.*



# Ĉapitro V.
# Ili savas la Stanan Lignohakiston





Kiam DOROTEO vekiĝis, la suno jam briladis tra la arboj kaj Toto estis jam delonge ekster la domo ĉasante birdojn kaj sciurojn. Ŝi sidiĝis kaj ĉirkaŭrigardis. Jen la Birdotimigilo, ankoraŭ staranta pacence en sia angulo, atendande ŝin.

“Ni nepre devas serĉi akvon,” ŝi diris al li.

“Por kio vi volas akvon?” li demandis.

“Por purigi mian vizaĝon post la polvo de la vojo, kaj por trinki, tiel ke la seka pano ne gluiĝos al mia gorĝo.”

“Certe estas ĝene konsisti el karno,” diris la Birdotimigilo, penseme, “ĉar vi devas dormi, kaj manĝi kaj trinki.

Tamen, vi havas cerbon, kaj la kapablo pensadi valoras multajn ĝenojn."

Ili eliris el la dometo kaj promenis inter la arboj ĝis ili trovis malgrandan fonton de klara akvo, kie Doroteo trinkis kaj banis sin kaj matenmanĝis. Ŝi vidis ke ne restas multa pano en la korbo, kaj la knabino estis dankema ke la Birdotimigilo ne bezonas manĝi, ĉar apenaŭ estis sufiĉe por ŝi kaj por Toto por tiu tago.

Kiam ŝi estis fininta sian manĝon, kaj estis preta reiri al la vojo el flavaj brikoj, ŝin alarmetis proksima sono de profunda ĝemo.

"Kio sonis?" ŝi demandis, time.

"Mi tute ne povas konjekti," respondis la Birdotimigilo; "sed ni povas aliri kaj vidi."

Ĝuste tiam la sono de nova ĝemo atingis iliajn orelojn, kaj la sono ŝajne venis el malantaŭ ili. Ili turnis sin kaj marŝis kelkajn paŝojn tra la arbaro, kaj tiam Doroteo ekvidis ion brilantan en sunradio kiu falis inter la arbojn. Ŝi kuris al tiu loko, kaj poste ŝi ekhaltis, kun krio pro surpriziĝo.

Unu el la grandaj arboj estis parte trahakita, kaj staranta apud ĝi, tenante hakilon levitan en liaj manoj, estis viro konsistanta plene el stano. Liaj kapo kaj brakoj kaj kruroj estis artikigitaj al lia korpo, sed li staris tute senmove, kvazaŭ tute ne kapabla sin movi.

Doroteo rigardis lin mirege, ankaŭ la Birdotimigilo, dum Toto akre bojadis kaj provis mordi la stanajn kru-

rojn, kio dolorigis liajn dentojn.

"Ĉu vi ĝemis?" demandis Doroteo.

"Jes," respondis la stanulo, "jes. Mi ĝemadas jam de pli ol jaro, kaj antaŭ nun neniu aŭdis min nek venis por helpi min."

"Kiel mi povos helpi vin?" ŝi demandis dolĉe, ĉar ŝin malgajigis la malfeliĉa voĉo de la viro.

"Alportu oleujon kaj oleu miajn artikojn," li respondis. "Ili rustiĝis tiom ke mi tute ne povas movi ilin; se mi estos bone oleita, mi estos denove bonfarta. Vi trovos oleujon sur breto en mia dometo."

Doroteo tuj rekuris al la dometo kaj trovis la oleujon, kaj poste ŝi reiris al la Stana Lignohakisto kaj demandis, maltrankvile, "Kie estas viaj artikoj?"

"Unue, oleu mian kolon," respondis la Stana Lignohakisto. Do ŝi oleis ĝin, kaj ĉar ĝi estis tre rusta la Birdotimigilo prenis la stanan kapon kaj movis ĝin delikate de flanko al flanko ĝis ĝi moviĝis libere, kaj tiam la viro povis mem



turni ĝin.

"Nun oleu la artikojn de miaj brakoj," li diris. Kaj Doroteo oleis ilin kaj la Birdotimigilo zorge fleksis ilin ĝis ili estis tute liberaj de rusto kaj bonaj kiel novaj.

La Stana Lignohakisto kontente ĝemetis kaj mallevis sian hakilon, kiun li apogis per arbo.

"Tio multe komfortigas," li diris. "Mi tenadis tiun hakilon en la aero ekde kiam mi rustiĝis, kaj kontentigas min formeti ĝin finfine. Nun, se vi bonvolos olei la artikojn de miaj kruroj, mi denove estos normala."

Do ili oleis liajn krurojn ĝis li povis libere movi ilin; kaj li multfoje dankis ilin pro sia liberiĝo, ĉar li ŝajnis tre ĝentila, kaj tre dankema.

"Mi eble starus tie por ĉiam se vi ne estus alveninta," li diris; "do certe vi savis mian vivon. Kial vi hazarde venis ĉi tien?"

"Ni estas survoje al la Smeralda Urbo, por renkonti la Grandan Ozon," ŝi respondis, "kaj ni haltis ĉe via dometo por tie tradormi la nokton."

"Kial vi volas renkonti Ozon?" li demandis.

"Mi volas ke li resendu min al Kansas, kaj la Birdotimigilo volas ke li metu iom da cerbo en lian kapon," ŝi respondis.

La Stana Lignohakisto ŝajnis profunde pensadi dum momento. Post tio li diris:

"Ĉu vi supozas ke Oz povus doni al mi koron?"

"Nu, mi supozas ke jes," Doroteo respondis. "Estus

egale facile kiel doni al la Birdotimigilo cerbon."

"Vere," la Stana Lignokahisto respondis, "Do, se vi permesos ke mi akompanu vin, ankaŭ mi iros al la Smeralda Urbo por peti ke Oz helpu min."

"Kunvenu," diris la Birdotimigilo elkore, kaj Doroteo ankaŭ diris ke ŝi volonte akceptos lin kiel akompananton. Do la Stana Lignohakisto surŝultrigis sian hakilon kaj ĉiuj marŝis tra la arbaro ĝis ili atingis la vojon pavimitan per flavaj brikoj.

La Stana Lignohakisto jam petis ke Doroteo metu la oleujon en sian korbon. "Ĉar," li diris, "se pluvos sur min kaj mi denove rustos, mi bezonegos la oleujon."

Estis bonsorte ke la nova kamarado fariĝis parto de la grupo, ĉar baldaŭ post la rekomenco de marŝado ili atingis lokon kie la arboj kaj branĉoj tiom densis super la vojo ke ili ne povis tramarŝi. Sed la Stana Lignohakisto eklaboris per sia hakilo kaj hakis tiom bone ke baldaŭ li faris trairejon por la tuta grupo.

Doroteo pensadis tiom profunde dum ili marŝis ke ŝi ne rimarkis kiam la Birdotimigilo stumblis en truon kaj ruliĝis al la flanko de la vojo. Efektive li devis voki ŝin por ke ŝi helpu lin restariĝi.

"Kial vi ne ĉirkaŭmarŝis la truon?" demandis la Stana Lignohakisto.

"Mi ne scias tion fari," respondis la Birdotimigilo gaje. "Mia kapo pleniĝis per pajlo, komprenu, kaj tial mi iras al Oz por peti de li cerbon."

"Mi komprenas," diris la Stana Lignohakisto. "Sed, malgraŭe, cerbo ne estas la plej bona afero en la mondo."

"Ĉu vi havas cerbon?" demandis la Birdotimigilo.

"Ne, mia kapo estas tute malplena," respondis la Hakisto. "Sed iam mi havis cerbon, kaj ankaŭ koron; do, provinte ambaŭ, mi multe preferus havi koron."

"Kial?" demandis la Birdotimigilo.

"Mi rakontos al vi mian historion, kaj tiel vi scios."

Do, dum ili marŝadis tra la arbaro, la Stana Lignohakisto rakontis tion:

"Mi naskiĝis filo de hakisto kiu hakadis la arbojn en la arbaro kaj vendis la lignon por gajni sian vivmonon. Kiam mi plenkreskis ankaŭ mi fariĝis lignohakisto, kaj post la morto de mia patro mi prizorgis mian maljunan patrinon dum ŝia cetera vivo. Post tio mi decidis ke anstataŭ loĝi sola mi edziĝos, por ke min ne plenigu sento de soleco.

"Unu Manĝtula knabino estis tiom bela ke mi baldaŭ plenkore amis ŝin. Ŝi, siaflanke, promesis edziniĝi kun mi tuj kiam mi gajnos sufiĉan monon por konstrui pli bonan domon por ŝi; do mi eklaboradis pli forvore ol ĉiam. Sed la knabino loĝis kun maljunulino kiu ne volis ke ŝi edziniĝu kun iu ajn, ĉar ŝi estis tiom mallaborema ke ŝi



knabino restu kun ŝi kaj kuiradu kaj mastrumadu. Do la maljunulino iris al la Fia Sorĉistino de la Oriento, kaj promesis al ŝi du ŝafojn kaj bovinon se ŝi malebligos la geedziĝon. bovinon se ŝi malebligos la geedziĝon. Sekve la Fia Sorĉistino sorĉis mian hakilon, kaj unu tagon dum mi hakadis laŭeble plej forte, ĉar mi fervoris akiri la novan domon kaj mian edzinon kiel eble plej baldaŭ, la hakilo ekglitis kaj detranĉis mian maldekstran kruron.

"Unuavide tio ŝajnis granda misfortuno, ĉar mi sciis ke unukrurulo ne multe sukcesus kiel lignohakisto. Do mi iris al stanisto kaj mendis de li novan kruron el stano. La kruro funkciis tre bone, kiam mi kutimiĝis al ĝi; sed mia ago kolerigis la Fian Sorĉistinon de la Oriento, ĉar ŝi promesis al la maljunulino ke mi ne edziĝos kun la bela Manĝtula knabino. Kiam mi rekomencis hakadi, mia hakilo ekglitis kaj detranĉis mian dekstran kruron. Denove mi iris al la stanisto, kaj li denove faris por mi kruron el stano. Post tio la sorĉita hakilo detranĉis miajn brakojn, unu post la alia; sed, ne malkuraĝigite, mi anstataŭigis ilin per stanaj. Post tio la Fia Sorĉistino glitigis mian hakilon tiel ke ĝi detranĉis mian kapon, kaj unue mi kredis ke tiel mi vere finiĝis. Sed hazarde la stanisto venis, kaj li faris por mi novan kapon el stano.

"Mi kredis ke mi fine venkis la Fian Sorĉistinon tiam, kaj mi laboris eĉ pli fervore; sed mi ne sciis kiom kruela estas mia malamikino. Ŝi elpensis novan metodon mortigi mian amon al la Manĝtula knabino, kaj denove ŝi

glitigis mian hakilon, tiel ke ĝi hakis rekte tra mian korpon, duonigante min. Denove la stanisto venis por helpi kaj faris por mi korpon el stano, kaj fiksis al ĝi miajn stanajn brakojn kaj krurojn kaj kapon, per artikoj, tiel ke mi povis moviĝadi sambone kiel en la komenco. Sed, ve! Mi nun ne havis koron, do mi perdis mian tutan amon al la Manĝtula knabino, kaj ne gravis al mi ĉu aŭ ne mi edziĝos kun ŝi. Mi supozas ke ŝi plu loĝas kun la maljunulino, atendante ke mi venos preni ŝin.

"Mia korpo tiom brilis en la sunlumo ke mi multe fieris pro ĝi, kaj nun ne gravis ĉu mia hakilo glitos, ĉar ĝi ne povas tranĉi min. Ekzistis nur unu danĝero — ke miaj artikoj rustos; sed mi gardis oleujon en mia dometo kaj zorgis olei min kiam ajn mi bezonis. Tamen, unu tagon mi forgesis fari tion, kaj, estante en pluvego, antaŭ ol mi konceptis la danĝeron miaj artikoj jam rustis, kaj mi restis staranta en la arbaro ĝis vi venis por helpi min. La sperto estis terura, sed dum la jaro kiam mi staris tie mi havis sufiĉan tempon por kompreni ke mia plej granda perdo estis la perdiĝo de mia koro. Dum mi amis mi estis la plej feliĉa persono sur la tero; sed neniu povas ami sen koro, do mi





firme intencas iri al Oz por peti de li koron. Se li donos al mi, mi reiros al la Manĝtula knabino kaj edziĝos kun ŝi."


Kaj Doroteon kaj la Birdotimigilon multe interesis la rakonto de la Stana Lignohakisto, kaj nun ili komprenis kial li tiom fervoras akiri novan koron.


"Tamen," diris la Birdotimigilo, "mi petos cerbon, ne koron; ĉar malsaĝulo ne scius kion fari per koro se li havus ĝin."

"Mi prenos koron," respondis la Stana Lignohakisto, "ĉar cerbo ne feliĉigas, kaj feliĉo estas la plej grava afero en la mondo."

Doroteo nenion diris, ĉar ŝi ne povis decidi kiu el ŝiaj du amikoj pravas, kaj ŝi decidis ke se ŝi nur sukcesos reiri al Kansas kaj Onklino Em, ne multe gravos ĉu la Stana Lignohakisto havas cerbon kaj la Birdotimigilo koron, aŭ ĉu ĉiu el ili akiris sian deziraĵon.

Kio plej ĝenis ŝin estis ke la pano estis preskaŭ plene manĝita, kaj nova manĝo por ŝi kaj Toto malplenigos la korbon. Estis vere ke nek la Stana Lignohakisto nek la Birdotimigilo kapablis manĝi, sed ŝi ne konsistis el stano aŭ pajlo, kaj ne povis vivi sen manĝo.





“‘Tio multe komfortigas,’” diris la Stana Lignohakisto.

# Ĉapitro VI.
# La Malkuraĝa Leono.





Ankoraŭ DOROteo kaj ŝiaj akompanantoj marŝis tra la densa arbaro. La vojo ankoraŭ estis pavimita per flavaj brikoj, sed ili estis multe kovritaj de sekaj branĉoj kaj mortaj folioj de la arboj, kaj la marŝado tute ne estis facila.

Malmultaj birdoj estis en tiu parto de la arbaro, ĉar birdoj amas la nekovritan terenon kie estas multa sunlumo; sed fojfoje aŭdiĝis malaltatona muĝo de iu sovaĝa besto kaŝiĝinta inter la arboj. Tiuj sonoj rapidbatigis la

koron de la knabineto, ĉar ŝi ne sciis ilian kaŭzon; sed Toto sciis, kaj li marŝis proksime al la flanko de Doroteo kaj eĉ ne bojis responde.

“Kiom longe daŭros,” la infano demandis al la Stana Lignohakisto, “ĝis ni estos ekster la arbaro?”

“Mi ne scias,” estis la respondo, “ĉar mi neniam estis en la Smeralda Urbo. Sed mia patro iris tien iam, kiam mi estis knabo, kaj li diris ke la vojo estas longa tra danĝera tereno, kvankam proksime al la urbo kie Oz loĝas la lando estas bela. Sed mi ne timas dum mi havas mian oleujon, kaj nenio povas damaĝi la Birdotimigilon, kaj sur via frunto estas la marko de la kiso de la bona Sorĉistino, kaj tio protektos vin.”

“Sed Toto!” diris la knabino malkviete; “kio protektos lin?”

“Ni mem devos protekti lin, se estos danĝero por li,” respondis la Stana Lignohakisto.

Tuj kiam li parolis, aŭdiĝis terura muĝo el la arbaro, kaj la postan momenton granda Leono saltis sur la vojon. Per unu piedbato li ĵetis la Birdotimigilon ĉirkaŭturniĝantan ĝis la rando de la vojo, kaj post tio li frapegis la Stanan Lignohakiston per siaj akraj ungoj. Sed, surprize al si, li ne damaĝis la stanon, kvankam la Hakisto falis sur la vojon kaj kuŝis senmove.

Malgranda Toto, ĉar nun estis videbla malamiko, kuris bojante al la Leono, kaj la granda besto malfermis sian buŝon por mordi la hundon. Doroteo, timante ke

Toto mortos, kaj sen atento al danĝero, kuris antaŭen kaj frapis la nazon de la Leono kiel eble plej forte, dum ŝi kriis:

“Vi ne aŭdacu mordi Toton! Vi devus honti, granda besto kia vi, mordi povran malgrandan hundon!”

“Mi ne mordis lin,” diris la Leono, per sia piedo frotante la parton de la nazo kiun frapis Doroteo.

“Ne, sed vi provis,” ŝi respondis kolere. “Vi estas nur granda malkuraĝulo!”

“Mi scias,” diris la Leono, klinante la kapon pro honto. “Mi de ĉiam scias. Sed kiel mi povas ne esti malkuraĝa”

“Nu mi certe ne scias. Kaj vi batis pajloplenan homon, la povran Birdotimigilon!”

“Ĉu li estas plenigita per pajlo?” demandis la Leono surprizite, dum li rigardis ŝin levi la Birdotimigilon kaj restarigi lin sur liaj piedoj kaj reĝustigi lian formon.

“Kompreneble li estas plena de pajlo,” respondis Doroteo, kiu ankoraŭ koleris. “

Tial li renversiĝis tiom facile,” komentis la Leono. “Min mirigis vidi lin ĉirkaŭturniĝi tiel. Ĉu ankaŭ la alia estas pajloplena?”

“Ne,” diris Doroteo, “li konsistas el stano.” Kaj ŝi helpis la Hakiston restariĝi.

“Tial li preskaŭ malakrigis miajn ungojn,” diris la Leono. “Kiam ili komencis grati la stanon mi sentis malvarmon suben kuri laŭ mia dorso. Kiu estas tiu

malgranda besto kiun vi tiom amas?"

"Li estas mia hundo, Toto," respondis Doroteo.

"Ĉu li konsistas el stano aŭ estas plena de pajlo?" demandis la Leono.

"Nek stano nek pajlo. Li estas — estas — viando-hundo."

Ho! Li estas kurioza besto, kaj aspektas ege malgranda, kiam mi nun rigardas lin. Neniu alia volus mordi tian etulon, nur malkuraĝa mi," pludiris la Leono malgaje.

"Kio malkuraĝigis vin?" demandis Doroteo, miroplene rigardante la grandan beston, ĉar li estis granda kiel malgranda ĉevalo.

"Estas mistero," respondis la Leono.

"Mi supozas ke mi naskiĝis tia. Ĉiuj aliaj bestoj en la arbaro kompreneble supozas ke mi estas kuraĝa, ĉar ĉie oni kredas ke la Leono estas la Reĝo de Bestoj. Mi trovis ke se mi muĝas tre laŭte, ĉiu vivanto estas timigata kaj forkuras de mi. Kiam ajn mi renkontis homon mi multe timis; sed mi nur muĝegis je li, kaj li ĉiam forkuris kiel eble plej rapide. Se la elefantoj kaj la tigroj kaj la ursoj decidus batali kontraŭ min, mi mem forku-



rus — tiom malkuraĝa mi estas; sed tuj kiam ili aŭdas min muĝegi ili ĉiuj penas foriri de mi, kaj kompreneble mi akceptas tion."

"Sed tio estas malĝusta. La Reĝo de Bestoj ne estu malkuraĝa," diris la Birdotimigilo.

"Mi scias tion," respondis la Leono, viŝante larmon de sia okulo per la pinto de sia vosto. "Tio multege malĝojigas min, kaj tre malfeliĉigas mian vivon. Sed kiam ajn estas danĝero, mia koro komencas rapide bati."

"Eble vi suferas pro kormalsano," diris la Stana Lignohakisto.

"Eble," diris la Leono.

"Se tiel," pludiris la Stana Lignohakisto, "ĝoju, ĉar tio pruvas ke vi havas koron. Rilate al mi, mi ne havas koron, do mi ne povas suferi pro kormalsano."

"Eble," diris la Leono penseme, "se mi ne havus koron al mi ne mankus kuraĝo."

"Ĉu vi havas cerbon?" demandis la Birdotimigilo.

"Mi supozas ke jes. Mi neniam rigardis en mian kapon por informiĝi," respondis la Leono.

"Mi iras al la Granda Oz por peti lin doni al mi cerbon," komentis la Birdotimigilo, "ĉar mia kapo estas plena de pajlo."

"Kaj mi iras por peti lin doni al mi koron," diris la Stana Lignohakisto.

"Kaj mi iras por peti lin resendi Toton kaj min al Kansas," aldonis Doroteo.

"Ĉu vi kredas ke Oz povus doni al mi kuraĝon?" demandis la Malkuraĝa Leono.

"Egalfacile kiel doni al mi cerbon," diris la Birdotimigilo.

"Aŭ doni al mi koron," diris la Stana Lignohakisto.

"Aŭ resendi min al Kansas," diris Doroteo.

"Do, se vi konsentos, mi akompanos vin," diris la Leono, "ĉar mia vivo estas netolerebla sen iom da kuraĝo."

"Vi estos tre bonvena," respondis Doroteo, "ĉar vi helpos forteni la aliajn sovaĝajn bestojn. Ŝajnas al mi ke ili nepre estas pli malkuraĝaj ol vi se ili lasas vin tiom facile timigi ilin."


"Efektive tiel estas," diris la Leono; "sed tio ne plikuraĝigas min, kaj dum mi scios ke mi estas malkuraĝa mi restos malfeliĉa."

Do denove la malgranda grupo rekomencis sian marŝadon, la Leono marŝis elegante apud Doroteo. Toto ne aprobis la novan kamaradon, unue, ĉar li ne povis forgesi ke li estis preskaŭ manĝita per la grandaj makzeloj de la Leono; sed post iom da tempo li plitrankviliĝis, kaj baldaŭ Toto kaj la Malkuraĝa Leono fariĝis bonaj amikoj.

Dum la cetero de tiu tago okazis neniu alia aventuro kiu ĝenis la pacon de la marŝado. Estas vere ke, unufoje, la Stana Lignohakisto paŝis sur skarabon kiu rampadis laŭ la vojo, kaj mortigis la povran besteton. Tio

multe malfeliĉigis la Stanan Lignohakiston, ĉar li ĉiam zorgoplene evitis damaĝi iun ajn vivanton; kaj dum li marŝis li ploris plurajn larmojn pro malĝojo kaj bedaŭro. Tiuj larmoj fluis malrapide sur lia vizaĝo kaj trans la ĉarnirojn de lia makzelo, kaj tie ili rustiĝis. Kiam Doroteo post nelonge demandis ion al li, la Stana Lignohakisto ne povis malfermi la buŝon, ĉar liaj makzeloj estis rigidaj pro rusto. Li multe ektimis pro tio kaj gestis al Doroteo ke ŝi helpu lin, sed ŝi ne povis kompreni. La Leono ankaŭ estis perpleksa pro nescio pri kio okazis. Sed la Birdotimigilo prenis la oleujon el la korbo de Doroteo kaj oleis la makzelojn de la Stana Lignohakisto, kaj post kelkaj momentoj li parolis same kiel antaŭe.

Mi lernu per tio,” diris li, “nepre rigardi kien mi paŝas. Ĉar se mi mortigus alian insekton aŭ skarabon mi nepre denove plorus, kaj plorado rustigas miajn makzelojn tiel ke mi ne povas paroli.”



Post tio li zorge marŝadis rigardante konstante la vojon, kaj kiam li vidis etan formikon laboradi sur la vojo li superpaŝis por ne damaĝi ĝin. La Stana Lignohakisto bone sciis ke li ne havas koron, kaj tial li tre zorgis neniam esti kruela aŭ malafabla kontraŭ io ajn.

"Vi, kiuj estas homoj kun koroj," li diris, "havas gvidilon, kaj tial ne necesas agi maljuste; sed mi ne havas koron, do mi devas esti tre zorgema. Kiam Oz donos al mi koron, kompreneble mi ne bezonos tiom zorgi."



*"Vi devus honti!"*

# Ĉapitro VII.
# La vojo al la Granda Oz.





Ili DEVIS kampadi sub granda arbo en la arbaro, tiunokte, ĉar ne estis domoj proksime. La arbo estis bona, dika kovrilo protektanta ilin kontraŭ laroso. La Stana Lignohakisto hakis grandan aron da lignaĵoj per sia hakilo kaj Doroteo pretigis belegan varmigan fajron kiu helpis ŝin esti malpli solsenta. Ŝi kaj Toto jam manĝis la lastajn panerojn, kaj nun ŝi ne sciis kion ili manĝos en la mateno.

"Se vi volas," diris la Leono, "mi eniros la arbaron

kaj mortigos cervon por vi. Vi povos rosti ĝin per la fajro, ĉar via gusto estas tiom stranga ke vi preferas kuiritaĵojn, kaj tiel vi havos bonan matenmanĝon."

"Ne! Bonvolu, ne!" pledis la Stana Lignohakisto. "Mi nepre plorus se vi mortigus povran cervon, kaj miaj makzeloj denove rustiĝus."

Sed la Leono foriris en la arbaron kaj trovis propran manĝon, kaj neniu poste sciis kion li manĝis, ĉar li ne menciis tion. Kaj la Birdotimigilo trovis arbon plenan de nuksoj kaj plenigis la korbon de Doroteo per ili, tiel ke ŝi dum longa tempo ne malsatos. Ŝi opiniis tion tre afabla kaj amema ago de la Birdotimigilo, sed ŝi multe ridis pro la mallerta maniero per kiu la povrulo prenis la nuksojn. Liaj vatitaj manoj estis tiom mallertaj, kaj la nuksoj tiom malgrandaj, ke li faligis preskaŭ tiom kiom li metis en la korbon. Sed ne gravis al la Birdotimigilo kiom da tempo li bezonos por plenigi la korbon, ĉar tio tenis lin malproksime de la fajro, ĉar li timis ke fajrero trafus lian pajlon kaj konsumus lin. Do li restis tre for de la flamoj, kaj proksimiĝis nur por kovri Doroteon per sekaj folioj kiam ŝi kuŝiĝis por dormi. Ili komfortigis kaj varmigis



ŝin kaj ŝi dormis profunde ĝis la mateno.

Kiam mateniĝis, la knabino lavis sian vizaĝon en malgranda ondetanta rivereto kaj baldaŭ post tiam ili ĉiuj rekomencis marŝi al la Smeralda Urbo.

La tago montriĝis eventoplena por la marŝantoj. Ili apenaŭ marŝis unu horon antaŭ ol vidi grandan abismon kiu transiras la vojon kaj dividas la arbaron ĝis preter ilia vidpovo, ambaŭflanke. Ĝi estis tre larĝa abismo, kaj kiam ili iris al la rando kaj enrigardis ili povis vidi ke ĝi ankaŭ estas tre profunda, kaj ke estas multaj grandaj, pintaj rokoj en la fundo. La flankoj estis tiom krutaj ke neniu el ili povus malsuprengrimpi, kaj dum momento ŝajnis ke la marŝado devos ĉesi.

"Kion ni faru?" demandis Doroteo senespere.

"Mi tute ne scias," diris la Stana Lignohakisto; kaj la Leono skuis sian densan hararon kaj rigardis penseme. Sed la Birdotimigilo diris:

"Ni ne povas flugi, tio estas certa; kaj ni ne povas malsuprengrimpi en tiun profundan abismon. Sekve, se ni ne povos transsalti, ni devos halti ĉi tie."

"Mi kredas povi transsalti," diris la Malkuraĝa Leono, zorge mezurinte la distancon per sia menso.

"Do estas solvite," respondis la Birdotimigilo, "ĉar vi povos transporti nin unuope sur via dorso."

"Nu, mi provos," diris la Leono. "Kiun la unua?"

"Mi," deklaris la Birdotimigilo; "ĉar se vi trovus ke vi ne povas transsalti la breĉon, Doroteo mortus, aŭ la

la Lignohakisto estus forte kavigita de la rokoj. Sed se mi estos sur via dorso ne multe gravos ĉar la falo tute ne damaĝos min."

"Mi mem timegas falon," diris la Malkuraĝa Leono, "sed mi supozas ke necesas provi. Do suriru mian dorson kaj ni provos."



La Birdotimigilo sidiĝis sur la dorson de la Leono, kaj la granda besto marŝis al la rando de la breĉo kaj kaŭriĝis.

"Kial vi ne kuras por salti?" demandis la Birdotimigilo.

"Ĉar ni, la Leonoj, ne saltas tiel," li respondis. Kaj saltegante, li pafiĝis tra la aero kaj surteriĝis sendanĝere sur la alian flankon.

Ĉiujn multe ĝojigis vidi kiel facile li faris tion, kaj kiam la Birdotimigilo estis degrimpinta de lia dorso, la Leono resaltis trans la abismon.

Doroteo decidis esti la dua; do ŝi tenis Toton en siaj brakoj kaj grimpis sur la dorson de la Leono, forte tenante lian kolhararon per unu mano. La sekvan momenton estis kvazaŭ ŝi flugas tra la aero; kaj post tio, antaŭ ol ŝi havis sufiĉan tempon por pripensi, ŝi estis sekura sur la alia flanko. La Leono reiris trian fojon kaj transportis la Stanan Lignohakiston, kaj post tio ili sidiĝis dum kelkaj momentoj por ke la besto povu ripozi, ĉar liaj grandaj saltoj malfaciligis lian spiradon, kaj li anhelis kiel granda hundo tro longe kurinta.



Ili trovis la arbaron tre densa ĉiflanke, kaj ĝi aspektis senluma kaj morna. Kiam la Leono estis ripozinta ili rekomencis marŝi laŭ la vojo el flavaj brikoj, silente demandante al si, ĉiu en sia propra menso, ĉu iam ili atingos la finon de la arbaro kaj reatingos la brilantan sunlumon. Aldone al ilia malkomforto ili baldaŭ aŭdis strangajn bruojn el la profundo de la arbaro, kaj la Leono flustris al ili ke en ĉi tiu parto de la lando la Kolizuloj loĝas.

“Kio estas la Kolizuloj?” demandis la knabino.

“Ili estas monstraj bestoj kun korpoj kiaj de leonoj kaj kapoj kiaj de tigroj,” respondis la Leono; “kaj kun ungoj tiom longaj kaj akraj ke ili povus disduigi min tiel facile kiel mi povus mortigi Toton. Mi timegas la Kolizulojn.”

"Ne mirigas min," respondis Doroteo. "Nepre ili estas timigaj bestoj."

La Leono estis tuj respondonta, sed subite ili atingis alian abismon kiu transiras la vojon; sed ĉi tiu abismo estis tiom larĝa kaj profunda ke la Leono tuj sciis ke li ne povos transsalti ĝin.

Do ili sidiĝis por pripensi kion fari, kaj post serioza pensado la Birdotimigilo diris,

"Jen granda arbo, proksima al la abismo. Se la Stana Lignohakisto povos haki ĝin tiel ke ĝi falos trans la abismon, ni povos transmarŝi facile."

"Tiu estas bonega ideo," diris la Leono. "Oni preskaŭ suspektus ke vi havas cerbon en la kapo, anstataŭ pajlon."

La Stana Lignohakisto tuj komencis labori, kaj tiom akris lia hakilo ke la arbo baldaŭ estis preskaŭ trahakita. La Leono metis siajn fortajn antaŭajn krurojn kontraŭ la arbon kaj puŝegis, kaj malrapide la granda arbo kliniĝis kaj falis bruegante trans la abismon, kun la plejsupraj branĉoj sur la alia flanko.

Ili ĵus komencis transiri tiun kuriozan ponton kiam akra muĝo suprenrigardigis ilin, kaj terurate ili vidis kuradi cele ilin du grandajn bestojn kun ursaj korpoj kaj tigraj kapoj.

"Jen la Kolizuloj!" diris la Malkuraĝa Leono, komencante tremadi.

"Rapide!" kriis la Birdotimigilo. "Ni transiru."

Do Doroteo transiris la unua, tenante Toton en la brakoj; la Stana Lignohakisto sekvis, kaj la Birdotimigilo sekvis lin. La Leono, kvankam certe timanta, turnis sin por fronti la Kolizulojn, kaj li muĝegis tiom laŭte kaj timige ke Doroteo kriegis kaj la Birdotimigilo surdorsen falis, kaj eĉ la ferocaj bestoj ekhaltis kaj rigardis lin surprizite.

Sed, trovinte sin pli grandaj ol la Leono, kaj memorante ke estas du da ili kaj nur unu da li, la Kolizuloj rekuris antaŭen, kaj la Leono transiris la arbon kaj turnis sin por vidi kion ili nun faros. Tute sen halti, la ferocaj bestoj ankaŭ komencis transiri la arbon, kaj la Leono diris al Doroteo,

"Ni perdiĝis, ĉar ili certe disŝiros nin per siaj akraj ungoj. Sed staru proksime malantaŭ mi, kaj mi batalos ilin dum mi restos viva."

"Atendu!" kriis la Birdotimigilo. Li intertempe estis pripensinta kion fari, kaj nun li petis la Stanan Lignohakiston haki la finaĵon de la arbo kuŝantan sur ilia flanko de la abismo. La Stana Lignohakisto tuj komencis uzi sian hakilon, kaj ĝuste kiam la du Kolizuloj estis preskaŭ transirintaj, la arbo ekfalis bruege en la abismon, kunportante la malbelajn, hurlantajn bestojn, kaj ambaŭ disfrakasiĝis pro la akraj rokoj sur la fundo.

"Nu," diris la Malkuraĝa Leono, libere spirante denove, "ni ankoraŭ iom vivos, kaj tio plaĉas min, ĉar nepre estus tre malkomforte ne vivi. Tiuj bestoj timigis



min tiom ke mia koro ankoraŭ bategas."

"Ha," diris la Stana Lignohakisto malgaje, " volonte mi havus koron povantan bati."

Tiu aventuro des pli fervorigis la marŝantojn eliri el la arbaro, kaj ili tiom rapide marŝis ke Doroteo laciĝis, kaj devis rajdi sur la dorso de la Leono. Ĝojigis ilin kiam la arbaro malpli densiĝis ju pli ili antaŭeniris, kaj en la posttagmezo ili subite trovis larĝan riveron, rapide fluantan antaŭ ili. Ili povis vidi ke aliflanke de la rivero la vojo el flavaj brikoj trairas belan pejzaĝon, kun verdaj kampoj kaj helaj floroj kaj apud la tuta vojo estis arboj sur kiuj pendas bongusgaj fruktoj. Ilin multe plaĉis vidi tiun belan pejzaĝon antaŭ si.

"Kiel ni transiros la riveron?" demandis Doroteo.

"Estas facile," respondis la Birdotimigilo. "La Stana Lignohakisto konstruu por ni floson, tiel ke ni povos flosi al la alia flanko.

Do la Lignohakisto prenis sian hakilon kaj komencis haki malgrandajn arbojn por fari floson, kaj dum li okupadis sin per tio, la Birdotimigilo trovis sur la river-



bordo arbon plenan de belaj fruktoj. Tio plaĉis al Doroteo, kiu estis manĝinta nur nuksojn dum tiu tago, kaj ŝi ĝissate manĝis la maturajn fruktojn.

Sed necesas tempo por konstrui floson, eĉ se konstruas ĝin laborema kaj nelaciĝanta Stana Lignohakisto, kaj kiam noktiĝis la laboro ankoraŭ ne estis finita. Do ili trovis komfortan lokon sub la arboj kie ili bone dormis ĝis la mateno; kaj Doroteo sonĝis pri la Smeralda Urbo, kaj pri la bona Sorĉisto de Oz, kiu baldaŭ resendos ŝin al ŝia propra hejmo.





*"La arbo ekfalis bruege en la abismon."*

# Ĉapitro VIII.
# La mortiga papavokampo





Nia MALGRANDA GRUPO DE marŝantoj vekiĝis la sekvan matenon refreŝigitaj kaj plenaj de espero, kaj Doroteo manĝis kvazaŭ princino per persikoj kaj prunoj el la arboj apud la rivero.

Malantaŭ ili estis la senluma arbaro tra kiu ili jam trapaŝis, kvankam ili suferis multajn senkuraĝigojn; sed antaŭ ili estis bela, sunoplena regiono kiu ŝajnis voki ilin antaŭen al la Smeralda Urbo.

Estis vere ke la larĝa rivero nun

fortranĉis ilin de tiu bela regiono; sed la floso estis preskaŭ finita, kaj kiam la Stana Lignohakisto finis tranĉi kelkajn pliajn ŝtipojn kaj kunligis ilin per lignaj kejloj, ili estis pretaj komenci. Doroteo sidiĝis sur la mezo de la floso kaj tenis Toton en siaj brakoj. Kiam la Malkuraĝa Leono paŝis sur la floson, ĝi grave kliniĝis, ĉar li estis granda kaj multepeza; sed la Birdotimigilo kaj la Stana Lignohakisto ekstaris sur la alia fino por ekvilibrigi ĝin, kaj ili mane tenis longajn stangojn por puŝi la floson tra la akvo.

Ili sukcesis sufiĉe bone, unue, sed kiam ili atingis la mezon de la rivero la rapida fluo tiris la floson pli kaj pli for de la vojo el flavaj brikoj; kaj la akvo tiom profundiĝis ke la longaj stangoj ne plu atingis la fundon.

"Estas malbone," diris la Stana Lignohakisto, "ĉar se ni ne atingos la bordon ni portiĝos en la landon de la fia Sorĉistino de la Okcidento, kaj ŝi sorĉos nin kaj sklavigos nin."

"Kaj tiuokaze mi ne ricevus cerbon," diris la Birdotimigilo.

"Kaj mi ne ricevus kuraĝon," diris la Malkuraĝa Leono.

"Kaj mi ne ricevus



koron," diris la Stana Lignohakisto.

"Kaj mi neniam reirus al Kansas," diris Doroteo.

"Nepre ni atingu la Smeraldan Urbon, se eble," aldonis la Birdotimigilo, kaj li tiom forte puŝis sian longan stangon ke ĝi firme fiksiĝis en la koto sur la fundo de la rivero, kaj antaŭ ol li povis reeltiri ĝin, aŭ malteni ĝin, la floso estis forportita kaj la povra Birdotimigilo estis lasita kroĉiĝanta al la stango meze de la rivero.


"Adiaŭ!" li kriis al ili, kaj ili bedaŭregis forlasi lin; efektive, la Stana Lignohakisto komencis plori, sed feliĉige li memoris ke li eble rustos, do li sekigis siajn larmojn per la antaŭvesto de Doroteo.

Kompreneble ĉi tio estis malbona sorto por la Birdotimigilo.

"Nun mi estas en malpli bona stato ol kiam mi unuafoje renkontis Doroteon," li pensis. "Tiam mi estis fiksita al stango en maizkampo, kie mi povis magi ke mi fortimigas korvojn; sed certe ne utilas Birdotimigilo fiksita sur stango en la mezo de rivero. Mi timas ke mi vere neniam akiros cerbon!"

Laŭlonge de la rivero naĝis la floso, kaj la povra Birdotimigilo fariĝis pli kaj pli for. Tiam la





Leono diris:

"Io estas farenda por savi nin. Mi kredas ke mi povos naĝi al la bordo kaj kuntiri la floson, se vi tenos firme la pinton de mia vosto.

Do li saltis en la akvon kaj la Stana Lignohakisto firme tenis lian voston, kiam la Leono komencis kiel eble plej forte naĝi al la bordo. Estis tre malfacile, malgraŭ lia grandeco; sed iom post iom ili tiriĝis el la fluo, kaj Doroteo prenis la longan stangon de la Stana Lignohakisto kaj helpis puŝi la floson al la tero.

Ili ĉiuj estis tre lacaj kiam ili fine atingis la bordon kaj paŝis sur la belan verdan herbaron, kaj ili ankaŭ sciis ke la rivero portis ilin tre for de la vojo el flavaj brikoj kiu kondukas al la Smeralda Urbo.

"Kion ni faru nun?" demandis la Stana Lignohakisto, dum la Leono kuŝis sur la herbaro por ke la suno sekigu lin.

"Ni devas iel reiri al la vojo," diris Doroteo.

"La plej bona plano estos marŝi laŭ la riverbordo ĝis ni reatingos la vojon," komentis la Leono.

Do post ilia ripozo, Doroteo prenis sian

korbon kaj ili komencis marŝi laŭ la herba bordo, reen al la vojo de kiu la rivero portis ilin. Ĝi estis bela bordo, reen al la vojo de kiu la rivero portis ilin. Ĝi estis bela regiono, kun multaj floroj kaj fruktarboj kaj sunbrilo por gajigi ilin, kaj se ili ne sentus tiom da bedaŭro pro la povra Birdotimigilo ili povus esti vere feliĉaj.

Ili marŝis laŭ sia eblo plej rapide, kaj Doroteo haltis nur unufoje por pluki belan floron; kaj post iom da tempo la Stana Lignohakisto kriis:

"Rigardu!"

Ĉiuj rigardis la riveron kaj vidis la Birdotimigilon fiksitan sur sia stango meze de la akvo, aspektantan tre solsenta kaj malfeliĉa.

"Kion ni povas fari por savi lin?" demandis Doroteo.

La Leono kaj la Stana Lignohakisto ambaŭ skuis sian kapon ĉar ili ne sciis. Do ili sidiĝis sur la bordo kaj rigardis senespere la Birdotimigilon ĝis Cikonio alflugis, vidinte ilin, kaj haltis por ripozi ĉe la rando de la akvo.

"Kiuj vi estas kaj kien vi iras?" demandis la Cikonio.

"Mi estas Doroteo," respondis la knabino, "kaj jen miaj amikoj, la Stana Lignohakisto kaj la Malkuraĝa Leono; kaj ni iras al la Smeralda Urbo."

"Jen ne la vojo," diris la Cikonio, dum ŝi tordis sian longan kolon kaj akre rigardis la kuriozan grupon.

"Mi scias," respondis Doroteo, "sed ni perdis la Birdotimigilon, kaj ni ne scias kiel rehavigi lin."

"Kie li estas?" demandis la Cikonio.

"Tie, en la rivero," respondis la knabino.

"Se li ne estus tiel granda kaj peza mi alportus lin por vi," komentis la Cikonio.

"Li tute ne estas peza," diris Doroteo, fervore, "ĉar li estas plenigita per pajlo; kaj se vi reportos lin al ni ni multege dankos vin senfine."

"Nu, mi provos," diris la Cikonio, "sed se mi trovos lin tro peza mi devos refaligi lin en la riveron."

Do la granda birdo flugis en la aeron kaj trans la akvon ĝis ŝi atingis la lokon kie la Birdotimigilo estis fiksita sur sia stango. La Cikonio per siaj grandaj ungoj kaptis brakon de la Birdotimigilo kaj alte portis lin al la bordo, kie Doroteo kaj la Leono kaj la Stana Lignohakisto kaj Toto atendis.

Kiam la Birdotimigilo retrovis sin inter siaj amikoj li estis ĝojega kaj ĉirkaŭbrakumis ĉiujn, eĉ la Leonon kaj Toton; kaj dum ili marŝadis li kantis "Tol-de-ri-de-o!" ĉiupaŝe, tiom gaja li estis.

"Mi kredis ke mi devos resti en la rivero eterne," li diris, "sed la afabla Cikonio savis min, kaj se mi ja akiros cerbon mi retrovos la Cikonion kaj rekompence faros ian komplezon por ŝi."

"Ne necesas," diris la Cikonio, kiu flugadis apud ili. "Mi ĉiam plezure helpas kiam estas danĝero. Sed mi devas foriri nun, ĉar miaj beboj atendas min en la nesto. Mi esperas ke vi trovos la Smeraldan Urbon kaj ke Oz

helpos vin."

"Dankon," respondis Doroteo, kaj la afabla Cikonio flugis en la aeron kaj baldaŭ ne plu videblis.

Ili marŝadis aŭskultante la kantadon de la brilkoloraj birdoj kaj rigardante la belajn florojn kiuj nun tiom densis ke ili tapiŝis la teron. Ili estis grandaj flavaj kaj blankaj kaj bluaj kaj purpuraj floroj, kaj ankaŭ grandaj grupoj de skarlataj papavoj, kiuj estis tiom brilkoloraj ke ili preskaŭ blindigis la okulojn de Doroteo.

"Belegaj!" la knabino krietis, spirante la spican odoron de la floroj.

"Verŝajne," respondis la Birdotimigilo. "Kiam mi havos cerbon mi supozeble pli ŝatos ilin."

"Se mi nur havus koron mi sendube amus ilin," aldonis la Stana Lignohakisto.

"De ĉiam plaĉas al mi floroj," diris la Leono; "ili aspektas tiel senhelpaj kaj malfortaj. Sed en la arbaro ne estas tiom brilaj floroj kiel ĉi tiuj."

Ili nun atingis pli kaj pli da grandaj skarlataj papavoj, kaj malpli kaj malpli da aliaj floroj; kaj baldaŭ ili trovis sin meze de granda kampo da papavoj. Nu, oni bone scias ke kiam grupiĝis tiom granda kvanto da tiaj floroj ilia odoro estas sufiĉe potenca por dormigi ĉiun kiu enspiras ĝin, kaj se la dormanto ne portiĝas for de la odoro de la floroj li dormas senĉese por ĉiam. Sed Doroteo ne sciis tion, nek ŝi povis foriri de la grandaj ruĝaj floroj kiuj ĉie ĉirkaŭis ilin; do baldaŭ ŝiaj okuloj peziĝis

kaj ŝi sentis bezonon sidiĝi por ripozi kaj por dormi.

Sed la Stana Lignohakisto ne permesis tion.

"Ni devos rapidi kaj reatingi la vojon el flavaj brikoj antaŭ ol noktiĝos," li diris; kaj la Birdotimigilo konsentis kun li. Do ili plu marŝadis ĝis Doroteo ne plu povis stari. Ŝiaj okuloj fermiĝis malgraŭ ŝia volo kaj ŝi forgesis kie ŝi estas kaj falis surteren apud la papavoj,

"Kion ni faru?" demandis la Stana Lignohakisto.

"Se ni lasos ŝin ĉi tie ŝi mortos," diris la Leono. "La odoro de la floroj mortigas nin ĉiujn. Mi mem apenaŭ povas teni la okulojn malfermitaj kaj la hundo jam dormas."

Estis vere; Toto jam falis apud sian mastrineton. Sed la Birdotimigilon kaj Stanan Ligno hakiston, ĉar ili ne konsistis el karno, ne



ĝenis la odoro de la floroj.

“Rapide kuru,” diris la Birdotimigilo al la Leono, “kaj eliru ĉi tiun mortigan florkampon kiel eble plej baldaŭ. Ni kunportos la knabineton, sed se vi endormiĝos vi estas tro granda kaj ni ne povos porti vin.”

Do la Leono vigligis sin kaj antaŭensaltadis kiel eble plej rapide. Post momento li ne plu estis videbla.

“Ni uzu niajn manojn kiel seĝon, por porti ŝin,” diris la Birdotimigilo. Do ili levis Toton kaj metis la hundon sur la sinon de Doroteo, kaj post tio ili faris seĝon uzante siajn manojn kiel sidejon kaj siajn brakojn kiel seĝobrakojn kaj portis la dormantan knabinon tra la floroj.




Plu kaj plu ili marŝis, kaj ŝajnis ke la granda tapiŝo da mortigaj floroj ĉirkaŭ ili neniam finiĝos. Ili sekvis la kurbiĝon de la rivero, kaj fine trovis sian amikon la Leonon, profunde dormantan inter la papavoj. La floroj superfortis la grandan beston kaj, fine, li cedis, kaj falis ne tre for de la fino de la papavokampo, kie la dolĉa herbaro kuŝis en belaj verdaj kampoj antaŭ ili.

“Nenion ni povas fari por li,” diris la Stana Lignohakisto, malfeliĉe; “ĉar li estas tro multepeza, ni ne povos levi lin. Ni devos lasi lin ĉi tie eterne dormi, kaj eble li sonĝos ke li fine trovis kuraĝon.”

"Mi bedaŭras," diris la Birdotimigilo. "La Leono estis tre agrabla kamarado malgraŭ sia malkuraĝo. Sed ni pluiru."

Ili portis la dormantan knabinon al bela loko apud la rivero, sufiĉe for de la kampo da papavoj por ke ŝi ne plu spiru la venenon de la floroj, kaj tie ili kuŝigis ŝin delikate sur la molan herbaron kaj atendis ĝis la freŝa venteto vekos ŝin.





*"La cikonio alte portis lin."*

# Ĉapitro IX.
# La Reĝino de la Kampomusoj.





“Ni NE POVAS ESTI TRE FOR la vojo el flavaj brikoj, nun,” komentis la Birdotimigilo, dum li staris apud la knabino, “ĉar ni jam marŝis preskaŭ tiom kiom forportis nin la rivero.”

La Stana Lignohakisto estis tuj respondonta kiam li ekaŭdis malaltan muĝon, kaj turninte sian kapon (kiu bonege turniĝis per ĉarniroj) li vidis strangan beston saltadi trans la herbaron al ili. Ĝi estis, efektive, granda flava Linko, kaj la Stana Lignohakisto opiniis ke ĝi nepre ĉasas ion, ĉar ĝiaj oreloj kuŝis proksime al la kapo kaj ĝia buŝo estis larĝe malfermita, tiel ke vidiĝis du vicoj de malbelaj dentoj, dum ĝiaj ruĝaj okuloj ardis kiel fajrogloboj. Kiam

ĝi pliproksimiĝis la Stana Lignohakisto vidis kuranta antaŭ la besto malgrandan grizan kampomuson, kaj kvankam li ne havis koron li sciis ke estas maljuste ke la Linko strebas mortigi tian belan, sendanĝeran besteton.

Do la Hakisto levis sian hakilon kaj dum la Linko preterkuris li rapide batis tiel ke la kapo de la besto plene apartiĝis de sia korpo, kaj ĝi ruliĝis en du pecoj ĉe liaj piedoj.

La kampomuso, nun libera de sia malamiko, ekhaltis; kaj malrapide venante al la Hakisto ĝi diris, per alta voĉeto:

"Ho, dankon! Grandegan dankon, ĉar vi savis mian vivon."

"Ne menciu ĝin, mi petas," respondis la Hakisto, "Sciu ke mi ne havas koron, do mi zorgas helpi ĉiun kiu bezonas amikon, eĉ kiam ĝi estas nur muso."

"Nur muso!" kriis la besteto, indigne; "mi ja estas Reĝino—la Reĝino de ĉiuj kampomusoj!"

"Ĉu vere?" diris la Hakisto, klinante sin riverence.

"Sekve vi tre bone agis, kaj ne nur kuraĝe, savante mian vivon," diris la Reĝino.

Tiumomente pluraj musoj vidiĝis alkurante tiel rapide kiel permesis iliaj kruretoj, kaj kiam ili vidis la Reĝinon ili kriis:

"Ho, via Moŝtino, ni kredis ke vi estos mortigita! Kiel vi sukcesis eskapi de la granda Linko?" kaj ĉiuj klinis sin tiom malanten antaŭ la Reĝineto ke ili preskaŭ

surkapiĝis.

"Ĉi tiu kurioza stanulo," ŝi respondis, "mortigis la Linkon kaj savis mian vivon. Do ekde nun vi ĉiuj devas servi lin, kaj obeu eĉ lian plej malgrandan deziron."

"Jes!" kriis ĉiuj musoj, per akra koruso. Kaj post tio ili diskuris ĉiudirekten, ĉar Toto estis vekiĝinta el sia dormo, kaj vidante tiom da tiuj musoj ĉirkaŭ si li ekbojis ĝoje kaj saltis inter la grupon. Toto ĉiam amis ĉasi musojn kiam li loĝis en Kansas, kaj li ne opiniis tion malbona ago.


Sed Stana Lignohakisto kaptis la hundon per siaj brakoj kaj firme tenis lin, dum li kriis al la musoj: "Revenu! revenu! Toto ne damaĝos vin."

Aŭdinte tion la Reĝino de la Musoj etendis sian kapon de malanta herbaĵaro kaj demandis, per timida voĉo,

"Ĉu vi certas ke li ne mordos nin?"

"Mi ne permesos tion," diris la Hakisto; "do ne timu."

Unu post la alia la musoj revenis, kaj Toto ne bojis denove, kvankam li strebis salti de la brakoj de la Hakisto kaj mordus lin se li ne bone scius ke li konsistas el stano. Fine unu el la plej grandaj musoj parolis.



"“Ĉu ion ni povos fari,” ĝi demandis, “por repagi vin ĉar vi savis la vivon de nia Reĝino?”

“Mi kredas ke ne,” respondis la Hakisto; sed la Birdotimigilo, kiu strebis pensi sed ne povis ĉar lia kapo estis plena de pajlo, diris rapide,

“Jes; vi povas savi nian amikon la Malkuraĝan Leonon dormantan inter la papavoj.”

“Leonon!” kriis la Reĝineto. “Sed, li manĝus nin ĉiujn!”

“Ne,” deklaris la Birdotimigilo, “ĉi tiu Leono estas malkuraĝa.”

“Ĉu vere?” demandis la Muso.

“Li mem agnoskas tion,” respondis la Birdotimigilo, “kaj neniam li damaĝus personon kiu estas nia amiko. Se vi helpos nin savi lin mi promesas ke li tre amike traktos vin.”

“Bone,” diris la Reĝino, “ni fidos vin. Sed kion ni faru?”

“Ĉu multaj musoj nomas vin Reĝino kaj pretas obei vin?”

“Ho jes; miloj,” ŝi respondis.

“Do ordonu ke ĉiuj venu ĉi tien kiel eble plej baldaŭ, kaj ĉiu kunportu pecon de ŝnuro.”

La Reĝino turnis sin al la musoj kiuj servas ŝin kaj ordonis ke ili tuj foriru kaj venigu la tutan popolon. Tuj kiam ili aŭdis ŝian ordonon ili diskuris ĉiudirekten kiel eble plej rapide.

"Nun," diris la Birdotimigilo al la Stana Lignohakisto, "iru al tiuj arboj apud la rivero kaj faru ĉareton por porti la Leonon."

Do la Hakisto tuj iris al la arboj kaj komencis labori; kaj baldaŭ li faris ĉareton el la membroj de la arboj, de kiuj li forhakis la foliojn kaj branĉojn. Li kunfiksis ĝin per lignaj kejloj kaj faris la kvar radojn el mallongaj pecoj de granda arbotrunko. Tiom rapide kaj bone li laboris ke kiam la musoj komencis alveni la ĉareto jam estis tute preta por ili.

Ili venis el ĉiuj direktoj, kaj estis miloj da ili: grandaj musoj kaj malgrandaj musoj kaj mezgrandaj musoj; kaj ĉiu portis pecon de ŝnuro en la buŝo. Proksimume tiam Doroteo vekiĝis el sia longa dormo kaj malfermis siajn okulojn. Ŝin multe mirigis trovi sin kuŝanta sur la herbaro kun miloj da musoj ĉirkaŭstarantaj kaj timete rigardantaj ŝin. Sed la Birdotimigilo informis ŝin pri ĉio, kaj turninte sin al la digna Museto, li diris,


"Permesu ke mi konigu al vi ŝian Moŝtinon, la Reĝino."

Doroteo klinetis sian kapon solene kaj la Reĝino riverencis, kaj post tio ŝi fariĝis tre amikema kun la knabineto.

La Birdotimigilo kaj la Hakisto nun komencis ligi la musojn al la ĉaro, uzante la ŝnuretojn kiujn ili estis alportintaj. Unu finaĵo de ĉiu ŝnureto estis ligita ĉirkaŭ la

kolon de ĉiu muso kaj la alia fino al la ĉareto. Kompreneble la ĉareto estis miloble pli granda ol iu el la musoj tirontaj ĝin; sed kiam ĉiuj musoj estis alligitaj ili povis tre facile tiri ĝin. Eĉ la Birdotimigilo kaj la Stana Lignohakisto povis sidi sur ĝi, kaj ili estis rapide tirataj de siaj strangaj ĉevaletoj al la loko kie la Leono kuŝis dormante.


Post multa tre malfacila laboro, ĉar la Leono multe pezis, ili sukcesis tiri lin sur la ĉareton. Post tio la Reĝino





ordonis ke ŝia sia popolo komencu, ĉar ŝi timis ke se la musoj restos tro longe inter la papavoj ankaŭ ili ekdormos.

Unue la bestetoj, kvankam multaj, apenaŭ povis moveti la peze ŝarĝitan ĉareton; sed la Hakisto kaj la Birdotimigilo ambaŭ puŝis de mal-antaŭe, kaj ili pli bone sukcesis. Baldaŭ ili finrulis la Leonon el inter la papavoj sur la verdajn kampojn, kie li povis denove spiri la dolĉan, freŝan aeron, anstataŭ la venenan odoron de la floroj.



Doroteo venis renkonte al ili kaj elkore dankis la musetojn ĉar ili savis de morto ŝian akompananton. Ŝi jam multe amis la grandan Leonon kaj ŝi ĝojis pro lia saviĝo.


Post tio la musoj estis malligitaj al la ĉareto kaj forkuris tra la herbaron al siaj hejmoj. La Reĝino de la Musoj foriris la plej lasta.

"Se iam vi denove bezonos nin," ŝi diris, "venu en la kampon kaj voku, kaj ni aŭdos vin kaj venos helpi vin. Adiaŭ!"

"Adiaŭ!" ĉiuj respondis, kaj la Reĝino forkuris, dum Doroteo firme tenis Toton por ke li ne postkuru kaj timigu ŝin.

Post tio ili sidiĝis apud la Leono atendante lian vekiĝon; kaj la Birdotimigilo portis al Doroteo fruktojn el apuda arbo, kaj ŝi manĝis ilin.





*"Permesu ke mi konigu al vi ŝian Moŝtinon, la Reĝino."*

# Ĉapitro X.
## La Pordo-gardisto.





IOM LONGE POSTE LA Malkuraĝa Leono vekiĝis, ĉar li kuŝis tre longe inter la papavoj, enspirante ilian mortigan odoron; sed kiam li ja malfermis siajn okulojn kaj ruliĝis de la ĉareto li ĝoje trovis sin viva.

"Mi kuris laŭeble rapide," li diris, sidiĝinte kaj oscedante; "sed la floroj superfortis min. Kiel vi elirigis min?"


Ili rakontis al li pri la kampomusoj, kaj kiel ili malavare savis lin de morto; kaj la Malkuraĝa Leono ridis, kaj diris:


"Mi ĉiam opiniis min tre granda kaj timiga; sed eĉ malgrandaj floroj preskaŭ mortigis min, kaj malgrandaj musoj savis mian vivon. Ĉio estas tre stranga! Sed, kamaradoj, kion ni faru nun?"

"Ni devas pluserĉi por retrovi la vojon el flavaj brikoj," diris Doroteo; "kaj post tio ni povos marŝadi laŭ ĝi al la Smeralda Urbo."

Do, ĉar la Leono estis tute refreŝigita, kaj tute bone fartis denove, ili ĉiuj komencis marŝi, kaj multe ĝuis la iradon tra la mola, freŝa herbaro; kaj post nelonge ili atingis la vojon el flavaj brikoj kaj returnis sin por marŝi cele la Smeraldan Urbon kie loĝas la granda Oz.

La vojo estis nun glata kaj bone pavimita, kaj la ĉirkaŭa pejzaĝo estis bela; tial la marŝantoj ĝoje lasis la arbaron multe malantaŭe kaj kun ĝi la multajn danĝerojn renkontitajn en ĝiaj mornaj ombroj. Denove ili povis vidi barilojn konstruitajn laŭlonge de la vojo; ed ĉi tiuj estis verdkoloraj, kaj kiam ili atingis dometon, en kiu ŝajne loĝas kultiv-





isto, ankaŭ tio estis verdkolora. Ili preterpasis plurajn tiajn dometojn dum la posttagmezo, kaj kelkfoje homoj venis al la pordoj kaj rigardis ilin kvazaŭ dezirante fari demandojn; sed neniu proksimiĝis al ili nek parolis al ili pro la granda Leono, kiun ili multe timis. La homoj ĉiuj estis vestitaj per tre belaj smeraldaverdaj vestoj kaj surportis pintajn ĉapelojn kiel la Manĝtuloj.

"Jen certe la Lando Oz," diris Doroteo, "kaj nepre ni proksimiĝas al la Smeralda Urbo."

"Jes," respondis la Birdotimigilo; "ĉio verdas ĉi tie, kaj en la Lando de la Manĝtuloj bluo estis la preferata koloro. Sed oni ne ŝajnas egale amikemaj kiel la Manĝtuloj kaj mi suspektas ke ni ne sukcesos trovi dormolokon por tranokti."

"Mi volas manĝi ion alian ol nur fruktojn," diris la nur fruktojn," diris la knabino, "kaj mi certas ke Toto estas malsatega. Ni haltu ĉe la sekva domo kaj parolu kun la loĝantoj."

Do, kiam ili atingis relative grandan domon, Doroteo kuraĝe marŝis al la pordo kaj frapis. Virino Virino malfermis ĝin nur sufiĉe por trarigardi, kaj diris,

"Kion vi volas, infano, kaj kial tiu granda Leono estas kun vi?"

"Ni volas tranokti kun vi, se vi permesos," respondis Doroteo; "kaj la Leono estas mia amiko kaj kamarado, kaj nenial damaĝus vin."

"Ĉu li estas malsovaĝa?" demandis la virino iomete pli malfermante la pordon.

"Ho jes;" diris la knabino, "kaj li estas ankaŭ ege malkuraĝa; do li multe pli timos pro vi ol vi timos pro li."

"Nu," diris la virino, pripensinte kaj denove rigardetinte la Leonon, "se estas tiel do vi rajtas enveni, kaj mi donos al vi iom da vespermanĝo kaj lokon kie vi povos dormi."

Do ili ĉiuj eniris la domon, kie estis, krom la virino, du infanoj kaj viro. La kruro de la viro estis vundita, kaj li kuŝadis sur sofo en angulo. Ili ŝajnis tre surprizitaj de la stranga grupo, kaj dum la virino surtabligis la manĝilojn la viro demandis,

"Kien iras vi ĉiuj?"

"Al la Smeralda Urbo," diris Doroteo, "por renkonti la Grandan Ozon."

"Ĉu vere?" krietis la viro. "Ĉu vi certas ke Oz akceptos renkonti vin?"

"Kial ne?" ŝi respondis.

"Nu, oni diras ke li neniam permesas ke iu ajn eniru al li. Mi multafoje estis en la Smeralda Urbo, kaj ĝi estas bela kaj mirinda urbo; sed mi neniam ricevis permeson vidi la Grandan Ozon, nek mi scias pri iu alia

vivanto kiu vidis lin."

"Ĉu li neniam eliras?" demandis la Birdotimigilo.

"Neniam. Li sidas tagon post tago en la granda tronoĉambro de la palaco, kaj eĉ liaj servistoj neniam vidas lin vizaĝ-al-vizaĝe."

"Kia li estas?" demandis la knabino.

"Estas malfacile diri," diris la viro penseme. "Komprenu, Oz estas granda Sorĉisto, kaj li povas doni al si kian ajn deziratan formon. Do kelkaj diras ke li aspektas kiel birdo; kaj kelkaj ke li aspektas kiel elefanto; kaj kelkaj diras ke li aspektas kiel kato. Al aliaj li aspektas bela feino, aŭ elfo, aŭ kia ajn li deziras. Sed kiu estas la vera Oz, kiam li surprenas sian propran formon, neniu vivanto scias."

"Tre strange," diris Doroteo; "sed ni devos strebi, iel, renkonti lin, ĉar alie nia alveno estos vana."

"Kial vi volas renkonti la teruran Ozon?" demandis la viro.

"Mi volas ke li donu al mi cerbaĵon," diris la Birdotimigilo, fervore.

"Ho, Oz povus fari tion sufiĉe facile," deklaris la viro. "Li havas pli da cerbo ol li bezonas."



"Kaj mi volas ke li donu al mi koron," diris la Stana Lignohakisto.

"Tio ne ĝenos lin," pludiris la viro, "ĉar Oz havas grandan kolekton da koroj, ĉiudimensiajn kaj -formajn."

"Kaj mi volas ke li donu al mi kuraĝon," diris la Malkuraĝa Leono.

"Oz tenas grandan poton da kuraĝo en sia tronoĉambro," diris la viro, "kiun li kovris per ora plado, por ke ĝi ne superfluu el ĝi. Li tre volonte donos iom al vi."

"Kaj mi volas ke li resendu min al Kansas," diris Doroteo.

"Kie estas Kansas?" demandis la viro, surprizite.

"Mi ne scias," respondis Doroteo malĝoje, "sed ĝi estas mia hejmo, kaj mi certas ke ĝi estas ie."

"Verŝajne. Nu, Oz povas fari ĉion; do mi supozas ke li trovos Kansason por vi. Sed unue vi devos renkonti lin, kaj tio estos tre malfacila tasko; ĉar al la Granda Sorĉisto ne plaĉas renkonti iun ajn, kaj kutime tio, kion li deziras, okazas. Sed kion VI volas?" li pludiris, parolante al Toto. Toto nur skuis sian voston, ĉar, neklarigeble, li ne kapablis paroli.

La virino nun vokis al ili dirante ke la manĝo estas preta, do ili grupiĝis ĉirkaŭ la tablon kaj Doroteo manĝis bongustegan kaĉon kaj teleron da kirlitaj ovoj kaj teleron da bona blanka pano, kaj ĝuis la manĝon. La Leono manĝis iom da kaĉo, sed ĝi ne plaĉis al li, kaj li diris ke

ĝi konsistas el aveno kaj aveno estas manĝaĵo por ĉevaloj, ne leonoj. La Birdotimigilo kaj la Stana Lignohakisto nenion manĝis. Toto manĝis iom da ĉio, kaj ĝojis denove bone manĝi.

La virino nun donis al Doroteo liton en kiu dormi, kaj Toto kuŝiĝis apud ŝi, kaj la Leono gardis la pordon de ŝia ĉambro por ke neniu ŝin ĝenu. La Birdotimigilo kaj la Stana Lignohakisto staris en angulo kviete dum la tuta nokto, kvankam kompreneble ili ne kapablis dormi.

La sekvan matenon, tuj kiam la suno leviĝis, ili rekomencis marŝi, kaj baldaŭ ili vidis belan verdan brilon en la ĉielo tuj antaŭ si.

"Jen nepre la Smeralda Urbo," diris Doroteo.

Dum ili plu marŝis, la verda brilo fariĝis pli kaj pli hela, kaj ŝajnis ke finfine ili proksimiĝas al la celo de la marŝado. Tamen jam estis posttagmeze kiam ili atingis la grandan muron kiu ĉirkaŭis la Urbon. Ĝi estis alta, kaj dika, kaj hele verdkolora.

Antaŭ ili, kaj ĉe la fino de la vojo el flavaj brikoj, estis grandega pordo, kovrita per smeraldoj kiuj tiom scintilis pro la sunlumo ke eĉ la pentritaj okuloj de la Birdotimigilo preskaŭ blindiĝis.

Sonorilo estis apud la pordego, kaj Doroteo puŝis la butonon kaj aŭdis arĝentecan klakon el interne. Post tio la granda pordo malrapide malfermiĝis, kaj ili ĉiuj trairis kaj trovis sin en alta arkaohava ĉambro, kies muroj scintilis pro sennombraj smeraldoj.

Antaŭ ili staris malgranda viro proksimume samgranda kiel la Manĝtuloj. Li estis verde vestita, de la kapo al la piedoj, kaj eĉ lia haŭto estis verdeta. Apud li estis granda verda kesto.

Kiam li vidis Doroteon kaj ŝiajn akompanantojn la viro demandis,

"Kion vi volas en la Smeralda Urbo?"

"Ni venis por renkonti la Grandan Ozon," diris Doroteo.

Multe surprizis la viron tiu respondo kaj li sidiĝis por pripensi ĝin.

"Jam de multaj jaroj neniu petas renkonti Ozon," li diris, skuante sian kapon perplekse. "Li estas potenca kaj timiga, kaj se vi venis pro senutila aŭ malsaĝa celo por ĝeni la saĝan kontempladon de la Granda Sorĉisto, li eble koleros kaj detruos vin ĉiujn tuj."

"Sed ne temas pri malsaĝa celo, nek sencela," res-



pondis la Birdotimigilo; "ĝi estas grava. Kaj oni diris al ni ke Oz estas bona Sorĉisto."

"Jes," diris la verdulo; "kaj li regas la Smeraldan Urbon saĝe kaj bone. Sed al tiuj kiu estas nehonestaj, aŭ kiuj proksimiĝas al li nur pro scivolemo, li estas plej terura, kaj malmultaj iam petis vidi lian vizaĝon. Mi estas la Pordogardisto, kaj ĉar vi postulas renkonti la Grandan Ozon mi devos konduki vin al lia palaco. Sed unue vi devos surmeti la okulvitrojn."

"Kial?" demandis Doroteo.

"Ĉar se vi ne surhavus okulvitrojn la brilego kaj gloro de la Smeralda Urbo blindigus vin. Eĉ la loĝantoj de la Urbo devas surhavi okulvitrojn nokte kaj tage. Ili estas surfiksitaj per seruro, ĉar tiel ordonis Oz kiam la Urbo unue estis konstruita, kaj mi havas la solan ŝlosilon kiu povas malŝlosi ilin."

Li malfermis la grandan keston, kaj Doroteo vidis ke ĝi estas plena de okulvitroj ĉiudimensiaj kaj ĉiuformaj. Ĉiu el ili havis verdajn vitrojn. La Pordogardisto trovis okulvitrojn precize ĝustadimensiajn por Doroteo kaj metis ilin sur ŝiajn okulojn. Estis du oraj bendoj ligitaj al ili, kiuj ĉirkaŭis la dorson de






ŝia kapo. kie ili estis kunfiksitaj per ŝlosileto ĉe la fino de ĉeno ĉirkaŭ la kolo de la Pordogardisto. Kiam ili estis surfiksitaj, Doroteo ne povus forpreni ilin eĉ se ŝi volus, sed kompreneble ŝi ne volis esti blindigita de la brilego de la Smeralda Urbo, do ŝi diris nenion.

Post tio la verdulo metis okulvitrojn sur la Birdotimigilon kaj la Stanan Lignohakiston kaj la Leonon, kaj eĉ malgrandan Toton; kaj ĉiuj estis fiksitaj per la ŝlosilo.

Post tio la Pordogardisto surmetis siajn proprajn okulvitrojn kaj diris al ili ke li pretas gvidi ilin al la palaco. Preninte grandan oran ŝlosilon de hoko sur la muro li malfermis alian pordon, kaj ili ĉiuj sekvis lin tra la pordon en la stratojn de la Smeralda Urbo.



*"La Leono manĝis iom da kaĉo."*

# Ĉapitro XI.
# La Mirinda Smeralda Urbo de OZ.





EĈ KUN OKULOJ PROTEKtataj per la verdaj okulvitroj Doroteo kaj ŝiaj amikoj estis unue iomete blindigitaj de la brilego de la mirinda Urbo. Laŭlonge de la stratoj estis belaj domoj konstruitaj el verda marmoro kaj ĉie ornamatitaj per brilantaj smeraldoj. Ili marŝis sur pavimo el la sama verda marmoro, kaj kie la blokoj kuniĝis estis densaj vicoj de smeraldoj, brilantaj pro la sunlumo. La fenestroj estis el verda vitro; eĉ la ĉielo super la Urbo estis iomete verda, kaj la sunradioj estis verdaj.

Multaj personoj — viroj, virinoj, kaj infanoj — ĉirkaŭmarŝadis, kaj ili estis verde vestitaj kaj havis verd-

etajn haŭtojn. Ili rigardis Doroteon kaj ŝian strangan grupon mirokule, kaj la infanoj ĉiuj kuris kaŝi sin malantaŭ siaj patrinoj kiam ili ekvidis la Leonon; sed neniu parolis al ili. Multaj butikoj estis apud la strato, kaj Doroteo vidis ke ĉio en ili estas verda. Verdaj dolĉaĵoj kaj verda krakmaizo estis vendataj, ankaŭ verdaj ŝuoj, verdaj ĉapeloj, kaj ĉiaspecaj verdaj vestaĵoj. Unuloke viro vendadis verdan limonadon, kaj kiam la infanoj aĉetis ĝin Doroteo rimarkis ke ili pagas ĝin per verdaj moneroj.

Ŝajne estis nek ĉevaloj nek iuspecaj bestoj; la viroj disportadis objektojn per verdaj ĉaretoj, kiujn ili antaŭenpuŝis. Ĉiu ŝajnis feliĉa kaj kontenta kaj prospera.

La Pordogardisto gvidis ilin tra la stratoj ĝis ili atingis grandan konstruaĵon, precize en la mezo de la Urbo, kiu estis la palaco de Oz, la Granda Sorĉisto. Soldato staris antaŭ la pordo, vestita per verda uniformo kaj kun longa verda barbo.

"Jen fremduloj," diris al li la Pordogardisto, "kaj ili postulas renkonti la Grandan Ozon."

"Enpaŝu," respondis la soldato, "kaj mi portos vian mesaĝon al ili."

Do ili trairis la pordojn de la Palaco kaj kondukiĝis en grandan ĉambron kun verda tapiŝo kaj belaj verdaj mebloj ornamitaj per smeraldoj. La soldato devigis ilin ĉiujn viŝi siajn piedojn per verda mato antaŭ ol eniri la ĉambron, kaj kiam ili sidiĝis li diris ĝentile,

"Bonvolu komfortigi vin dum mi iros al la pordo de



de la trono ĉambro kaj diros al Ozo ke vi ĉeestas."

Ili devis longe atendi ĝis la soldato revenis. Kiam, fine, li revenis, Doroteo demandis,

"Ĉu vi vidis Ozon?"

"Ho, ne," respondis la soldato; "mi neniam vidis lin. Sed mi parolis al li dum li sidis malantaŭ sia ekrano, kaj diris al li vian mesaĝon. Li diras ke li akceptos paroli kun vi, se vi deziras; sed ĉiu el vi devos eniri sola, kaj li akceptos nur unu el vi ĉiutage. Sekve, ĉar vi devos resti en la Palaco dum pluraj tagoj, mi kondukigos vin al ĉambroj kie vi povos esti komfortaj post via marŝado."

"Dankon," respondis la knabino; "Oz estas tre afabla."

La soldato nun blovis verdan fajfilon, kaj tuj juna knabino, vestita per bela verda silka robo, eniris la ĉambron. Ŝi havis belan verdan hararon kaj verdajn okulojn, kaj ŝi ŝi riverencis profunde antaŭ Doroteo dirante,

"Sekvu min kaj mi gvidos vin al via ĉambro."


Do Doroteo adiaŭis ĉiujn siajn

amikojn escepte de Toto, kaj preninte la hundon en siajn brakojn sekvis la verdan knabinon tra sep koridoroj kaj supren laŭ tri ŝtuparoj ĝis ili atingis ĉambron en la antaŭa parto de la Palaco. Ĝi estis kiel eble plej ĉarma malgranda ĉambro, kun mola komforta lito kiu havis tukojn el verda silko kaj verdan veluran kovroŝtofon. Fonteto estis en la centro de la ĉambro, ĝi altigis ŝprucon de verda parfumo en la aeron, kiu refalis en bele ĉizitan verdan marmoran basenon. Belaj verdaj floroj staris en la fenestroj, kaj troviĝis breto kun vico de malgrandaj verdaj libroj. Kiam Doroteo havis sufiĉan tempon por malfermi la librojn ŝi trovis ilin plenaj de kuriozaj verdaj bildoj kiuj ridigis ŝin pro sia komikeco.

En ŝranko estis multaj verdaj roboj, el silko kaj sateno kaj veluro; kaj ĉiu el ili estis precize ĝustadimensia por Doroteo.

"Sentu ke vi estas ĉehejme," diris la verda knabino, "kaj se vi deziros ion sonoru. Oz alvokos vin morgaŭ matene."

Ŝi lasis Doroteon sola kaj reiris al la aliaj. Ilin ŝi ankaŭ kondukis al ĉambroj, kaj ĉiu el ili trovis sin loĝanta en tre agrabla parto de la Palaco. Kompreneble tiu ĝentileco estis senefika rilate al la Birdotimigilo; kiam li trovis sin sola en sia ĉambro li staradis stulte sur unu loko, tuj apud la pordo, por atendi la matenon. Lin ne ripozigus kuŝado, kaj li ne povis fermi siajn okulojn; do li restis dum la tuta nokto rigardante malgrandan araneon



kiu faras sian reton en angulo de la ĉambro, kvazaŭ ĝi ne estus unu el la plej belaj ĉambroj en la mondo. La Stana Lignohakisto kuŝiĝis nur pro kutimo, ĉar li memoris sian vivon kiel karnulo; sed ĉar li ne kapablis dormi li pasigis la nokton movante siajn artikojn por certigi ke ili bone fukciadas. La Leono preferus liton el sekaj folioj en la arbaro, kaj al li ne plaĉis esti fermita en ĉambron; sed lia saĝeco ne permesis ke tio ĝenu lin, do li saltis sur la liton kaj ruliĝis kiel kato kaj ronrone tuj dormigis sin.

La sekvan matenon, post la matenmanĝo, la verda knabino venis por konduki Doroteon, kaj vestis ŝin per unu el la plej belaj roboj — el verda brokita sateno. Doroteo surmetis verdan silkan antaŭveston kaj ligis verdan rubandon ĉirkaŭ la kolon de Toto, kaj ili ekmarŝis al la Tronoĉambro de la Granda Oz.

Unue ili atingis grandan kunvenejon en kiu estis multaj virinoj kaj viroj de la kortego, vestitaj per riĉaj kostumoj. Tiuj homoj havis nenian laboron tie kaj nur konversaciadis, sed ili ĉiam atendis ekster la Tronĉambro ĉiumatene, kvankam oni neniam permesis ke ili vidu Ozon. Dum Doroteo eniris ili rigardis ŝin scivoleme, kaj unu el ili flustris,

"Ĉu vi vere rigardos la vizaĝon de Oz la Terura?"

"Kompreneble respon-



dis la knabino, "se li akceptos vidi min."

"Ho, li akceptos vidi vin," diris la soldato kiu komunikis ŝian mesaĝon al la Sorĉisto, "kvankam al li ne plaĉas ke homoj petas vidi lin. Efektive, li unue estis kolera kaj diris ke mi devas resendi vin al la loko el kie vi venis. Post tio li demandis min pri via aspekto, kaj kiam mi menciis viajn arĝentajn ŝuojn li estis tre interesata. Laste mi parolis al li pri la marko sur via frunto, kaj li decidis permesi ke vi eniru."

Ĝuste tiam sonorilo sonis, kaj la verda knabino diris al Doroteo,

"Jen la signalo. Vi devas eniri la Tronoĉambron sola."

Ŝi malfermis malgrandan pordon kaj Doroteo brave tramarŝis kaj trovis sin en mirinda loko. Ĝi estis granda, ronda ĉambro, kun alta arka plafono, kaj la muroj kaj plafono kaj planko estis kovritaj per grandaj smeraldoj dense kunlokigitaj. En la centro de la plafono estis granda lumo, same brila kiel la suno, kiu briligis la smeraldojn mirige.

Sed tio kio plej interesis Doroteon estis la granda trono el verda marmoro kiu staris en la mezo de la ĉambro. Ĝi estis havis la formon de seĝo kaj brilis pro gemoj, same kiel ĉio alia. En la centro de la seĝo estis grandega Kapo, tute sen apoganta korpo aŭ brakoj aŭ kruroj. Sur tiu kapo ne estis haroj, sed ĝi havis okulojn kaj nazon kaj buŝon, kaj ĝi estis pli granda ol la kapo de

la plej granda giganto.

Dum Doroteo rigardis tion mirante kaj timante la okuloj malrapide turniĝis kaj rigardis ŝin akre kaj senŝanceliĝe. La buŝo moviĝis kaj Doroteo aŭdis voĉon diri:

"Mi estas Oz, la Granda, la Terura. Kiu estas vi, kaj kial vi serĉas min?"

La voĉo ne estis tiom timiga kiom ŝi anticipis el la granda Kapo; do ŝi kuraĝe respondis,

"Mi estas Doroteo, la Malgranda kaj Humila. Mi venis por peti vian helpon."

La okuloj rigardis ŝin penseme dum plena minuto. Post tio diris la voĉo:

"Kie vi akiris la arĝentajn ŝuojn?"

"Mi akiris ilin de la fia Sorĉistino de la Oriento, kiam mia domo falis sur ŝin kaj mortigis ŝin," ŝi respondis.

"Kie vi akiris la markon sur via frunto?" pludiris la voĉo.

"Tie la bona Sorĉistino de la Nordo kisis min kiam ŝi adiaŭis min kaj sendis min al vi," diris la knabino.

Denove la okuloj akre rigardis ŝin, kaj vidis ke ŝi diras la veron. Post tio Oz diris,

"Kion vi volas ke mi faru?"

"Resendu min al Kansas, kie estas miaj Onklino Em kaj Onklo Henriko," ŝi respondis fervore. "Mi ne amas vian landon, kvankam ĝi ja estas tre bela. Kaj mi estas certa ke Onklino Em estas multe malkvieta pro mia tiom

longa foresto.”

La okuloj palpebrumis trifoje, kaj post tio ili turniĝis al la plafono kaj subturniĝis al la planko kaj turniĝadis tiel kurioze ke ili ŝajnis rigardi ĉiun parton de la ĉambro. Kaj fine ili denove rigardis Doroteon.

“Kial mi faru tion por vi?” demandis Oz.

“Ĉar vi estas forta kaj mi estas malforta, ĉar vi estas Granda Sorĉisto kaj mi estas nur senhelpa knabineto,” ŝi respondis.

“Sed vi estis sufiĉa forta por mortigi la fian Sorĉistinon de la Oriento,” diris Oz.

“Tio estis nur hazard,” respondis Doroteo simple; “mi ne ne povis malebligi ĝin.”

“Nu,” diris la Kapo, “mi diros al vi mian respondon. Vi ne rajtas supozi ke mi resendos vin al Kansas krom se vi estos rekompence farinta ion por mi. En ĉi tiu lando ĉiu devas pagi pro ĉio ricevita. Se vi volas ke mi uzu mian magion por resendi vin al via hejmo vi unue devos fari ion por mi. Helpu min kaj post tio mi helpos vin.”

“Kion mi devos fari?” demandis la knabino.

“Mortigu la fian Sorĉistinon de la Okcidento,” respondis Oz.

“Sed mi ne povas!” kriis Doroteo, multe surprizita.

“Vi mortigis la Sorĉistinon de la Oriento kaj vi surportas la arĝentajn ŝuojn, kiuj enhavas potencan sorĉopovon. Nun restas nur unu Fia Sorĉistino en la tuta

lando, kaj kiam vi povos diri ke ŝi estas mortinta mi resendos vin al Kansas — sed ne antaŭ tiam.”

La malgranda knabino komencis plori, ĉar ŝi tiom senesperiĝis; kaj la okuloj denove palpebrumis kaj rigardis ŝin malkviete, kvazaŭ la Granda Oz kredas ke ŝi povos helpi lin se ŝi volos.

“Neniam mi mortigis ion ajn, ne intence,” ŝi ploris; “kaj eĉ se mi volus fari tion, kiel mi povus mortigi la Fian Sorĉistinon? Se vi, kiu estas Granda kaj Terura, ne povas mem mortigi ŝin, kial vi supozas ke mi povus fari tion?”

“Mi ne scias,” diris la Kapo; “sed tio estas mia respondo, kaj ĝis la Fia Sorĉistino estos mortinta vi ne revidos viajn Onklon kaj Onklinon. Memoru ke la Sorĉistino estas Fia — ege Fia — kaj meritas esti mortigita. Nun iru, kaj ne petu revidi min antaŭ ol vi estos plenuminta vian taskon.

Malĝoje Doroteo foriris el la Tronoĉambro kaj reiris al kie la Leono kaj la Birdotimigilo kaj la Stana Lignohakisto atendas por aŭdi kion estis dirinta al ŝi Oz.

“Por mi estas nenia es-



pero," ŝi diris malgaje, "ĉar Oz ne resendos min al mia hejmo antaŭ ol mi mortigos la Fian Sorĉistinon de la Okcidento; kaj tion mi neniam povos."

Ŝiaj amikoj bedaŭris, sed ili ne povis helpi ŝin; do ŝi iris al sia ĉambro kaj kuŝiĝis sur la liton kaj endormiĝis plorante.

La sekvan matenon la soldato kun la verda barbo venis al la Birdotimigilo kaj diris,

"Venu kun mi, ĉar Oz alvokis vin."

Do la Birdotimigilo sekvis lin kaj estis permesita eniri la grandan Tronoĉambron, kie li vidis, sidanta sur la smeralda trono, plej belan damon. Ŝi estis vestita per verda silka gazo kaj sur siaj pendantaj verdaj haroj ŝi portis juvelkovritan kronon. Sur ŝiaj ŝultroj kreskis flugiloj kolorbelegaj kaj tiom senpezaj ke ili tremis kiam ajn la plej malforta aermoviĝo atingis ilin.

Kiam la Birdotimigilo klinis sin, tiom bele kiom permesis lia pajla enhavo, antaŭ tiu belulino, ŝi rigardis lin dolĉe kaj diris:

"Mi estas Oz, la Granda, la Terura. Kiu estas vi, kaj kial vi serĉas min?"

Nu, la Birdotimigilo anticipis vidi la grandan Kapon pri kiu parolis Doroteo, kaj li multe surpriziĝis; sed li respondis brave.

"Mi estas nur Birdotimigilo, plenigita per pajlo. Tial mi ne havas cerbon, kaj mi venis al vi petante ke vi metu cerbon en mian kapon por anstataŭi la pajlon, por ke mi

fariĝu tiom homa kia ĉiu alia persono en via regno."

"Kial mi faru tion por vi?" demandis la damo.

"Ĉar vi estas saĝa kaj potenca, kaj neniu alia povas helpi min," respondis la Birdotimigilo.

"Mi neniam faras komplezon sen ia rekompenco," diris Oz; "sed ĉi tion mi promesas. Se vi mortigos por mi la Fian Sorĉistinon de la Okcidento mi donos al vi abundan cerbaĵon, tiel bonan cerbaĵon ke vi estos la plej saĝa persono en la tuta Lando Oz."


"Sed mi kredis ke vi jam petis ke Doroteo mortigu la Sorĉistinon," diris la Birdotimigilo, surprizite.

"Tiel estis. Ne gravas al mi kiu mortigos ŝin. Sed antaŭ ol ŝi mortos mi ne plenumos vian peton. Nun foriru, kaj ne petu revidi min antaŭ ol vi meritos la cerbon kiun vi tiom deziras."

La Birdotimigilo reiris malĝoje al siaj amikoj kaj diris al ili kion diris Oz; kaj Doroteon surprizis aŭdi ke la granda Sorĉisto ne estas Kapo, kia kiam ŝi vidis lin, sed bela damo.

"Malgraŭ tio," diris la Birdotimigilo, "ŝi bezonas koron tiom kiom la Stana Lignohakisto."

La sekvan matenon la soldato kun la verda barbo venis al la Stana Lignohakisto kaj diris,



"Oz alvokis vin. Sekvu min."

Do la Stana Lignohakisto sekvis lin kaj atingis la grandan Tronoĉambron. Li ne sciis ĉu li trovos ke Oz estas bela damo aŭ Kapo, sed li esperis ke li estos bela damo. "Ĉar," li diris al si, "se li estos la Kapo, mi certas ke li ne donos al mi koron, ĉar kapo ne havas propran koron kaj tial ne povas senti kun mi. Sed se li estos la bela damo mi petegos koron, ĉar oni diras ke ĉiuj damoj mem estas bonkoraj."

Sed kiam la Stana Lignohakisto eniris la grandan Tronoĉambron li vidis nek la Kapon nek la Damon, ĉar Oz donis al si la formon de plej timiga Bruto. Ĝi estis preskaŭ granda kiel elefanto, kaj la verda trono ŝajnis apenaŭ sufiĉe fortika por ĝia pezo. La Bruto havis kapon kia tiu de rinocero, sed estis kvin okuloj en ĝia vizaĝo. Kvin longaj brakoj kreskis el ĝia korpo kaj ĝi ankaŭ havis kvin longajn, maldikajn krurojn. Dika, laneca hararo kovris ĉiun parton, kaj pli timigaspekta monstro ne estus imagebla. Feliĉe la Stana Lignohakisto ne havis koron tiutempe, ĉar ĝi bategus laŭte kaj rapide pro teruriĝo. Sed ĉar li estis el nur stano, la Hakisto tute ne timis, kvankam li estis multe senesperiĝinta.

"Mi estas Oz, la Granda, la Terura," parolis la Bruto, per voĉo kiu estis unusola grandega muĝo. "Kiu estas vi, kaj kial vi serĉas min?"

"Mi estas Hakisto, kaj konsistas el stano. Tial mi ne havas koron, kaj ne povas ami. Mi petas ke vi donu al mi

koron por ke mi estu kiaj la aliaj homoj."

"Kial mi faru tion?" demandis la Bruto.

"Ĉar mi petas, kaj nur vi povas plenumi mian peton," respondis la Hakisto.

Oz iomete muĝis je tio, sed diris, raŭke,

"Se vi efektive deziras koron, vi devos meriti ĝin."

"Kiel?" demandis la Hakisto.

"Helpu Doroteon mortigi la Fian Sorĉistinon de la Okcidento," respondis la Bruto. "Kiam la Sorĉistino estos morta, venu al mi, kaj mi tiam donos al vi la plej grandan kaj plej afablan kaj plej ameman koron en la tuta Lando Oz."

Do la Stana Lignohakisto devis reiri malĝoje al siaj amikoj kaj informi ilin pri la terura Bruto kiun li vidis. Ili ĉiuj miregis pro la multaj formoj kiujn donis al si la Granda Sorĉisto, kaj la Leono diris,

"Se li estos bruto kiam mi vidos lin, mi kiel eble plej laŭte muĝegos kaj tiom timigos lin ke li plenumos ĉiun mian peton. Kaj se li estos la bela damo, mi ŝajnigos salti sur ŝin, kaj tiel devigos ŝin plenumi mian peton. Kaj se li estos la granda Kapo, mi povos fari al li kion mi volos; ĉar mi rulos la Kapon tra la tuta ĉambro ĝis li promesos doni al ni kion ni deziras. Do estu bonesperaj, miaj amikoj, ĉar ja ĉio rezultos bone."



La sekvan matenon la soldato kun la verda barbo kondukis la Leonon al la granda Tronoĉambro kaj petis lin eniri al Oz.

La Leono tuj trairis la pordon, kaj ĉirkaŭrigardante li vidis, surprizate, ke antaŭ la trono estas Globo de Fajro, tiom feroca kaj arda ke li apenaŭ kuraĝis rigardi ĝin. Lia unua penso estis ke Oz akcidente ekbrulis kaj konsumiĝas; sed kiam li provis proksimiĝi, la varmego estis tiom intensa ke ĝi komencis bruligi liajn lipharojn, kaj li retrorampis tremante al pozicio pli proksima al la pordo.

Venis malalta, trankvila voĉo el la Globo de Fajro, kaj ĉi tiujn vortojn ĝi parolis:



"Mi estas Oz, la Granda kaj Terura. Kiu estas vi, kaj kial vi serĉas min?" Kaj la Leono respond-is,

"Mi estas Malkuraĝa Leono, mi timas ĉion. Mi venis al vi por peti ke vi donu al mi kuraĝon, por ke mi reale fariĝu la Reĝo de Bestoj, kiel min oni nomas."

"Kial mi donu al vi kuraĝon?" demandis Oz.

Ĉar el ĉiuj Sorĉistoj vi ests la plej granda, kaj nur vi havas kapablon plenumi mian peton,"

respondis la Leono.

La Globo de Fajro brulis feroce dum kelka tempo, kaj la voĉo diris,

"Portu al mi pruvon ke mortis la Fia Sorĉistino, kaj tuj tiam mi donos al vi kuraĝon. Sed dum vivos la Sorĉistino vi devos resti malkuraĝa."

La Leono koleris pro tiu parolo, sed li povis respondi nenion, kaj dum li staris silente rigardante la Globon de Fajro ĝi fariĝis tiom feroce varmega ke li turnis sin kaj kiel eble plej rapide kuris el la ĉambro. Li ĝoje trovis siajn amikojn atendantaj lin, kaj li informis ilin pri la timiga intervjuo kun la Sorĉisto.

"Kion ni faru nun?" demandis Doroteo malĝoje.

"Nur unu afero estas farebla," respondis la Leono, "ni devos iri al la Lando de la Palpbrumoj, elserĉi la Fian Sorĉistinon, kaj detrui ŝin."

"Sed eble ni ne povos," diris la knabino.

"Tiukaze mi neniam ricevos kuraĝon," deklaris la Leono.

"Kaj mi neniam ricevos cerbon," diris la Birdotimigilo.

"Kaj mi neniam ricevos koron," parolis la Stana Lignohakisto.

"Kaj mi neniam revidos Onklinon Emon kaj Onklon Henrikon," diris Doroteo, komencante plori.

"Atentu!" kriis la verda knabino. "La larmoj falos sur vian verdan silkan robon kaj makulos ĝin."

Do Doroteo sekigis siajn okulojn kaj diris,

“Mi supozas ke ni devos provi; sed mi nepre ne deziras mortigi, eĉ se tio helpus revidi Onklinon Emon.”


“Mi akompanos vin; sed mi estas tro malkuraĝa kaj ne povus mortigi la Sorĉistinon,” diris la Leono.

“Ankaŭ mi kuniros,” deklaris la Birdotimigilo; “sed mi ne estos granda helpo por vi, ĉar mi estas tro stulta.”

“Mi estas tro senkora por damaĝi eĉ Sorĉistinon,” komentis la Stana Lignohakisto; “sed se vi iros mi certe akompanos vin.”

Tial ili decidis komenci sian marŝon jam sekvamatene, kaj la Hakisto akrigis sian hakilon per verda ŝtono kaj ĝuste oleigis siajn artikojn. La Birdotimigilo metigis en sin freŝan pajlon kaj Doroteo metis novan farbon sur liajn okulojn por ke li povu pli bone vidi. La verda knabino, kiu estis tre afabla, plenigis la korbon de Doroteo per plaĉaj manĝaĵoj, kaj ligis sonorileton ĉirkaŭ la kolon de Toto per verda rubando.

Ili enlitiĝis tre frue kaj profunde dormis ĝis la taglumiĝo, kiam ilin vekis la kokerikado de verda koko kiu loĝis en la malantaŭa korto de la palaco, kaj la kriado de kokino kiu demetis verdan ovon.



*"La Okuloj rigardis ŝin penseme."*

# Ĉapitro XII.

# Serĉante la Fian Sorĉistinon






Tra LA STRATOJ DE LA SMEralda urbo la Soldato kun la verda barbo kondukis ilin ĝis ili atingis la ĉambron kie loĝas la Pordogardisto. Tiu oficisto malŝlosis iliajn okulvitrojn por remeti ilin en la grandan keston, kaj post tio li afable malfermis la pordegon por niaj amikoj.

"Kiu vojo iras al la Fia Sorĉistino de la Okcidento?" demandis Doroteo.

"Neniu vojo," respondis la Pordogardisto. "Neniam iu deziras iri tien."

"Kiel, do, ni trovos ŝin?" demandis la knabino.



"Estos facile," respondis la viro, "ĉar kiam ŝi sciiĝos ke vi estas en la Lando de la Palpbrumoj ŝi trovos vin, kaj sklavigos vin ĉiujn."

"Eble ne," diris la Birdotimigilo, "ĉar ni intencas detrui ŝin."

"Nu, jen io tute alia," diris la Pordogardisto. "Neniu detruis ŝin, ĝis nun, do kompreneble mi supozis ke ŝi sklavigos vin, same kiel la aliajn. Sed estu zorgoplenaj; ĉar ŝi estas fia kaj feroca, kaj eble ŝi ne permesos ke vi detruu ŝin. Iru Okcidenten, sunsubiren, kaj vi nepre trovos ŝin."



Ili dankis lin kaj adiaŭis lin, kaj turnis sin Okcidenten, marŝante trans kampojn de mola herbaro kun tie kaj tie lekantetoj kaj ranunkoloj. Doroteo plu surportis la belan silkan robon kiun ŝi surmetis en la palaco, sed nun mirigis ŝin vidi ke ĝi ne plu estas verda sed pure blanka. La rubando ĉirkaŭ la kolo de Toto ankaŭ perdis sian verdan koloron kaj estis blanka kiel la robo de Doroteo.

La Smeralda Urbo baldaŭ estis longe malantaŭ ili. Dum ili antaŭeniris la tero fariĝis iom post iom malglata kaj montetoplena, ĉar ekzistis nek farmoj nek domoj en tiu lando de la Okcidento, kaj la

tero ne estis kultivata.

Posttagmeze la suno varmege brilis sur iliajn vizaĝojn, ĉar ne ĉeestis arboj por ombrumi ilin; sekve jam antaŭ noktiĝo Doroteo kaj Toto kaj la Leono laciĝis, kaj kuŝiĝis sur la herbaro kaj endormiĝis, dum la Hakisto kaj la Birdotimigilo gardadis.

Nu, la Fia Sorĉistino de la Okcidento havis nur unu okulon, tamen tiu estis vidkapabla kiel teleskopo, kaj povis vidi ĉien. Do, dum ŝi sidis ĉe la pordo de sia kastelo, ŝi ĉirkaŭrigardis kaj vidis Doroteon dormantan, ĉirkaŭatan de siaj amikoj. Ili estis tre for, sed la Fia Sorĉistino koleris ke ili estas en ŝia regno; do ŝi blovis per arĝenta fajfilo kiu pendis de ĉeno ĉirkaŭ ŝia kolo.

Tuj kuris al ŝi el ĉiu direkto aro da grandaj vulpoj. Ili havis longajn krurojn kaj ferocajn okulojn kaj akrajn dentojn.

"Iru al tiuj uloj," diris la Sorĉistino, "kaj disŝiru ilin."

"Ĉu vi ne sklavigos ilin?" demandis la Vulpestro.

"Ne," ŝi respondis, "unu estas el stano, kaj unu el pajlo; unu estas knabino kaj alia estas Leono. Neniu el ili taŭgas por laborado, do vi rajtas ŝire dispecetigi ilin laŭvole."

"Bone," diris la vulpo, kaj li forkuris kiel eble plej rapide, sekvate de la aliaj.

Bonfortune la Birdotimigilo kaj la Hakisto estis plene vekaj kaj aŭdis la vulpojn veni.

"Jen mia batalo," diris la Stana Lignohakisto; "do restu malantaŭ mi kaj mi renkontos ilin dum ili alvenas."

Li prenis sian hakilon, kiun li jam akrigis, kaj kiam la Vulpestro venis la Stana Lignohakisto rapide movis sian brakon kaj dehakis la kapon de la vulpo de ĝia korpo, tiel ke ĝi tuj mortis. Tuj kiam li povis relevi sian hakilon alia vulpo alvenis, kaj ankaŭ ĝi falis per la akra rando de la armo de la Stana Lignohakisto. Venis kvardek vulpoj, kaj kvardekfoje po unu vulpo mortis, tiel ke fine ili ĉiuj kuŝis mortaj en amaso antaŭ la Hakisto.

Li remetis sian hakilon sur la teron kaj sidiĝis apud la Birdotimigilo, kiu diris,

"Bona batalo, amiko."

Ili atendis ĝis Doroteo vekiĝis la sekvan matenon. La malgrandan knabinon multe timigis vidi la grandan amason da vilaj vulpoj, sed la Stana Lignohak plene informis ŝin pri ĉio. al ŝi. Ŝi dankis lin pro savi ilin kaj sidiĝis por manĝi, kaj post tio ili rekomencis marŝi.



Tiun saman matenon la Fia Sorĉistino iris al la pordo de sia kastelo kaj elrigardis per sia unu okulo

povis tre malproksimen vidi. Ŝi vidis ĉiujn siajn lupojn mortaj, kaj la fremdulojn ankoraŭ marŝantaj tra ŝia lando. Tio des pli kolerigis ŝin, kaj ŝi dufoje blovis sian arĝentan fajfilon.

Tuj granda aro da sovaĝaj korvoj flugis al ŝi, sufiĉaj por senlumigi la ĉielon. Kaj la Fia Sorĉistino diris al la Korvoreĝo:

"Flugu tuj al la fremduloj; elpiku iliajn okulojn kaj disŝiru ilin."

La sovaĝaj korvoj flugis kiel unu arego cele Doroteon kaj ŝiajn akompanantojn. Kiam la malgranda knabino vidis ilin venantaj ŝi timis. Sed la Birdotimigilo diris,

"Jen mia batalo, do kuŝiĝu apud mi kaj vi ne spertos damaĝon."

Do ĉiuj kuŝis sur la tero escepte de la Birdotimigilo, kaj li staris kun la brakoj etenditaj. Kaj kiam la korvoj vidis lin ili ektimis, kiel ĉiam okazas kiam tiaj birdoj vidas birdotimigilojn, kaj ne kuraĝis pliproksimiĝi. Sed la Korvoreĝo diris,

"Estas nur pajla homo. Mi elpikos liajn okulojn."

La Korvoreĝo flugis kontraŭ la Birdotimigilon, kiu kaptis ĝin per la kapo kaj tordis ĝian kolon ĝis ĝi mortis. Kaj post tio alia korvo flugis kontraŭ lin, kaj la Birdotimigilo tordis ankaŭ ĝian kolon. Kvardek korvoj venis, kaj kvardekfoje la Birdotimigilo tordis kolon, ĝis fine ĉiuj kuŝis mortaj apud li. Post tio li vokis al siaj akompanantoj ke ili leviĝu, kaj ili rekomencis marŝi.






Kiam la Fia Sorĉistino denove elrigardis kaj vidis ĉiujn siajn korvojn kuŝantajn en amaso, ŝi furiozegis, kaj trifoje blovis sian arĝentan fajfilon.



Tuj aŭdiĝis laŭta zumado en la aero, kaj aro da nigraj abeloj venis flugante cele ŝin.


"Iru al la fremduloj kaj mortpiku ilin!" ordonis la Sorĉistino, kaj la abeloj turnis sin kaj rapide flugis ĝis la loko kie marŝadis Doroteo kaj ŝiaj amikoj. Sed la Hakisto vidis ilin venantaj kaj la Birdotimigilo jam decidis kion fari.

"Elprenu mian pajlon kaj disŝutu ĝin sur la malgrandan knabinon kaj la hundon kaj la leonon," li diris al la Hakisto, "tiel la abeloj ne povos piki ilin." Tion la Hakisto faris, kaj dum Doroteo kuŝis apud la Leono tenante Toton en siaj brakoj, la pajlo tute kovris ilin.



La abeloj venis kaj trovis pikebla nur la Hakiston, do ili flugis kontraŭ lin kaj rompis siajn pikilojn pro la stano, tute sen dolorigi la Hakiston. Kaj ĉar abeloj ne povas vivi kiam iliaj pikiloj rompiĝis, tiel finiĝis la nigraj abeloj, kaj ili kuŝis dise en densa amaso ĉirkaŭ la Hakisto, kvazaŭ amasetoj da fajnaj karberoj.

Post tio Doroteo kaj la Leono stariĝis, kaj la knabino helpis la Stanan Lignohak-



iston remeti la pajlon en la Birdotimigilon, ĝis li estis tiel bona kiel antaŭe. Do ili rekomencis sian marŝadon.

La Fia Sorĉistino tiom koleris kiam ŝi vidis siajn nigrajn abelojn en amasetoj kvazaŭ fajnaj karberoj ke ŝi bategis la teron per piedo kaj distiris sian hararon kaj forte kunbatis siajn dentojn. Post tio ŝi alvokis dekduon da siaj sklavoj, kiuj estis Palpbrumoj, kaj donis al ili akrepintajn lancojn, ordonante ke ili iru al la fremduloj kaj detruu ilin.

La Palpbrumoj ne estis kuraĝa popolo, sed ili devis obei ordonojn; do ili marŝis ĝis ili proksimiĝis al Doroteo. Tiam la Leono muĝegis kaj saltis kontraŭ ilin, kaj la kompatindaj Palpbrumoj tiom timiĝis ke ili retrokuris kiel eble plej rapide.

Kiam ili estis revenintaj al la kastelo la Fia Sorĉistino forte batis ilin per rimeno, kaj resendis ilin al ilia laboro, kaj post tio ŝi sidiĝis por pripensi kion sekve fari. Ŝi ne povis kompreni kiel fiaskis ĉiuj ŝiaj planoj por detrui la fremdulojn; sed ŝi estis potenca Sorĉistino, kiel ankaŭ fia sorĉistino, do ŝi baldaŭ faris decidon pri kion fari.

Estis, en ŝia ŝranko, Ora Ĉapo, ĉirkaŭ kiu estis cirklo da diamantoj kaj rubenoj ĉirkaŭantaj ĝin. Tiu Ora Ĉapo havis ŝorĉokapablon. Kiu ajn posedis ĝin povis trifoje alvoki la Flugantajn Simiojn, kiuj obeos ĉiun ordonon kiun la posedanto faros al ili. Sed neniu persono rajtis komandi tiujn strangajn ulojn pli ol trifoje. Jam



dufoje la Fia Sorĉistino estis uzinta la sorĉon de la Ĉapo. La unua fojo estis kiam ŝi sklavigis la Palpbrumojn por si, kaj postenigis sin kiel la regantinon de ilia lando. La Flugantaj Simioj helpis ŝin efektivigi tion. La dua fojo estis kiam ŝi batalis kontraŭ la Potencan Ozon mem, kaj forpelis lin el la Lando de la Okcidento. La Flugantaj Simioj ankaŭ helpis ŝin efektivigi tion. Nur unu fojon pli ŝi povos uzi ĉi tiun Oran Ĉapon, kaj pro tio ŝi ne volis fari tion antaŭ ol eluzi ĉiujn siajn aliajn rimedojn. Sed nun ŝiaj ferocaj vulpoj kaj ŝiaj sovaĝaj korvoj kaj ŝiaj pikantaj abeloj mortis, kaj ŝiajn sklavojn fortimigis la Malkuraĝa Leono, kaj ŝi komprenis ke ekzistas nun nur unu rimedo por detrui Doroteon kaj ŝiajn amikojn.



Do la Fia Sorĉistino prenis la Oran Ĉapon el sia ŝranko kaj metis ĝin sur sian kapkapon. Post tio, starante per nur la maldekstra piedo ŝi diris, malrapide,

"Ep-pe, pep-pe, kak-ke!"

Post tio ŝi staris per nur la dekstra piedo kaj diris,

"Hil-lo, hol-lo, hal-lo!"

Post tio ŝi staris per am-baŭ piedoj kaj ŝi laŭtavoĉe kriis,

"Ziz-zi, zuz-zi, zik!"

Nun la sorĉo komencis

funkcii. La ĉielo senlumiĝis, kaj malaltatona zuma sono estis aŭdebla en la aero. Sonis la bategado de multaj flugiloj; multaj babilado kaj ridado; kaj la suno ekaperis el la senluma ĉielo montrante la Fian Sorĉistinon ĉirkaŭatan de amaso da simioj, el kiuj ĉiu havis paron da gigantaj kaj potencaj flugiloj sur siaj ŝultroj.

Unu, multe pli granda ol la aliaj, ŝajne estis ilia estro. Li flugis apud la Sorĉistinon kaj diris,

“Vi alvokis nin la trian kaj lastan fojon. Kion vi ordonas?”

“Iru al la fremduloj kiuj estas en mia regno kaj detruu ĉiujn escepte de la Leono,” diris la Fia Sorĉistino. “Portu tiun beston al mi, ĉar mi planas jungi lin kiel ĉevalon, kaj laborigi lin.”

“Viaj ordonoj estos obeitaj,” diris la estro; kaj post tio kun tre multa babilado kaj multa bruo, la Flugantaj Simioj forflugis al la loko kie marŝas Doroteo kaj ŝiaj amikoj.



Kelkaj el la Simioj kaptis la Stanan Lignohakiston kaj portis lin tra la aero ĝis ili ili estis flugantaj super tereno dense kovrita de akraj rokoj. Tie ili faligis la povran Hakiston, kiu falis longan distancon al la rokoj, kaj tie li kuŝis tiom disbatita kaj kavetigita ke li ne povis movi sin nek ĝemi.

Aliaj el la Simioj kaptis la Birdotimigilon, kaj per siaj longaj fingroj ili eltiris la tutan pajlaĵaron el liaj vestoj kaj kapo. Ili kunrulis liajn ĉapelon kaj botojn kaj vestaĵojn kaj ĵetis ilin inter la plejsuprajn branĉojn de alta arbo.

La ceteraj Simioj ĵetis pecojn de dika ŝnurego ĉirkaŭ la Leonon kaj multfoje vindis per ili liajn korpon kaj kapon kaj krurojn, ĝis li ne kapablis mordi nek grati nek barakti iel ajn. Post tio ili levis lin kaj forflugis portante lin al la kastelo de la Sorĉistino, kie ili metis li en korteton ĉirkaŭ kiu estis alta fera barilo, tiel ke li ne povos eskapi.

Sed Doroteon ili tute ne damaĝis. Ŝi staris, kun Toto en la brakoj, rigardante la malfeliĉan sorton de siaj kamaradoj kaj pensante ke baldaŭ estos ŝia vico. La estro de la Flugantaj Simioj flugis al ŝi, etendante siajn longajn, vilajn brakojn kaj grimacegante per sia malbela vizaĝo; sed li vidis la markon de la kiso de la Bona Sorĉistino sur ŝia frunto kaj ekhaltis, kaj gestis al la aliaj ke ili ne tuŝu ŝin.

“Ni ne aŭdacu atenci ĉi knabineton,” li diris al ili,

“ĉar ŝin protektas la Potenco de Bono, kaj tio estas pli forta ol la Potenco de Malbono. Ni nur povas porti ŝin al la kastelo de la Fia Sorĉistino kaj lasi ŝin tie.”

Do, zorgoplene kaj delikate, ili levis Doroteon per siaj brakoj kaj rapide portis ŝin tra la aero ĝis ili atingis la kastelon, kie ili demetis ŝin sur la antaŭan sojlon. Post tio la estro diris al la Sorĉistino,

“Ni obeis vin laŭeble. La Stana Lignohakisto kaj la Birdotimigilo estas detruitaj; la Leono estas ligita en via korteto. La malgrandan knabinon ni ne aŭdacas damaĝi, nek la hundon kiun ŝi portas per siaj brakoj. Via rajto estri nin nun finiĝis kaj vi neniam revidos nin.”

Kaj ĉiuj Flugantaj Simioj, forte ridante kaj babilante kaj bruante, flugis en la aeron kaj baldaŭ ne plu estis videblaj.

La Fian Sorĉistinon surprizis kaj ĉagrenis vidi la markon sur la frunto de Doroteo, ĉar ŝi bone konsciis ke



nek la Flugantaj Simioj nek ŝi mem aŭdacos iel ajn damaĝi la knabinon. Ŝi rigardis la piedojn de Doroteo, kaj vidante la Arĝentajn Ŝuojn, ŝi komencis tremi pro timo, ĉar ŝi sciis pri la potenca sorĉo kiu apartenas al ili.

Unue la Sorĉistino pensis forkuri de Doroteo; sed hazarde ŝi rigardis en la okulojn de la infano kaj rimarkis kiom simpla estas la animo malantaŭ ili, kaj ke la malgranda knabino ne scias pri la granda potenco kiun provizas la Arĝentaj Ŝuoj al ŝi. Do la Fia Sorĉistino kaŝe ridis kaj pensis, "Mi ankoraŭ povas sklavigi ŝin, ĉar ŝi ne scias uzi sian potencon." Ŝi diris al Doroteo, krude kaj severe,

"Venu kun mi; kaj atentu obei kion ajn mi ordonos, ĉar se ne, mi detruos vin same kiel mi detruis la Stanan Lignohakiston kaj la Birdotimigilon."

Doroteo sekvis ŝin tra multaj el la belaj ĉambroj en la kastelo ĝis ili atingis la kuirejon, kie la Sorĉistino ordonis ke ŝi purigu la potojn kaj kuirilojn kaj balau la plankon kaj metadu lignon en la fajron.

Doroteo obeeme komencis labori, decidinte kiel eble plej diligente labori; ĉar ŝin feliĉigis ke la Fia Sorĉistino decidis ne mortigi ŝin.

Dum Doroteo diligente laboradis la Sorĉistino planis iri en la korteton kaj jungi la Malkuraĝan Leonon kiel ĉevalon; amuzos ŝin, ŝi certis, devigi lin tiri ŝian ĉaron kien ajn ŝi volos iri. Sed dum ŝi malfermis la pordon la Leono muĝegis kaj saltis kontraŭ ŝin tiom feroce

ke la Sorĉistino ektimis, kaj elkuris kaj refermis la pordon.

"Se mi ne povos jungi vin," diris la Sorĉistino al la Leono, parolante inter la bariloj de la pordo, "mi povos malsatigi vin. Vi manĝos nenion ĝis vi obeos min."

Do post tiam ŝi ne portis manĝon al la enkarcerigita Leono; sed ĉiutage ŝi venis al la pordo je la tagmezo kaj demandis,

"Ĉu vi pretas esti jungita kiel ĉevalo?"

Kaj la Leono respondis, "Ne. Se vi eniros ĉi tiun korteton mi mordos vin."

La kialo ke la Leono ne obeis la ordonon de la Sorĉistino estis ke ĉiunokte, dum la virino dormis, Doroteo portis al li manĝaĵojn el la ŝranko. Manĝinte li kuŝiĝis sur sia pajla lito, kaj Doroteo kuŝis apud li kaj apogis sian kapon per lia mola, longa kolhararo, dum ili parolis pri siaj problemoj kaj klopodis plani eskapon. Sed ili ne povis elpensi metodon eliri la kastelon, ĉar ĝin konstante gardadis la flavaj Palpbrumoj, kiuj estis sklavoj de la Fia Sorĉistino kaj timis ŝin tiom ke ili obeis ĉiun ŝian ordonon.

La knabino devis laboregi dum la tagoj, kaj ofte la Sorĉistino minacis bati ŝin per la tiu malnova ombrelo kiun ŝi ĉiam portis en sia mano. Sed, verdire, ŝi ne kuraĝis bati Doroteon, pro la marko sur ŝia frunto. La infano ne sciis tion, kaj timegis por si kaj por Toto. Unufoje la Sorĉistino batis Toton per sia ombrelo kaj la

kuraĝa hundeto kuregis al ŝi kaj mordis ŝian kruron. La Sorĉistino ne sangis pro la mordo, ĉar ŝi estis tiom fia ke la sango en ŝi jam antaŭ multaj jaroj sekiĝis.

La vivo de Doroteo fariĝis tre malfeliĉa dum ŝi konsciiĝis ke estos eĉ malpli facile reiri al Kansas kaj Onklino Em. Kelkfoje ŝi ploradis amare dum horoj, dum Toto sidis ĉe ŝiaj piedoj kaj rigardadis ŝian vizaĝon, ploretante malgaje por indiki kiom li kompatas sian mastrineton. Al Toto efektive ne gravis ĉu li estas en Kansas aŭ la Lando Oz se Doroteo estas kun li; sed li sciis ke la malgranda knabino estas malfeliĉa, kaj tio malfeliĉigis ankaŭ lin.

Nu, la Fia Sorĉistino sopiregis posedi la Arĝentajn Ŝuojn kiujn la knabino ĉiam surportis. Ŝiaj abeloj kaj ŝiaj korvoj kaj ŝiaj vulpoj kuŝis amase sekiĝante, kaj ŝi jam eluzis la potencon de la Ora Ĉapo; sed se ŝi povos akiri la Arĝentajn Ŝuojn ili donos al ŝi pli da potenco ol ĉiuj perditaĵoj. Ŝi zorge observis Doroteon, por trovi ĉu ŝi iam demetas siajn ŝuojn, planante ŝteli ilin. Sed la infano tiom fieris pri siaj belaj ŝuoj ke ŝi neniam deprenis ilin escepte de nokte kaj banante sin. La Sorĉistino multe timis la mallumon kaj ne kuraĝis eniri la ĉambron de Doroteo nokte por preni la ŝuojn, kaj ŝia timego pri akvo estis pli granda ol ŝia timo pri la mallumo, do ŝi neniam proksimiĝis dum Doroteo banis sin. Efektive, la maljuna Sorĉistino neniam tuŝis akvon, nek permesis ke akvo iel tuŝu ŝin.

Sed la fiulino estis tre ruza, kaj ŝi finfine elpensis rimedon akiri kion ŝi volas. Ŝi metis feran stangeton en la mezon de la planko de la kuirejo, kaj per sia magio nevidebligis la feron por homaj okuloj. Sekve kiam Doroteo marŝis trans la plankon ŝi stumblis pro la stangeto, ĉar ŝi ne povis vidi ĝin, kaj ŝi sterniĝis sur la plankon. Ŝi ne grave vundiĝis, sed dum la falo unu el la Arĝentaj Ŝuoj defalis, kaj antaŭ ol ŝi povis atingi ĝin la Sorĉistino forkaptis ĝin kaj metis ĝin sur sian propran maldikan piedon.

Al la fia virino multe plaĉis la sukceso de ŝia trompo, ĉar dum ŝi havos unu el la ŝuoj ŝi posedos duonon de la potenco de ilia sorĉo, kaj Doroteo ne povos uzi ĝin kontraŭ ŝin, eĉ se ŝi scius uzi ĝin.

La malgranda knabino, vidante ke ŝi perdis unu el siaj belaj ŝuoj, koleriĝis, kaj diris al la Sorĉistino,

"Redonu al mi mian ŝuon!"

"Ne!" respondis la Sorĉistino. "Nun ĝi estas mia ŝuo, ne via."

"Vi estas fiulino!" kriis Doroteo. "Vi ne rajtas forpreni de mi mian ŝuon."

"Tamen mi retenos ĝin," diris la Sorĉistino, ridante pro ŝi,



kaj iun tagon mi sukcesos forpreni de vi ankaŭ la alian ŝuon."

Tio kolerigis Doroteon tiom ke ŝi prenis la sitelon da akvo kiu staris proksime kaj verŝis ĝin sur la Sorĉistinon, malsekigante ŝin de la kapo ĝis la piedoj.

Tuj la fiulino ekkriegis pro timo, kaj, dum Doroteo mirante rigardis, la Sorĉistino komencis forŝrumpi kaj plene malestiĝi.

"Vidu kion vi faris!" ŝi kriis. "Post minuto mi estos tute degelinta!"

"Vere mi bedaŭras," diris Doroteo, kiu ja timis vidante la Sorĉistinon fandiĝi kvazaŭ bruna sukero antaŭ ŝi.

"Ĉu vi ne sciis ke akvo detruos min?" demandis la Sorĉistino, per ploranta, senespera voĉo.

"Kompreneble ke ne," respondis Doroteo. "Kiel mi scius?"

"Nu, post kelkaj minutoj mi estos plene degelinta, kaj la kastelo estos via. Mi agis fie dum mia vivo, sed mi neniam supozis ke malgranda knabino kia vi povus degeligi min kaj ĉesigi miajn fian agadon. Jen — mi finiĝas."

Dirante tion la Sorĉistino fariĝis bruna, fandita, senforma amasaĵo kaj komencis disverŝiĝi sur la puraj traboj de la planko de la kuirejo. Vidante ke efektive ŝi ja plene neniiĝis degele, Doroteo replenigis la sitelon per akvo kaj ĵetis ĝin sur la makulegon. Kaj ŝi balais ĝin tra la pordon. Preninte la Arĝentan Ŝuon, la sola restaĵo de la


maljunulino, ŝi purigis kaj sekigis ĝin per tuko, kaj remetis ĝin sur sian piedon. Kaj nun, finfine libera agi laŭvole, ŝi elkuris al la korteto por informi la Leonon ke la Fia Sorĉistino de la Okcidento finiĝis, kaj ke ili ne plu estas kaptitoj en fremda lando.





*"La simioj volvis multaj ŝnurojn ĉirkaŭ lian korpon."*

# Ĉapitro XIII.
# La savo





Tre MULTE PLAĈIS AL LA Malkuraĝa Leono aŭdi ke la Fia Sorĉistino degelis pro sitelo da akvo, kaj Doroteo tuj malŝlosis la pordon de lia karcero kaj liberigis lin. Kune ili eniris la kastelon, kie la unua ago de Doroteo estis kunvoki ĉiujn Palpbrumojn kaj informi ilin ke ili ne plu estas sklavoj.

Estis tre multa ĝojo inter la flavaj Palpbrumoj, ĉar ili devis laboregadi dum multaj jaroj por la Fia Sorĉistino, kiu ĉiam tre kruele traktis ilin. Ili feriigis tiun tagon, tiam kaj ĉiam poste, kaj pasigis la tempon festenante kaj dancante.

“Se niaj amikoj, la Birdotimigilo kaj la Stana

Lignohakisto estus kun ni," diris la Leono, "mi estus estus plene feliĉa."

"Ĉu eble ni povus savi ilin?" demandis la knabino, esperoplene.

"Ni povos provi," respondis la Leono.

Do ili alvokis la flavajn Palpbrumojn kaj demandis al ili ĉu ili helpos savi iliajn amikojn, kaj la Palpebrumoj diris ke ili volonte plej eble strebos komplezi Doroteon, kiu ja liberigis ilin. Do ŝi elektis aron da Palpbrumoj kiuj aspektis plej scioplenaj, kaj ili ĉiuj komencis serĉi. Ili marŝis dum tiu tago kaj parto de la sekva ĝis ili atingis la dis ebenaĵon kie kuŝis la Stana Lignohakisto, disbatita kaj kavetigita. Lia hakilo kuŝis apud li, sed la klingo estis rusta kaj la tenilo rompita.

La Palpbrumoj levis lin ameme per siaj brakoj, kaj reportis lin al la Flava Kastelo, dum Doroteo larmis pro la mizero de sia malnova amiko, kaj la Leono aspektis sobra kaj bedaŭroplena.

Kiam ili atingis la kastelon Doroteo diris al la Palpbrumoj,

"Ĉu estas stanistoj inter via popolo?"

"Ho, jes; kelkaj el ni estas tre bonaj stanistoj," ili diris al ŝi.

"Do venigu ilin al mi," ŝi diris. Kaj kiam la stanistoj venis, kunportante ĉiujn siajn ilojn en korbo, ŝi demandis,

"Ĉu vi povos rektigi tiujn misbataĵojn en la Stana

Lignohakisto, kaj reĝustigi la formon, kaj reluti lin kie li rompiĝis?"

La stanistoj ekzamenis la Hakiston tre zorge kaj poste respondis ke ili kredas ke ili povos ripari lin tiel ke li estos egale bonstata kiel dekomence. Do ili komencis labori en unu el la grandaj flavaj ĉambroj de la kastelo kaj laboris dum tri tagoj kaj kvar noktoj, martelante kaj tordante kaj fleksante kaj lutante kaj polurante kaj batante la krurojn kaj korpon kaj kapon de la Stana Lignohakisto, ĝis fine li regajnis sian malnovan formon, kaj liaj artikoj funkciis egale bone kiel antaŭe. Estas vere ke ili devis surmeti plurajn flikojn, sed la stanistoj bone laboris, kaj ĉar la Hakisto ne estis vantema al li tute ne ĝenis lin la flikoj.

Kiam, fine, li marŝis en la ĉambron de Doroteo kaj dankis ŝin ĉar ŝi savis lin, li tiom ĝojis ke li ploris pro ĝojo, kaj necesis ke Doroteo zorgoplene viŝu ĉiun larmon de lia vizaĝo per sia antaŭvesto, por ke liaj artikoj ne rustu. Samtempe ŝiaj propraj larmoj fluis dense kaj rapide pro la ĝojo rerenkonti sian malnovan amikon, kaj ne necesis forviŝi tiujn larmojn. Rilate al la Leono, li viŝis siajn larmojn tiom ofte per la pinto de sia vosto ke ĝi tute malsekiĝis, kaj li devis eliri en la korton kaj teni ĝin en la sunlumo ĝis ĝi sekiĝis.

"Se nur ni denove havus la Birdotimigilon kun ni," diris la Stana Lignohakisto, kiam Doroteo finis sian rakonton pri ĉio okazinta, "mi estus vere feliĉa."

"Ni devas provi trovi lin," diris la knabino.

Do ŝi vokis la Palpbrumojn por ke ili helpu ŝin, kaj ili marŝis dum tiu tuta tago kaj parto de la sekva ĝis ili atingis la altan arbon en kies branĉojn la Flugantaj Simioj estis ĵetintaj la vestojn de la Birdotimigilo.

Ĝi estis tre alta arbo, kaj la trunko estis tiom glata ke neniu povis grimpi ĝin; sed la Hakisto diris tuj,

"Mi hakos por faligi ĝin, kaj tiel ni povos atingi la vestojn de la Birdotimigilo."

Nu, dum la stanistoj laboradis por ripari la Hakiston mem, alia Palpbrumo, kiu estis oristo, faris tenilon el solida oro por la hakilo kaj fiksis ĝin al la hakilo de la Hakisto, por anstataŭi la malnovan rompitan tenilon. Aliaj poluris la klingon ĝis la rusto estis tute forigita kaj ĝi brilis kiel frotita arĝento.

Tuj post tiu diro, la Stana Lignohakisto tuj komencis haki, kaj post nelonge la arbo falis bruege, kaj la vestoj de la Birdotimigilo falis el la branĉoj kaj ruliĝis sur la teron.

Doroteo prenis ilin kaj petis la Palpbrumojn reporti ilin al la kastelo, kie ili plenigis ilin per bona, pura pajlo; kaj jen! refariĝis la Birdotimigilo, tute renovigita, ripete dankanta ilin ĉar ili savis lin.

Nun rekunigite, Doroteo kaj ŝiaj amikoj pasigis plurajn feliĉajn tagojn en la Flava Kastelo, kie ili trovis ĉion bezonatan por esti komfortaj. Sed unu tagon la knabino pensis pri Onklino Em, kaj diris,

"Ni devas reiri al Oz, kaj plenumigi lian promeson."


"Jes," diris la Hakisto, kaj fine mi ricevos mian koron."

"Kaj mi ricevos mian cerbon," diris la Birdotimigilo ĝoje.

"Kaj mi ricevos mian kuraĝon," diris la Leono penseme.

"Kaj mi reiros al Kansas," kriis Doroteo, kunfrapante la manojn. "Ho, ni ekiru al la Smeralda Urbo morgaŭ!"

Ili decidis fari tion. La sekvan tagon ili kunvokis la Palpbrumojn kaj adiaŭis ilin. La Palpbrumoj tre bedaŭris ke ili foriros, kaj ili jam tiom ekamis la Stanan Lignohakiston ke ili petegis lin resti kaj regi ilin kaj la Flavan Landon de la Okcidento. Trovinte ke ili nepre insistas foriri, la Palpbrumoj donis kaj al Toto kaj al la Leono po oran kolumon; kaj al Doroteo ili prezentis belan braceleton, inkrustitan per diamantoj; kaj al la Birtotimigilo ili



donis orkapan marŝbastonon, por helpi lin marŝadi sen stumbli; kaj al la Stana Lignohakisto ili proponis arĝentan oleujon, inkrustitan per oro kaj ornamitan per valoraj gemoj.

Ĉiu el la marŝontoj bele parolis responde al la kunvenintaj Palpbrumoj, kaj ĉiuj premis la manon de ĉiu el ili ĝis iliaj brakoj doloris.


Doroteo iris al la ŝranko de la Sorĉistino por plenigi sian korbon per manĝaĵoj por la longa marŝado, kaj tie ŝi vidis la Oran Ĉapon. Ŝi metis ĝin sur sian propran kapon kaj trovis ke ĝi estas precize ĝustegranda por ŝi. Ŝi nenion sciis pri la sorĉo de la Ora Ĉapo, sed ŝi vidis ke ĝi estas bela, do ŝi decidis surporti ĝin kaj porti sian sunkufon en la korbo.

Tiam, preparite por la marŝado, ili ekmarŝis cele la la Smeraldan Urbon; kaj la Palpbrumoj trifoje hurais kaj donis al ili multajn bonajn dezirojn kiujn ili kunportu. kun si.



*“La Stanistoj laboris dum tri tagoj kaj kvar noktoj.”*

# Ĉapitro XIV, La Flugantaj Simioj





Memoru KE ne ekzistis vojo — eĉ ne vojeto — inter la kastelo de la Fia Sorĉistino kaj la Smeralda Urbo. Kiam la kvar marŝantoj iris serĉi la Sorĉistinon ŝi vidis ilin veni, do ŝi sendis la Flugantajn Simiojn por alporti ilin al ŝi. Estis multe malpli facile trovi sian vojon tra la grandaj kampoj da lekantetoj kaj flavaj ranunkoloj ol esti portata. Ili sciis, kompreneble, ke ili devas iri rekte Orienten, direkte al la leviĝanta suno, kaj ili komencis ĝuste. Sed je la tagmezo, kiam la suno estis rekte super la kapoj, ili ne sciis kie estas la oriento kaj kie la okcidento kaj tial ili perdiĝis en la grandaj kampoj. Ili

plu marŝadis, tamen, kaj nokte la luno aperis kaj brilis hele. Do ili kuŝiĝis inter la dolĉodoraj flavaj floroj kaj profunde dormis ĝis la mateno — escepte de la Birdotimigilo kaj la Stana Lignohakisto.

La sekvan matenon la suno estis malantaŭ nubo, sed ili komencis marŝadi, kvazaŭ certaj laŭ kiu direkto ili iras.

“Se ni sufiĉe marŝos,” diris Doroteo, “ni atingos iun lokon, mi certas.”


Sed tago post tago pasis, kaj ili ankoraŭ vidis antaŭ si nur la flavajn kampojn. La Birdotimigilo komencis iom plendi.

“Certe ni perdis la vojon,” li diris, “kaj se ni ne retrovos ĝin sufiĉatempe por atingi la Smeraldan Urbon mi neniam ricevos mian cerbon.”

“Nek mi mian koron,” deklaris la Stana Lignohakisto. “Ŝajnas al mi ke mi apenaŭ povas atendi atingi Ozon, kaj nepre vi konfesus ke ni marŝas tre longe.”

“Komprenu,” diris la Malkuraĝa Leono, kun ploreta sono, “ mi ne kuraĝas eterne marŝadi kaj neniam atingi iun ajn lokon.”

Kaj Doroteo perdis esperon. Ŝi sidiĝis sur la herbaro kaj rigardis siajn akompanantojn, kaj ili sidiĝis kaj rigardis ŝin, kaj Toto trovis unuafoje en sia vivo ke li tro lacas por ĉasi papilion kiu preterflugis lian kapon; do li elpuŝis sian langon kaj anhelegis kaj rigardis Doroteon kvazaŭ demandante kion ili nun faru.



"Eble ni alvoku la Kampomusojn," ŝi proponis. "Verŝajne ili povos diri al ni la vojon al la Smeralda Urbo."

"Certe ili povos," kriis la Birdotimigilo; "kial ni ne elpensis tion jam antaŭ nun?"

Doroteo blovis la malgrandan fajfilon kiun ŝi ĉiam portis ĉirkaŭ la kolo ekde kiam la Reĝino de la Musoj donis ĝin al ŝi. Post kelkaj minutoj ili aŭdis la klakadon de piedetoj, kaj multaj el la malgrandaj grizaj musoj venis kurante al ŝi. Inter ili estis la Reĝino mem, kiu demandis, per sia alta voĉeto,

"Kion mi povas fari por miaj amikoj?"

"Ni perdis la vojon," diris Doroteo. "Ĉu vi povas diri al ni kie estas la Smeralda Urbo?"

"Certe," respondis la Reĝino; "sed ĝi estas multedistanca, ĉar vi ĝis nun ĉiam tenis ĝin malantaŭ vi." Ŝi ekrimarkis la Oran Ĉapon de Doroteo, kaj diris, "Kial ne uzi la sorĉon



de la Ĉapo kaj alvoki la Flugantajn Simiojn al vi? Ili portos vin al la Urbo de Oz en malpli ol horo."

"Mi ne sciis ke estas sorĉo," respondis Doroteo surprizite. "Kio ĝi estas?"

"Ĝi estas skribita interne de la Ora Ĉapo," respondis la Reĝino de la Musoj; "sed se vi alvokos la Flugantajn Simiojn ni nepre forkuru, ĉar ili estas tre petolemaj kaj ilin multe amuzas ĉasi nin."

"Ĉu ili do damaĝos min?" demandis la knabino timoplene.

"Ho, ne; ili devas obei la portanton de la Ĉapo. Adiaŭ!" Kaj ŝi forkuris, kaj ĉiuj musoj hastis sekvi ŝin.

Doroteo rigardis la internon de la Ora Ĉapo kaj vidis kelkajn vortojn skribitajn sur la tegaĵo. Ili sendube, ŝi pensis, estas la sorĉo, do ŝi legis la instrukciojn zorge kaj metis la Ĉapon sur sian kapon.

"Ep-pe, pep-pe, kak-ke!" ŝi diris, starante per nur la maldekstra piedo.

"Kion vi diris?" demandis la Birdotimigilo, kiu ne sciis kion ŝi faras.

"Hil-lo, hol-lo, hal-lo!" ŝi pludiris starante, per nur la dekstra piedo.

"Ha lo!" respondis la Stana Lignohakisto, trankvile.

"Ziz-zi, zuz-zi, zik!" diris Doroteo, kiu nun staris per ambaŭ piedoj. Per tio la sorĉo estis plene dirita, kaj ili aŭdis laŭtan babiladon kaj batadon de flugiloj, dum la bando de Flugantaj Simioj flugis al ili. La Reĝo klinis sin

malalten antaŭ Doroteo, kaj demandis,

"Kion vi ordonas?"

"Ni volas iri al la Smeralda Urbo," diris la infano, "kaj ni perdis la vojon."

"Ni portos vin," respondis la Reĝo, kaj tuj kiam li parolis du el la Simioj prenis Doroteon per siaj brakoj kaj forflugis kun ŝi. Aliaj prenis la Birdotimigilon kaj la Hakiston kaj la Leonon, kaj unu malgranda Simio kaptis Toton kaj fluge sekvis ilin, kvankam la hundo strebis mordi lin.

La Birdotimigilo kaj la Stana Lignohakisto unue multe timis, ĉar ili memoris kiom mistraktis ilin antaŭe la Flugantaj Simioj; sed ili vidis ke neniu damaĝo estas intencata, do ili rajdis tra la aero tute feliĉe, kaj multe ĝuis rigardi la belajn ĝardenojn kaj arbarojn tre distance sube.

Doroteo trovis sin rajdanta facile inter du el la plej grandaj Simioj, unu el ili estis la Reĝo mem. Ili estis formintaj seĝon per siaj manoj kaj ili tre zorgis ne damaĝi ŝin.

"Kial vi devas obei la sorĉon de la Ora Ĉapo?" ŝi demandis.

"La rakonto estas longa," respondis la Reĝo, kun rido; "sed ĉar ni devos longe flugi estos distre rakonti al vi pri ĝi, se vi deziras."

"Mi volonte aŭskultos," ŝi respondis.

"Iam," komencis la estro, "ni estis libera popolo,

loĝanta feliĉe en la granda arbaro, flugante de arbo al arbo, manĝante nuksojn kaj fruktojn, kaj agante laŭvole sen nomi iun ajn mastro. Eble kelkaj el ni estis iom tro petolemaj kelkfoje, flugante malalten por tiri la vostojn de senflugilaj bestoj, ĉasante birdojn, kaj ĵetante nuksojn je la homoj marŝantaj en la arbaro. Sed ni estis sen zorgoj kaj feliĉaj kaj amuzoplenaj, kaj ĝuis ĉiun minuton de la tago. Tio okazis antaŭ multaj jaroj, longe antaŭ ol Oz venis el la nuboj por regi ĉi tiun landon.


“Ĉi tie vivis tiam, en la malproksima Nordo, bela princino, kiu estis ankaŭ potenca sorĉistino. Ŝi uzis sian magion nur por helpi la popolon, kaj laŭraporte ŝi neniam damaĝis iun ajn bonan personon. Ŝi nomiĝis Gajelet, kaj ŝi loĝis en bela palaco konstruita el grandaj rubenaj blokoj. Ĉiu amis ŝin, sed ŝin plej malĝojigis ke ŝi ne povis trovi amaton, ĉar la viroj estis ĉiuj tro stultaj kaj malbelaj kaj ne taŭgis por esti edzo de tiom bela kaj saĝa persono. Fine, tamen, ŝi trovis knabon kaj belan kaj kuraĝan kaj nekutime saĝan. Gajelet decidis ke kiam li fariĝos viro ŝi edzigos lin, do ŝi prenis lin al sia rubena palaco kaj uzis sian magion por fortigi kaj bonigi kaj beligi lin kiom povus virino deziri. Kiam li maturiĝis, Kelala, tiel li nomiĝis, laŭdire estis la plej bona kaj plej saĝa viro en la tuta lando, kaj lia vira beleco estis tiom granda ke Gajelet amegis lin, kaj ŝi rapidis pretigi ĉion por la geeziĝo.

“Mia avo estis tiutempe la Reĝo de la Flugantaj

Simioj kiuj loĝis en la arbaro proksime al la palaco de Gajelet, kaj la maljunulo amis ŝercojn pli ol bonan manĝon. Unu tagon, tuj antaŭ la geedziĝo, mia avo flugadis kun sia bando kaj vidis Kelalan marŝantan apud la rivero. Li estis vestita per riĉa kostumo el palruĝa silko kaj purpura veluro, kaj mia avo decidis petoladi. Je lia ordono la bando malsupren flugis kaj kaptis Kelalan, portis lin per siaj brakoj ĝis ili estis is super la mezo de la rivero, kaj faligis lin en la akvon.

"Elnaĝu, bela knabo," kriis mia avo, "konstatu ĉu la akvo makulis viajn vestojn!" Kelala estis tro saĝa por ne naĝi, kaj li tute ne estis tro dolortita de sia bona fortuno. Li ridis, kiam li revenis al la supro de la akvo, kaj naĝis al la bordo. Sed kiam Gajelet kuris al li ŝi trovis ke liaj silkaĵoj kaj veluraĵoj estis tute ruinigitaj de la rivero.

"La princino tre koleris, kaj ŝi sciis, kompreneble, kiuj kulpis. Ŝi venigis ĉiujn Flugantajn Simiojn antaŭ sin, kaj ŝi diris unue ke iliaj flugiloj estu kunligitaj kaj ke ili estus traktitaj kiel ili traktis Kelalan, ili estus faligitaj en la riveron. Sed mia avo forte pledis, ĉar li sciis ke la Simioj dronos en la rivero se la flugiloj estos ligitaj; kaj Kelala ankaŭ afable parolis favore pri ili; do Gajelet fine nuligis la punon, kondiĉe ke la Flugantaj Simioj por ĉiam plenumu trifoje la ordonojn de la posedanto de la Ora Ĉapo. Tiu Ĉapo estis farita kiel edziĝa donaco al Kelala, kaj laŭdire ĝi kostis al la prin-



cino duonon de ŝia regno. Kompreneble mia avo kaj ĉiuj aliaj Simioj tuj akceptis la postulon, kaj tial ni estas trifoje sklavoj de la posedantoj de la Ora Ĉapo, negrave kiu estas tiu posedanto."

"Kaj kio okazis al ili?" demandis Doroteo, kiun tre interesis la rakonto.

"Ĉar Kelala estis la unua posedanto de la Ora Ĉapo," respondis la Simio, "li la unua faris al ni siajn ordonojn. Ĉar lia novedzino ne toleris vidi nin, li vokis nin ĉiujn al si en la arbaro post la geedziĝo kaj ordonis ke ni ĉiam restu kie ŝi neniam revidos Flugantan Simion, kaj ni volonte obeis lin, ĉar ni ĉiuj timis ŝin."

"Neniun alian taskon ni devis fari ĝis la Oran Ĉapon akiris la manoj de la Fia Sorĉistino de la Okcidento, kiu devigis nin sklavigi la Palpbrumojn, kaj poste peli Ozon mem el la Lando de la Okcidento. Nun la Ora Ĉapo apartenas al vi, kaj trifoje vi rajtas ordoni nin."

Dum la Simireĝo finis sian rakonton Doroteo malsuprenrigardis kaj vidis la verdajn, brilantajn murojn de la Smeralda Urbo antaŭ ili. Ŝi miris pro la rapida flugo de la Simioj, sed al ŝi plaĉis ke la flugo finiĝis. La strangaj bestoj zorge metis la veturintojn antaŭ la pordegon de la Urbo, la Reĝo klinis sin malalten antaŭ Doroteo, kaj post tio li forflugis rapide, sekvate de sia tuta bando.

"Ni tre bone veturis," diris la malgranda knabino.

"Jes, kaj ni trovis tre rapidan vojon el niaj problemoj," respondis la Leono. "Kiom bonfortune estis ke vi

kunportis tiun mirindan Ĉapon!"





*La Simioj kaptis Doroteon per siaj brakoj kaj forflugis kun ŝi."*

# Ĉapitro XV.
# Ili malmaskas Ozon, la Tervran.





Tiam la kvar veturintoj marŝis al la granda pordego de la Smeralda Urbo kaj sonigis la sonorilon. Post plurobla sonigado ĝin malfermis la sama Pordogardisto kiun ili antaŭe renkontis.

"Kion! Ĉu vi revenis?" li demandis, surprizite.

"Ĉu vi ne vidas nin?" demandis la Birdotimigilo.

"Sed mi supozis ke vi intencis viziti la Fian Sorĉistinon de la Okcidento."

"Ni ja vizitis ŝin," diris la Birdotimigilo.

"Kaj ŝi lasis vin foriri?" demandis la viro, miroplene.

"Ŝi ne povis malpermesi, ĉar ŝi estas degeligita,"

klarigis la Birdotimigilo.

"Degeligita! Nu, jen tre plaĉa informo," diris la viro. "Kiu degeligis ŝin?"

"Doroteo," diris la Leono solene.

"Mirige!" krietis la viro, kaj li klinis sin vere tre malalten antaŭ ŝi.

Post tio li kondukis ilin en sian malgrandan ĉambron kaj prenis la okulvitrojn el la granda kesto, metis ilin sur iliajn okulojn, kaj ŝlosis ilin, same kiel antaŭe. Poste ili trairis la pordon en la Smeraldan Urbon, kaj kiam la popolo sciiĝis per la Pordogardisto ke ili degeligis la Fian Sorĉistinon de la Okcidento ili ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la veturintojn kaj sekvis ilin en granda amaso al la Palaco de Oz.

La Soldato kun la Verdaj Lipharoj ankoraŭ gardis la pordon, sed li tuj enlasis ilin, kaj ilin denove renkontis la bela verda knabino, kiu tuj kondukis ĉiun el ili al ties antaŭa ĉambro, por ke ili ripozu ĝis la Potenca Oz pretos akcepti ilin.

La Soldato komunikigis la informon rekte al Oz ke Doroteo kaj la aliaj veturintoj revenis, detruinte la Fian Sorĉistinon; sed Oz ne respondis. Ili supozis ke la Potenca Sorĉisto tuj akceptos ilin, sed tio ne okazis. Ili ricevis neniun komunikon de li la sekvan tagon, nek la postsekvan, nek la postpostsekvan. La atendado estis enuiga kaj teda, kaj fine ilin ĉagrenis ke Oz tiel mistraktas ilin, post sia postulo kiu suferigis kaj sklavigis ilin.

Do la Birdotimigilo fine petis ke la verda knabino portu novan komunikon al Oz, dirante ke se li ne tuj permesos ke ili eniru li alvokos la Flugantajn Simiojn por helpi ilin, kaj trovi ĉu aŭ ne li plenumos sian promeson. Kiam la Sorĉisto aŭdis tiun komunikaĵon li timegis kaj sendis ordonon ke ili venu al la Tronĉambro je kvar minutoj post la naŭa horo la sekvan matenon. Li unufoje renkontis la Flugantajn Simiojn en la Lando de la Okcidento, kaj li ne volis rerenkonti ilin.

La kvar veturintoj maldormis tiunokte, ĉar ĉiu pripensis la donacon kiun Oz laŭ sia promeso donos. Doroteo endormiĝis nur unufoje, kaj sonĝis ke ŝi estas en Kansas, kie Onklino Em diras al ŝi sian ĝojon ke la knabineto denove estas hejme.

Akurate je la naŭa horo la sekvan matenon la verdliphara soldato renkontis ilin, kaj post kvar minutoj ili ĉiuj eniris la Tronĉambron de la Potenca Oz.

Kompreneble ĉiu el ili anticipis vidi la Sorĉiston en la formo kiun li antaŭe havis, kaj ĉiun multe surprizis kiam ili ĉirkaŭrigardis kaj vidis tute neniun en la ĉambro. Ili restis proksime al la pordo kaj eĉ pli proksime unu al la alia, ĉar la silento en la malplena ĉambro timigis pli ol ĉiu formo de Oz kiun ili antaŭe vidis.

Baldaŭ ili aŭdis Voĉon, kiu ŝajnis veni el loko ie proksima al la supro de la granda kupolo, kaj ĝi diris, solene.

"Mi estas Oz, la Granda kaj la Terura. Kial vi



serĉas min?"

Ili rerigardis al ĉiu parto de la ĉambro, kaj, vidinte neniun, Doroteo diris,

"Kie vi estas?"

"Mi estas ĉie," respondis la Voĉo, "sed por la okuloj de ordinaraj mortemuloj mi estas nevidebla. Mi nun sidiĝos sur mian tronon, por ke vi konversaciu kun mi." Vere, la Voĉo ŝajnis ĝuste tiam soni rekte el la trono mem; do ili marŝis tien kaj staris en vico dum Doroteo diris:

"Oz, ni venis por peti la plenumiĝon de la promeso."

"De kiu promeso?" demandis Oz.

"Vi promesis resendi min al Kansas kiam la Fia Sorĉistino estos detruita," diris la knabino.

"Kaj vi promesis doni al mi cerbon," diris la Birdotimigilo.

"Kaj vi promesis doni al mi koron," diris la Stana Lignohakisto.

"Kaj vi promesis doni al mi kuraĝon," diris la Malkuraĝa Leono.

"Ĉu la Fia Sorĉistino vere estas detruita?" demandis la Voĉo, kaj Doroteo kredis ke ĝi iomete tremas.

"Jes," ŝi respondis, "mi degeligis ŝin per sitelo da akvo."

"Nu!" diris la Voĉo, "tio okazis subite! Nu, revenu al mi morgaŭ, ĉar mi bezonas tempon por pripensi la

aferon."

"Vi jam havis multan tempon," diris la Stana Lignohakisto, kolere.

"Ni rifuzas atendi eĉ unu tagon pli," diris la Birdotimigilo.

"Plenumu viajn promesojn!" krietis Doroteo.

La Leono opiniis ke taŭgos timigi la Sorĉiston, do li laŭte muĝis plenvoĉe, kaj tiu feroca sono tiom teruris Toton ke li forsaltis alarmite kaj frapegis la ekranon kiu staris en angulo. Dum ĝi brue falis ili rigardis tien, kaj la sekvan momenton ĉiu el ili vere miris. Ĉar ili vidis, staranta en precize tiu loko kiun la ekrano antaŭe kaŝis, malgrandan maljunulon, kun kalva kapo kaj sulketoplena vizaĝo, kiu ŝajne estis egale surprizita kiel ili. La Stana Lignohakisto, levinte sian hakilon, kuris al la vireto kaj kriis,

"Kiu vi estas?"

"Mi estas Oz, la Granda kaj Terura," diris la vireto, per tremoplena voĉo, "sed ne batu min — mi petegas! — kaj mi faros kion ajn vi volos."

Niaj amikoj rigardis lin surprizite kaj ĉagrenite.



Mi kredis ke Oz estas granda Kapo," diris Doroteo.

"Kaj mi kredis ke Oz estas bela Damo," diris la Birdotimigilo.

"Kaj mi kredis ke Oz estas terura Besto," diris la Stana Lignohakisto.

"Kaj mi kredis ke Oz estas Globo de Fajro," kriis la Leono.

"Ne; vi ĉiuj eraris," diris la malgranda viro humile. "Mi nur ŝajnigis tion."

"Ŝajnigis!" kriis Doroteo. "Ĉu vi ne estas granda Sorĉisto?"

"Ĉit, karulino," li diris; "ne tiom laŭte parolu, ĉar oni aŭdos vin—kaj mi estus ruinita. Oni supozas ke mi estas Granda Sorĉisto."

"Sed vi ja estas, ĉu ne?"

"Tute ne, karulino; mi estas nur ordinara homo."

"Eĉ pli," diris la Birdotimigilo, per doloroplena voĉo, "vi estas ĉarlatano."

"Ĝuste tiel!" deklaris la malgranda viro, kunfrotante siajn manojn kvazaŭ la akuzo plaĉis al li; "Mi estas ĉarlatano."

"Sed ve!" diris la Stana Lignohakisto, "do kiel mi akiros mian koron?"

"Kaj mi mian kuraĝon?" demandis la Leono.

"Kaj mi mian cerbon?" ploris la Birdotimigilo, viŝante la larmojn el siaj okuloj per la maniko de sia jako.

"Miaj karaj amikoj," diris Oz, "bonvolu ne paroli pri tiaj malgravaĵoj. Konsideru min, kaj mian malfeliĉan situacion pro mia malmaskiĝo."

"Ĉu neniu alia scias pri via ĉarlataneco?" demandis Doroteo.

"Neniu scias, escepte de vi kvar—kaj mi mem," respondis Oz. "Mi trompis ĉiun dum tiom da tempo ke mi supozis ke oni neniam sciiĝos. Mi eraregis kiam mi decidis permesi ke vi eniru la Tronoĉambron. Kutime mi rifuzas vidi eĉ miajn regatojn, kaj tial ili kredas min terura."

"Sed, mi ne komprenas," diris Doroteo, konfuzite. "Kiel vi povis aspekti granda Kapo al mi?"

"Tio estis nur trompo," respondis Oz. "Bonvolu sekvi min, kaj mi klarigos ĉion al vi."

Li kondukis ilin en malgrandan ĉambron malantaŭ la Tronoĉambro, kaj ili ĉiuj sekvis lin. Li gestis al unu angulo, en kiu kuŝis la Granda Kapo, fabrikita el multaj tavoloj de papero, kaj kun zorge surpentrita vizaĝo.

"Mi pendigis tion de la plafono per drato," diris Oz; Doroteo.

"Sed kion pri la voĉo?" ŝi demandis.

"Nu, mi estas ventroparolisto," diris la vireto, "kaj mi povas ĵeti la sonon de mia voĉo al kiu ajn loko laŭvole; tial vi kredis ke ĝi venas el la Kapo. Jen la aliaj aferoj kiujn mi uzis por trompi vin." Li montris al la Birdotimigilo la robon kaj la maskon kiujn li surhavis kiam

li aspektis bela Damo, kaj la Stana Lignohakisto vidis ke la terura Besto estis nur aro da haŭtoj kunkudritaj, kun lignaĵoj kiuj elpremis la flankojn. Kaj la Globo de Fajro, nu la Pseŭdosorĉisto ankaŭ pendigis tion de la plafono. Efektive ĝi estis globo de kotono, sed kiam oleo estis surverŝita la globo brulis feroce.

"Vere," diris la Birdotimigilo, "vi hontu ke vi estas tia ĉarlatano."

"Mi hontas — nepre mi hontas," respondis la malgranda viro malgaje; "sed mi povis fari nenion alian. Bonvolu sidiĝi, troviĝas multaj seĝoj; kaj mi rakontos al vi mian historion."

Do ili sidiĝis kaj aŭskultis dum li rakontis ĉi tiel:

"Mi naskiĝis en Omaha —"

"Sed, tio estas ne malproksime de Kansas!" kriis Doroteo, ekscitite.

"Vi pravas; sed pli malproksime de ĉi tie," li diris, malgaje skuante sian kapon je ŝi. "Kiam mi plenkreskis mi fariĝis ventroparolisto, kaj trejnis min tre lerta majstro. Mi povas imiti ĉian birdon kaj beston." Li miaŭis tiel precize kiel katido ke Toton ekatentis kaj ekrigardis ĉiudirekten por trovi kie ŝi estas. "Post iom da tempo," pludiris Oz, "tio tedis min, do mi fariĝis balonisto."

"Kio estas tio?" demandis Doroteo.

"Persono kiu supreniras en balono ĉe cirko, por instigi homojn alveni kaj pagi por vidi la cirkon," li klarigis.



"Ho," ŝi diris; "mi scias."

"Nu, unu tagon mi supreniris en balono kaj la ŝnuroj interimplikiĝis tiel ke mi ne povis malsupreniri. Ĝi flugis super la nubojn, tiom alten ke aerfluo kaptis ĝin kaj forportis ĝin multajn, multajn kilometrojn. Dum tago kaj nokto mi veturis tra la aero, kaj je la mateno de la dua tago mi vekiĝis kaj trovis ke la balono flosas super nekonata bela lando.

"Ĝi surteriĝis iom post iom, kaj mi tute ne suferis pro ĝi. Sed mi trovis min inter fremda popolo, kiu, vidinte min veni el la nuboj, kredis ke mi estas granda Sorĉisto. Kompreneble, mi lasis ke ili kredu tion, ĉar ili timis min, kaj promesis fari kion ajn mi volas."

"Simple por amuzi min, kaj doni okupatecon al tiuj bonuloj, mi ordonis ke ili konstruu ĉi tiun Urbon, kaj mian palacon; kaj ili faris ĉion volonte kaj bone. Kaj mi ekpensis, ĉar la lando estis tiel verda kaj bela, ke mi nomos ĝin la Smeralda Urbo, kaj por ke la nomo pli bone taŭgu mi metis verdajn okulvitrojn sur ĉiujn personojn, tiel ke ili vidis ĉion verda."

"Sed ĉu ne estas ĉio ĉi tie verda?" demandis Doroteo.

"Ne pli ol en ĉiu alia urbo," respondis Oz; "sed kiam vi surhavas verdajn okulvitrojn, nu kompreneble ĉio vidata aspektas verda. La Smeralda Urbo estis konstruita



antaŭ tre multaj jaroj, ĉar mi estis junulo kiam la balono portis min ĉi tien, kaj mi estas tre maljuna viro nun. Sed mia popolo surportas verdajn okulvitrojn sur la okuloj de tiom longe ke la plej multaj el ili kredas ke ĝi vere estas Smeralda Urbo, kaj certe ĝi ja estas bela loko, abundas juveloj kaj valoraj metaloj, kaj ĉio bona por feliĉigi onin. Mi ame regas la popolon, kaj ili amas min; sed ekde kiam ĉi tiu Palaco estis konstruita mi enfermas min kaj rifuzis vidi iun ajn el ili.

"Unu el miaj plej grandaj timoj estis pro la Sorĉistinoj, ĉar kvankam mi mem havas tute nenian magian potencon mi baldaŭ trovis ke la Sorĉistinoj vere kapablas fari mirindaĵojn. Kvar Sorĉistinoj ekzistis en ĉi tiu lando, kaj ili regis la popolojn kiuj loĝas en la Nordo kaj Sudo kaj Oriento kaj Okcidento. Feliĉe, la Sorĉistinoj de la Nordo kaj Sudo estis bonaj, kaj mi sciis ke ili ne damaĝos min; sed la Sorĉistinoj de la Oriento kaj Okcidento estis terure fiaj, kaj se ili ne kredus ke mi estas pli potenca ol ili, ili certe detruus min. Do mi vivis konstante timante ilin dum multaj jaroj; do vi povas kompreni kiom mi ĝojis kiam mi informiĝis ke via domo falis sur la Fian Sorĉistinon de la Oriento. Kiam vi venis al mi mi volonte promesus ĉion ajn por ke vi neniigu la alian Sorĉistinon; sed mi devas honte diri ke nun, post ŝia degelo, mi ne povas plenumi miajn promesojn."

"Laŭ mia opinio vi estas tre malbona persono," diris Doroteo.

"Ho ne, karulino; mi estas tre bona persono; sed mi konfesas ke mi estas tre malkompetenta Sorĉisto."

"Ĉu vi ne povas doni al mi cerbon?" demandis la Birdotimigilo.

"Vi ne bezonas ĝin. Vi lernas ion novan ĉiutage. Bebo havas cerbon, sed ĝi malmulton scias. Nur sperto donas scion, kaj ju pli longe vi vivos, des pli multe vi nepre spertos."

"Eble," diris la Birdotimigilo, "sed mi restos tre malfeliĉa se vi ne donos al mi cerbon."

La falsa sorĉisto atente rigardis lin.

"Nu, li diris, ĝemante, "mi ne estas lerta magiisto, kiel mi diris; sed se vi vens al mi morgaŭ matene, mi plenigos vian kapon per cerbo. Tamen mi ne povas instrui vin uzi ĝin; vi devos mem eltrovi tion."

"Ho, dankon—dankon!" kriis la Birdotimigilo. Mi eltrovos metodon uzi ĝin, tute certe!"

"Sed kion pri mia kuraĝo?" demandis la Leono maltrankvile.

"Vi havas multan kuraĝon, mi certas," respondis Oz. "Vi nur bezonas memfidon. Ekzistas neniu vivanto kiu ne timas kiam ĉeestas danĝero. Vera kuraĝo signifas fronti danĝeron kiam oni timas, kaj tian kuraĝon vi jam havas



abunde."

Eble, tamen malgraŭe mi timas," diris la Leono. "Mi estos tre malfeliĉa krom se vi ne donos al mi tian kuraĝon kiu forgesigas pri timo."



"Nu, bone; mi donos al vi tian kuraĝon morgaŭ," respondis Oz.

"Kion pri mia koro?" demandis la Stana Lignohakisto.


"Nu, rilate al tio," respondis Oz, "laŭ mi vi malpravas pro via deziro havi koron. Koro plejofte malfeliĉigas. Plej bone estus ke vi komprenu ke al vi tre bonsorte mankas koro."

"Pri tio vi kaj mi malsimile opinias," diris la Stana Lignohakisto. "Laŭ mia prefero, mi akceptos ĉian malfeliĉfeliĉon senproteste, se vi donos al mi koron."

"Bone," respondis Oz humile. "Venu al mi morgaŭ kaj vi ricevos koron. Mi ludis esti Sorĉisto dum tiom da jaroj ke mi povos iomete pli ludi."


"Kaj nun," diris Doroteo, "kiel mi reiros al Kansas?"

"Ni devos pripensi tion," respondis la malgranda viro. "Lasu min konsideri la problemon dum du aŭ tri tagoj kaj mi klopodos elpensi manieron transporti vin super la dezerton. Intertempe vi estos miaj bonvenaj gastoj, kaj dum vi loĝos en la Palaco



mia popolo servos vin kaj plenumos vian eĉ plej malgrandan deziron. Nur unu aferon mi petas rekompence pro mia helpo — tia, kia ĝi estas. Vi devos respekti mian sekreton kaj diri al neniu ke mi estas ĉarlatano."

Ili konsentis diri nenion pri tio kion ili estis trovintaj, kaj reiris al siaj ĉambroj tre gaje. Eĉ Doroteo havis esperon ke "La Granda kaj Terura Ĉarlatano", tiel ŝi nomis lin, trovos metodon resendi ŝin al Kansas, kaj se li faros tion ŝi volonte pardonos al li ĉion.





*"Ĝuste tiel! Mi estas ĉarlatano."*

# Ĉapitro XVI.
# La magia arto de la Granda Ĉarlatano.





NV LA SEKVAN MATENON la Birdotimigilo diris al siaj amikoj:

“Gratulu min. Mi finfine ricevos mian cerbon de Oz. Kiam mi revenos mi estos kiaj estas aliaj homoj.”

“Mi ĉiam ŝatis vin kia vi estas,” diris Doroteo simple.

“Vi afablas ŝatante Birdotimigilon,” li respondis. “Sed certe vi pli alte estimos min kiam vi aŭdos la belegajn pensojn kiujn produktos mia nova cerbo.” La Birdotimigilo diris adiaŭ al ili per feliĉa voĉo kaj iris al la Tronoĉambro, kie li frapis sur la pordon.

“Envenu,” diris Oz.

La Birdotimigilo eniris kaj trovis la malgrandan viron sidanta apud la fenestro, profunde pensanta.

“Mi venis por mia cerbo,” komentis la Birdotimigilo, iom malkviete.

“Ho, jes, sidiĝu en tiu seĝo, mi petas,” respondis Oz. “Mi bezonas forpreni vian kapon, bonvolu pardoni, sed tio estas necesa por povi meti vian cerbon en la ĝustan lokon.”

“Nepardonpetinde,” diris la Birdotimigilo. “Volonte vi deprenu mian kapon, se ĝi estos pli bona kiam vi resurmetos ĝin.”

Do la Sorĉisto malfiksis lian kapon kaj elprenis la pajlon. Post tio li eniris la malantaŭan ĉambron kaj prenis malgrandan ceramikan poteton da brano, en kiun li metis ankaŭ pinglojn kaj kudrilojn. Forte skuinte ĝin, li metis ĝin en la supron de la kapo de la Birdotimigilo kaj plenigis la vakan spacon per pajlo, por firme teni ĝin. Kiam li finis refiksi la kapon de la Birdotimigilo sur lian kapon li diris al li,

“Ekde nun vi estos vere pensamanta homo, ĉar mi donis al vi cerbamikan menson.”

La Birdotimigilo estis kaj plaĉita kaj fiera pro la plenumiĝo de lia plej granda deziro, kaj varme dankinte Ozon li reiris al siaj amikoj.

Doroteo rigardis lin scivole. Lia kapo ŝvelis pro la cerbo.

“Kiel vi vin sentas?” ŝi demandis.

"Tre saĝa, efektive" li respondis fervore. "Kiam mi kutimiĝos al mia cerbo mi scios ĉion."

"Kial tiuj kudriloj kaj pingloj elpuŝas sin tra la flankon de via kapo?" demandis la Stana Lignohakisto.

"Tio pruvas ke lia menso estas akra," komentis la Leono.

"Nu, mi devas iri al Oz por ricevi mian koron," diris la Stana Lignohakisto. Do li marŝis al la Tronoĉambro kaj frapis sur la pordon.


"Envenu," vokis Oz, kaj la Hakisto envenis kaj diris, "Mi venis por mia koro."


"Bone," respondis la malgranda viro. "Sed mi devos tondi truon en via brusto, por meti vian koron en la ĝustan lokon. Mi esperas ke tio ne dolorigos vin."

"Ho, ne," respondis la Hakisto. "Mi tute ne sentos ĝin."

Do Oz elprenis tondilon de stanisto kaj tondis malgrandan, kvadratan truon en la maldekstra flanko de la brusto de la Stana Lignohakisto. Post tio, li iris al ŝranko de tirkestoj kaj elprenis belan koron, tute el silko kaj plenigitan per segeroj.

"Vere bela, ĉu ne? li demandis.





“Jes, ja!” respondis la Hakisto, al kiu ĝi multe plaĉis. “Sed ĝi estas ĉu amema koro?”

“Nepre jes!” respondis Oz. Li metis la koron en la bruston de la Hakisto kaj post tio li remetis la kvadraton el stano, lutante ĝin nete kie ĝi estis eltondita.

“Finite” diris li; “nun vi havas koron kiu fierigus ĉiun ajn homon. Mi bedaŭras ke mi devis fliki vian bruston, sed vere tio estis necesa.”

“Ne ĝenas min la fliko,” fervore diris la feliĉa Hakisto. “Mi dankegas vin, kaj mi neniam forgesos vian komplezon.”

“Ne menciinde,” respondis Oz.

Post tio la Stana Lignohakisto reiris al siaj amikoj, kiuj deziris al li ĉian ĝojon pro lia bona fortuno.

Nun la Leono marŝis al la Tronoĉambro kaj frapis sur la pordon.

“Envenu,” diris Oz.

“Mi venis por mia kuraĝo,” anoncis la Leono, enirante la ĉambron.

“Bone,” respondis la malgranda viro. “Mi portos ĝin al vi.”

Li iris al ŝranko kaj etendinte sian brakon ĝis alta breto li deprenis kvadra-





tan verdan botelon, kies enhavon li verŝis en verd-oran teleron, bele ĉizitan. Metinte tion antaŭ la Malkuraĝan Leonon, kiu flaris ĝin kvazaŭ malŝate, la Sorĉisto diris:

"Trinku."

"Kio ĝi estas?" demandis la Leono.

"Nu," respondis Oz, "se ĝi estus en vi, ĝi estus kuraĝo. Vi scias, kompreneble, ke kuraĝo ĉiam estas interna; do oni ne povas nomi ĉi tion kuraĝo antaŭ ol vi glutis ĝin. Tial mi konsilas al vi trinki ĝin kiel eble plej baldaŭ."

La Leono ne plu hezitis, sed trinkis ĝis la telero estis malplena.

"Kiel vi sentas vin nun?" demandis Oz.

"Plena de kuraĝo," respondis la Leono, kiu reiris ĝoje al siaj amikoj por informi ilin pri sia bona fortuno.

Oz, nun sola, ridetis al si pro sia sukceso doni al la Birdotimigilo kaj al la Stana Lignohakisto kaj al la Leono precize tion kion ili kredis deziri. "Kiel mi ne povas esti ĉarlatano?" li diris, "kiam tiom da personoj devigas min fari tion, kio tute ne estas farebla, kiel scias ĉiu homo? Estis facile feliĉigi la Birdotimigilon kaj la Leonon kaj la Hakiston ĉar ili imagis ke mi povas fari ĉion ajn. Sed bezonata estos pli ol imago por reporti Doroteon al Kansas, kaj mi certas ke mi ne scias kiel fari tion."



*"'Mi sentas min tre saĝa,' diris la Birdotimigilo."*


# Ĉapitro XVII.
# Kiel la balono estis lanĉita.







**Forpasis** tri tagoj dum kiuj Doroteo tute ne ricevis komunikon de Oz. Tiuj estis malfeliĉaj tagoj por la malgranda knabino, kvankam ŝiaj amikoj estis tute feliĉaj kaj kontentaj. La Birdotimigilo diris al ili ke estas bonegaj pensoj en lia kapo; sed li rifuzis diri ilin ĉar li sciis ke nur li mem povas kompreni ilin. Kiam la Stana Lignohakisto marŝadis li sentis sian koron skuiĝi en lia brusto; kaj li diris al Doroteo ke li trovas ĝin pli afabla kaj pli amema ol tiu kiun li havis kiam li konsistis el karno. La Leono deklaris ke li timas nenion sur la tero, kaj li volonte frontus armeon aŭ dekduon da ferocaj Kolizuloj.



Tiel ĉiu en la grupeto estis kontenta escepte de Doroteo, kiu sopiris eĉ pli ol iam antaŭe reiri al Kansas.

La kvan tagon, ĝojigante ŝin, Oz ordonis ke ŝi reeniru la Tronĉambron, kaj kiam ŝi eniris li diris afable al ŝi:

"Sidiĝu, karulino; mi kredas ke mi trovis metodon forveturigi vin el ĉi tiu lando."

"Al Kansas?" ŝi demandis fervore.

"Nu, mi ne certas pri Kansas," diris Oz, "ĉar mi ne povas eĉ konjekti pri ĝia direkto. Sed la unua tasko estas transiri la dezerton, kaj post tio verŝajne estos facile trovi vian vojon hejmen."

"Kiel mi povos transiri la dezerton?" ŝi demandis.

"Nu, jen mia penso," diris la malgranda viro. "Komprenu, kiam mi venis al ĉi tiu lando mi flugis en balono. Ankaŭ vi venis peraere, vin portis ciklono. Do mi kredas ke la plej bona metodo retransiri la dezerton estos peraera. Nu, mi tute ne kapablas krei ciklonon; sed mi pripensadis la eblecojn, kaj mi kredas ke mi povos fari balonon."

"Kiel?" demandis Doroteo.

"Balono," diris Oz, "estas el silko, sur kiu estas tavolo de gluo por enteni la gason. Mi havas multan silkon en ĉi tiu palaco, do tute ne estos malfacile fari la balonon. Sed en la tuta lando ne estas gaso por plenigi la balonon, por ke ĝi flugu."

"Se ĝi ne flugos," komentis Doroteo, "ĝi estos senu-

tila."

"Vere," respondis Oz. "Sed ekzistas alia rimedo por flugigi ĝin, nome plenigi ĝin per varmega aero. Varmega aero ne estas egale bona kiel gaso, ĉar se la aero malvarmiĝus la balono falus en la dezerton, kaj ni perdiĝus."

"Ni!" kriis la knabino. "Ĉu vi akompanos min?"

"Jes, certe," respondis Oz. "Min enuigas esti ĉarlatano. Se mi elirus ĉi tiun Palacon mia popolo tuj trovus ke mi ne estas Sorĉisto, kaj ili koleriĝus kontraŭ min ĉar mi trompis ilin. "Do mi devas resti fermita en ĉi tiujn ĉambrojn tuttage, kaj estas tre tede. Mi multe preferus reiri al Kansas kun vi kaj reesti en cirko."

"Mi ĝuos vian kuneston," diris Doroteo.

"Dankon," li respondis. "Nun, se vi helpos min kunkudri la silkon, ni komencu labori pri la balono."



Do Doroteo prenis kudrilon, kaj tuj kiam Oz tondis striojn de silko ĝustaforme la knabino zorge kunkudris ilin. Unue estis strio el pala verda silko, sekvis strio el malpala verda kaj post tio strio el smeralda verda; ĉar Oz decidis fari la balonon laŭ diversaj nuancoj de la koloro ĉirkaŭ ili. Tri tagoj necesis por kunkudri ĉiujn striojn, sed kiam ĝi estis finita ili havis grandan sakon el verda silko pli ol ses metrojn longa.



Post tio, Oz ŝmiris ĝian internon per tavolo de maldensa gluo, por ke ĝi rezistu aerlikadon, kaj post tio li anoncis ke la balono estas preta.

“Sed ni devos havi korbon en kiu ni veturos,” li diris. Do li ordonis ke la Soldato kun la Verdaj Lipharoj alportu grandan korbon por lavotaj vestaĵoj, kiun li fiksis al la malsupro de la balono per ŝnuregoj.

Kiam ĝi estis tute preta, Oz disanoncigis inter sia popolo ke li vizitos grandan fratan Sorĉiston kiu loĝas en la nuboj. La informo disvastiĝis rapide tra la urbo kaj ĉiu venis por rigardi la mirindaĵon.

Oz ordonis ke la balono estu portita antaŭ la Palacon, kaj la popolo rigardadis ĝin tre scivoleme. La Stana Lignohakisto estis hakinta grandan amason da ligno, kaj nun li bruligis ĝin, kaj Oz tenis la malsupron de la balono super la fajro tiel ke la varmega aero kiu leviĝis de la fajro plenigos la silkan sakon. Iom post iom la balono ŝveliĝis kaj enaeriĝis, ĝis fine la korbo preskaŭ ne plu tuŝis la teron.

Post tio, Oz eniris la korbon kaj diris al la tuta popolo per laŭta voĉo:

“Mi nun foriros por viziti. Dum mi forestos la Birdotimigilo regos vin. Mi ordonas ke vi obeu lin kiel vi obeus min.”

La balono jam tiris forte por eskapi de la ŝnurego kiu ligis ĝin al la tero, ĉar la aero en ĝi estis varmega, kaj tio faris ĝin tiom malpli peza ol la aero ekster la

balono ke ĝi tiregis klopodante alteniri en la ĉielon.

“Venu, Doroteo!” kriis la Sorĉisto. “Rapidu por ke la balono ne forflugu sen vi!”

“Mi tute ne trovas Toton ie ajn,” respondis Doroteo, kiu ne volis forlasi sian hundon. Toto estis kurinta inter la homamasonpor boji kontraŭ katideton, kaj fine Doroteo trovis lin. Ŝi prenis lin kaj kuris cele la balonon.

Ŝi estis nur kelkajn paŝojn for de ĝi, kaj Oz etendis siajn manojn por helpi ŝin eniri la korbon, kiam krak! la ŝnuregoj rompiĝis kaj la balono leviĝis en la aeron sen ŝi.

“Revenu!” ŝi kriegis. “Mi volas kuniri!”

“Mi ne povas reveni, karulino,” vokis Oz el la korbo. “Adiaŭ!”



“Adiaŭ!” kriis ĉiu, kaj ĉies okuloj turniĝis supren al kie la Sorĉisto ve–turas en la korbo, altiĝanta ĉiumomente eĉ pli en la ĉielon.

Kaj de tiam neniu revidis Ozon, la Mirindan Sorĉiston, kvankam eble li ja




atingis Omahan sekure kaj tie estas nun, sed tion ni ne scias. Sed la popolo ame memoris lin, kaj diris unu al la alia,

"Oz estis ĉiam nia amiko. Kiam li estis ĉi tie li konstruis por ni ĉi tiun belan Smeraldan Urbon, kaj nun dum lia foresto li lasis por ni la Saĝan Birdotimigilon por regi nin."

Tamen, dum multaj tagoj ili lamentis la perdiĝon de la Mirinda Sorĉisto, kaj ne estis konsoleblaj.

# Ĉapitro XVIII.
# For al la Sudo.






Doroteo ploris amare pro la perdiĝo de ŝia espero reiri al sia hejmo en Kansas; sed kiam ŝi konsideradis la aferon zorge, ŝi ĝojis ne esti suprenirinta en balono. Tamen ŝi lamentis la perdon de Oz, kaj ankaŭ lamentis ŝiaj akompanantoj.

La Stana Lignohakisto venis al ŝi kaj diris,

"Vere mi estus nedankema se mi ne lamentus la viron kiu donis al mi mian belan koron. Mi volas iom plori pro la foriro de Oz, se vi bonvolos forviŝi miajn larmojn, por ke mi ne rustu."

"Volonte," ŝi respondis, kaj ŝi tuj



alportis tukon. La Stana Lignohakisto ploris dum pluraj minutoj, kaj ŝi zorge atentis la larmojn kaj forviŝis ilin per la tuko. Kiam li ne plu ploris li forte dankis ŝin kaj oleumis sin zorge per sia juvelkovrita oleujo, por malebligi ruston.

La Birdotimigilo nun estis la reganto de la Smeralda Urbo, kaj kvankam li ne estis Sorĉisto la popolo fieris pri li. "Ĉar," ili diris, "en la tuta mondo ne ekzistas alia urbo regata de pajloplenigita viro." Kaj se ili ne eraris, ili pravis.

La matenon post la leviĝo de la balono kun Oz la kvar marŝintoj kuniĝis en la Tronoĉambro kaj diskutis. La Birdotimigilo sidis sur la granda trono kaj la aliaj staris respektoplene antaŭ li.

"Nia sorto efektive estis feliĉiga," diris la nova reganto; "ĉar ĉi tiu Palaco kaj la Smeralda Urbo nun apartenas al ni, kaj ni povas fari kion ajn ni volas. Kiam mi memoras ke antaŭ nelonge mi estis sur stango en maizkampo de kultivisto, kaj ke nun mi estas la reganto de ĉi tiu bela Urbo, mi vere kontentas pri mia sorto."

"Ankaŭ mi," diris la Stana Lignohakisto, "multe kontentas pri mia nova koro; kaj, efektive, nur tion mi volis en la tuta mondo."

"Rilate al mi, mi kontentas sciante ke mi estas egale kuraĝa kiel ĉiu alia besto dum la tuta historio, kaj eble pli kuraĝa," diris la Leono modeste.

"Se Doroteo nur kontentus loĝante en la Smeralda

Urbo," pludiris la Birdotimigilo, "eble ni ĉiuj kontentus kune."

"Sed mi ne volas loĝi ĉi tie," kriis Doroteo. "Mi volas iri al Kansas, kaj loĝi kun Onklino Em kaj Onklo Henriko."

"Nu, do, kio estas farebla?" demandis la Hakisto.

La Birdotimigilo decidis pensi, kaj li tiom forte pensis ke la pingloj kaj kudriloj komencis puŝi sin el lia kapo. Fine li diris:

"Kial ne alvoki la Flugantajn Simiojn, kaj peti ilin porti vin trans la dezerton?"

"Min tute ne trafis tiu ideo!" diris Doroteo ĝoje. "Jen la solvo! Mi tuj alportos la Oran Ĉapon."

Kiam ŝi estis alportinta ĝin en la Tronoĉambron ŝi parolis la magiajn vortojn, kaj baldaŭ la bando de Flugantaj Simioj flugis tra la malferman fenestron kaj stariĝis antaŭ ŝi.

"Nun jam la duan fojon vi alvokis nin," diris la Simireĝo, klinante sin antaŭ la knabino. "Kion vi deziras?"

"Mi deziras ke vi flugportu min al Kansas," diris Doroteo.

Sed la Simireĝo kapneis.

"Tio ne estas farebla," li diris. "Ni apartenas al nur ĉi tiu lando, kaj ne povas eliri ĝin. Neniam estis Flugantaj Simioj en Kansas, kaj mi kredas ke neniam estos, ĉar ne taŭgas ke ili estu tie. Ni volonte servos vin laŭ nia




povo se iel eble, sed ni ne povas transiri la dezerton. Adiaŭ."

Kaj denove klininte sin la Simireĝo etendis siajn flugilojn kaj forflugis tra la fenestron, sekvate de sia tuta bando.


Doroteo estis preskaŭ ploronta pro sia senesperiĝo.

"Mi malŝparis la sorĉon de la Ora Ĉapo senefike," ŝi diris, "ĉar la Flugantaj Simioj ne povas helpi min."

"Estas tute vere tre domaĝe!" diris la bonkora Hakisto.

La Birdotimigilo denove pensadis, kaj lia kapo tiom terure ŝvelis ke Doroteo timis ke ĝi krevos.

"Ni alvoku la Soldaton kun la Verdaj Lipharoj," li diris, "kaj petu ke li konsilu nin."



Do la Soldato estis alvokita kaj eniris la Tronoĉambron timeme, ĉar dum Oz vivis li neniam ricevis permeson trairi la pordon.

"Ĉi tiu knabineto," diris la Birdotimigilo al la Soldato, "volas transiri la dezerton. Kiel ŝi povos fari tion?"

"Mi ne scias," respondis la Soldato; "ĉar neniu iam transiris la dezerton, krom se eble Oz mem faris tion."

"Ĉu ekzistas neniu kiu povas helpi min?" demandis Doroteo fervore.

"Eble Glinda," li sugestis.

"Kiu estas Glinda?" demandis la Birdotimigilo.

"La Sorĉistino de la Sudo. ŝi estas la plej potenca Sorĉistino, kaj regas la Kvelulojn. Krome, ŝia kastelo staras apud la dezerto, do eble ŝi scias metodon transiri ĝin."

"Glinda estas bona Sorĉistino, ĉu ne?" demandis la infano.

"La Kveluloj opinias ke ŝi estas bona," diris la Soldato, "kaj ŝi estas afabla al ĉiu. Mi aŭdis ke Glinda estas bela virino, kiu scias resti juna eĉ kvankam ŝi jam vivis multegajn jarojn."

"Kiel mi povos atingi ŝian kastelon?" demandis Doroteo.

"La vojo al la Sudo estas rekta," li respondis, "sed oni diras ke ĝi estas plena de danĝeroj por marŝantoj. Sovaĝaj bestoj loĝas en la arbaro, kaj raso de strangaj homoj kiuj ne volas ke fremduloj trairu ilian landon. Pro tio neniu Kvelulo ĝis nun iam venis al la Smeralda Urbo."

La Soldato tiam foriris kaj la Birdotimigilo diris,

"Ŝajnas ke malgraŭ la danĝeroj, plejbone estos ke Doroteo marŝu al la Lando de la Sudo kaj petu ke Glinda helpu ŝin. Ĉar, kompreneble, se Doroteo restos ĉi tie ŝi neniam reiros al Kansas."

"Evidente vi denove pensis," komentis la Stana Lignohakisto.

"Jes ja," diris la Birdotimigilo.

"Mi akompanos Doroteon," deklaris la Leono, "ĉar mi enuas pro via urbo kaj sopiras la arbaron kaj la kamparon. Mi efektive estas sovaĝa besto, sciu. Ankaŭe, Doroteo bezonos protektanton."

"Vi pravas," akordis la Hakisto. "Mia hakilo eble povos helpi ŝin; do ankaŭ mi akompanos ŝin al la Lando de la Sudo.

"Kiam do ni ekiros?" demandis la Birdotimigilo.

"Ĉu vi kuniros?" ili demandis, surprizite.

"Certe. Sen Doroteo mi ne havus cerbon. ŝi levis min de la stango en la maizkampo kaj venigis min al la Smeralda Urbo. Do mia bona sorto ŝuldiĝas al ŝi, kaj mi neniam apartiĝos de ŝi antaŭ ol ŝi finfine reiros al Kansas."

"Dankon," diris Doroteo, kortuŝite. "Vi ĉiuj estas vere afablegaj al mi. Sed mi deziras komenci kiel eble plej baldaŭ."


"Ni ekiros morgaŭ matene," respondis la Birdotimigilo. "Do nun ni ĉiuj pretigu nin, ĉar la marŝado estos longa."






*"La Birdotimigilo sidis sur la granda trono."*

# Ĉapitro XIX.
# Ilin atakas la Batalantaj Arboj.





Tuj la sekvan matenon Doroteo adiaŭe kisis la belan verdan knabinon, kaj ĉiuj premis la manon de la Soldato kun la Verdaj Lipharoj, kiu marŝis kun ili ĝis la pordego. Kiam la Pordogardisto revidis ilin li miregis ke ili volas foriri el la bela Urbo por renkonti novnovajn problemojn. Sed li tuj malŝlosis iliajn okulvitrojn, kiujn li remetis en la verdan keston, kaj donis al ili multajn bondezirojn por kunporti kun si.



“Vi nun estas nia reganto,” li diris al la Birdotimigilo, “do nepre vi devos reveni al ni kiel eble plej baldaŭ.”

“Mi certe revenos se mi povos,” la Birdotimigilo

respondis; “sed unue mi devas helpi Doroteon reiri al sia hejmo.”

Dum Doroteo lastafoje adiaŭis la bonhumoran Gardiston ŝi diris:

“Oni tre afablis al mi en via belo Urbo, kaj ĉiu estis tre ĝentila al mi. Mi ne povas esprimi kiom dankema mi estas.”

“Ne provu, karulino,” li respondis. “Ni volonte havus vin kun ni, sed se via deziro estas reiri al Kansas mi esperas ke vi trovos rimedon.” Li malfermis la pordon de la ekstera muro kaj ili eliris kaj komencis sian marŝadon.

La suno brilegis dum niaj amikoj turnis siajn vizaĝojn cele la Landon de la Sudo. Ili estis ĉiuj plejaltspiritaj, kaj ridis kaj interbabiladis. Doroteo denove estis plengita de la espero iri al sia hejmo, kaj la Birdotimigilo kaj la Stana Lignohakisto ĝojis ĉar ili povis utili al ŝi. Kaj la Leono, nu li flaris la freŝan aeron tre plezure kaj balancis sian voston de flanko al flanko pro pura ĝojo ĉar li denove estas en la kamparo, dum Toto kuris ĉirkaŭ ilin kaj ĉasis la tineojn kaj papiliojn, tutdume gaje bojante.

“Urboloĝado tute ne konvenas por mi,” komentis la Leono, dum ili rapidpaŝe marŝadis. “Mi perdis multe da mia karno ekde kiam mi ĉesis loĝis tie, kaj nun mi fervoras trovi oportunon montri al la aliaj bestoj kiom kuraĝa mi fariĝis.”

Ili nun turnis sin kaj lastafoje rigardis la Smeraldan Urbon. Ili vidis nur amason da turoj malantaŭ la verdaj muroj, kaj alte super ĉio estis la pintoj kaj kupolo de la Palaco de Oz.

"Oz ja ne estis malbona Sorĉisto," diris la Stana Lignohakisto, dum li sentis sian koron frapadi la flankojn de lia brusto.

"Li sciis doni al mi cerbon, vere tre bonan cerbon," diris la Birdotimigilo.

"Se Oz trinkus dozon de la sama kuraĝo kiun li donis al mi," aldonis la Leono, "li estus kuraĝa persono."

Doroteo diris nenion. Oz ne plenumis sian promeson al ŝi, sed li ja klopodis, do ŝi pardonis lin. Ĉar, kiel li diris, li estas bona persono, kvankam li estas malkompetenta Sorĉisto.

La marŝado dum la unua tago trairis la verdajn kampojn kaj brilajn florojn kiuj etendiĝis ĉirkaŭ la Smeralda Urbo ĉiuflanke. Ili dormis tiun nokton sur la herbaro, kun nur la steloj super si; kaj ili tre bone ripozis.

En la mateno ili plue marŝadis ĝis ili atingis densan arbaron. Tute ne estis eble ĉirkaŭiri ĝin, ĉar laŭaspekte ĝi etendiĝis dekstren kaj maldekstren ĝis preter ilia vidpovo; kaj, krome, ili ne volis riski ŝanĝi sian direkton ĉar ili timis ke ili perdiĝus. Do ili serĉis tiun lokon kie estos plej facile eniri la arbaron.

La Birdotimigilo, kiu estis la unua en la vico, fine

trovis grandan arbon kiu havis sufiĉe larĝetendajn branĉojn ke estis sufiĉa spaco por ke ili povu marŝi sube. Do li antaŭenmarŝis al la arbo, sed tuj kiam li subiris la unuajn branĉojn ili klinis sin kaj ĉirkaŭvolvis lin, kaj la sekvan minuton li trovis sin levita super la tero kaj ĵetita kapantaŭen inter siajn kunmarŝantojn.

Tio ne damaĝis la Birdotimigilon, sed ĝi surprizis lin, kaj li aspektis iom konfuzita kiam Doroteo levis lin.

"Jen alia spaco inter la arboj," vokis la Leono.

"Mi la unua provu ĝin," diris la Birdotimigilo, "ĉar ne dolorigas min esti disdirekten ĵetita." Li marŝis al alia arbo, dum li parolis, sed ĝiaj branĉoj tuj kaptis lin kaj reĵetis



"Estas tre strange," kriis Doroteo; "kion ni faru?"

"Ŝajnas ke la arboj decidis batali kontraŭ nin kaj haltigi nian marŝadon," komentis la Leono.

"Mi intencas mem provi," diris la Hakisto, kaj surŝultriginte sian hakilon li marŝis al la unua arbo kiu tiom mistraktis la Birdotimigilon. Kiam granda branĉo kliniĝis por kapti lin

la Hakisto hakis ĝin tiom feroce ke li duonigis ĝin. Tuj la arbo komencis skuadi siajn branĉojn kvazaŭ pro doloro, kaj la Stana Lignohakisto submarŝis sendanĝere.

"Venu!" li kriis al la aliaj. "Rapide!"

Ĉiuj antaŭen kuris kaj subiris la arbon sen damaĝo, escepte de Toto, kiun kaptis malgranda branĉo kaj skuis ĝis li hurlis. Sed la Hakisto tuj dehakis la branĉon kaj liberigis la hundeton.

La aliaj arboj de la arbaro tute nenion faris por bari ilin, do ili decidis ke nur la unua vico de arboj kapablas fleksi siajn branĉojn, kaj ke verŝajne tiuj arboj estas la policistoj de la arbaro, kaj havas tiun mirigan kapablon por forteni fremdulojn.

La kvar marŝantoj facile marŝis inter la arboj ĝis atingi la plej foran randon de la arbaro. Tie, surprizate, ili trovis antaŭ si altan muron el, ŝajne, blanka porcelano. Ĝi estis glata, kiel la surfaco de telero, kaj pli alta ol iliaj kapoj.

"Kion ni faru nun?" demandis Doroteo.

"Mi faros eskalon," diris la Stana Lignohakisto, "ĉar evidente ni devos transgrimpi la muron."



*"La branĉoj klinis sin kaj ĉirkaŭvolvis lin."*

# Ĉapitro XX.
# La delikata Porcelana Lando.







Dum la Hakisto faris eskalon el ligno kiun li trovis en la arbaro, Doroteo kuŝiĝis kaj dormis, ĉar ŝi estis laca pro la longa marŝado. La Leono ankaŭ kunrulis sin por dormi kaj Toto kuŝiĝis apud li.

La Birdotimigilo rigardis la Hakiston labori, kaj diris al li:

“Mi ne povas kompreni kial tiu muro estas ĉi tie, nek el kio ĝi konsistas.”

“Ripozigu vian cerbon kaj ne ĝenu ĝin pri la muro,” respondis la Hakisto; “grimpinte ĝin ni scios kio estas





aliflanke."

Post iom da tempo la eskalo estis finita. Ĝi aspektis mallerte farita, sed la Stana Lignohakisto estis certa ke ĝi estas fortika kaj bone taŭgos. La Birdotimigilo vekis Doroteon kaj la Leonon kaj Toton, kaj diris al ili ke la eskalo estas preta. La Birdotimigilo la unua grimpis la eskalon, sed li estis tiom mallerta ke Doroteo devis tuj sekvi lin por neebligi ke li falos. Kiam li metis sian kapon trans la supron de la muro la Birdotimigilo diris,

"Nekredeble!"

"Plu grimpu," kriis Doroteo.

Do la Birdotimigilo grimpis pli kaj sidiĝis sur la supron de la muro, kaj Doroteo puŝis sian kapon trans la muron kaj kriis,

"Nekredeble!" tute same kiel 1a Birdotimigilo.

Toto sekvis, kaj tuj komencis boji, sed Doroteo silentigis lin.

Post li la Leono grimpis la eskalon, kaj la Stana Lignohakisto estis la lasta; sed ambaŭ kriis, "Nekredeble!" tuj kiam ili rigardis trans la muron. Kiam ili ĉiuj sidis en vico sur la supro de la muro ili malsuprenrigardis kaj vidis ion tre strangan.

Antaŭ ili estis grande etendiĝanta lando kies planko estis glata kaj brilanta kaj blanka kiel la malsupro de granda telero. Dise staris multaj domoj tute el porcelano kaj brilkoloraj. Tiuj domoj estis tre malgrandaj, la plej granda atingis nur la altecon de la talio de Doroteo.

Ankaŭ vidiĝis belaj malgrandaj brutodomoj, kiujn ĉirkaŭis porcelanaj bariloj; kaj multaj bovinoj kaj ŝafoj kaj ĉevaloj kaj porkoj kaj gekokoj, ĉiuj konsistantaj el porcelano, staris en grupoj.

Sed plej strangaj estis la homoj loĝantaj en tiu kurioza lando. Troviĝis melkistinoj kaj ŝafistinoj, kun brilkoloraj korsaĵoj kaj oraj cirkletoj tute kovrantaj la robojn; kaj princinoj kun plej belaj roboj el arĝento kaj oro kaj purpuro; kaj ŝafistoj vestitaj per ĝisgenuaj kulotoj kiujn ornamis vertikalaj ruĝetaj kaj flavaj kaj bluaj strioj, kaj oraj bukoj sur la ŝuoj; kaj princoj kun juvelkovritaj kronoj sur la kapoj, kaj ili surportis ermenajn robojn kaj satenajn manteletojn; kaj komikaj klaŭnoj kun krisphavaj roboj, kaj rondaj ruĝaj makuloj sur la vangoj kaj altaj, pintaj ĉapoj. Kaj plej strange, la homoj ĉiuj konsistis el porcelano, eĉ iliaj vestoj, kaj ili estis tiel malgrandaj ke la plej alta elili ne estis pli alta ol genuo de Doroteo.

Unue neniu eĉ rigardis la alvenintojn, escepte de unu malgranda purpura porcelana hundo kun tre granda kapo, kiu iris al la muro kaj bojis je ili per voĉeto, kaj tuj poste forkuris.

"Kiel ni malsupreniros?" demandis Doroteo.

Ili trovis la eskalon tro peza tiel ke ili ne povis suprentiri ĝin, do la Birdotimigilo faligis sin de la muro kaj la aliaj saltis sur lin por ke la malmola planko ne damaĝu iliajn piedojn. Kompreneble ili zorgis ne fali sur lian kapon por ke la pingloj ne penetru iliajn piedojn.

Kiam ĉiu jam malsupreniĝis sekure ili levis la Birdotimigilon, kies korpo nun estis tre plata, kaj per frapetoj reĝustigis lian pajlon.

"Ni devos transiri ĉi tiun strangan lokon por atingi la alian flankon," diris Doroteo; "ĉar estus malsaĝe iri alidirekte ol rekte Suden."

Ili komencis marŝi tra la lando de la porcelana popolo, kaj jam tuj ili proksimiĝis al porcelana melkistino melkanta porcelanan bovinon. Dum ili proksimiĝis, la bovino subite piedfrapis kaj renversis la tabureton, la sitelon, kaj eĉ la melkistinon mem, kiuj ĉiuj falis sur la porcelanan teron tre brue.

Doroteon ŝokis vidi ke kruro de la bovino estis derompita, kaj ke la sitelo kuŝis multe dispecigita, kaj la maldekstra kubuto de la kompatinda melkistino estis noĉita.

"Jen!" kriis la melkistino kolere. "Vidu kion vi faris! La kruro de mia bovino estas rompita, kaj mi devos konduki ŝin al la riparisto por surgluigi ĝin. Pro kio vi venis ĉi tien kaj timigis mian bovinon?"

"Mi multe bedaŭras," respondis Doroteo, "bonvolu pardoni nin."

Sed la bela melkistineto estis multe tro ĉagrenita por respondi. ŝi prenis la kruron paŭte kaj forkondukis sian bovinon, la kompatinda besto lamis sur siaj tri kruroj. Foririante la melkistino riproĉege transrigardis sian ŝultron al la mallertaj fremduloj, premante sian noĉitan

kubuton al sia flanko.

Doroteo multe malĝojis pro tiu akcidento.



“Ni devos esti zorgoplenaj,” diris la bonkora Hakisto, “por ke ni ne damaĝu tiom ĉi tiujn belajn hometojn ke ili neniam reĝustiĝos.”

Iom poste Doroteo renkontis vere belege vestitan junan princinon, kiu ekhaltis tuj kiam ŝi vidis la fremdulojn kaj komencis forkuri.

Doroteo volis pli detale vidi la princinon, do ŝi kure sekvis ŝin; sed la porcelana knabino kriis,

“Ne ĉasu min! Ne ĉasu min!”

Ŝia voĉeto estis tiom timoplena ke Doroteo ekhaltis kaj diris,

“Sed kial?”


“Ĉar,” respondis la princino, ankaŭ haltinte, el sendanĝera malproksimo, “se mi kuros mi eble falos kaj rompiĝos.”

“Sed ĉu ne eblus ripari vin?” diris la knabino.

“Ho, jes; sed oni neniam estas egale bela post ripariĝo, komprenu,” respondis la princino.

“Verŝajne ne,” diris Doroteo.

“Pripensu S-ron Ŝerciston, unu el niaj klaŭnoj,” pludiris la porcelanulino. “Li ĉiam



klopodas stari surkape. Li tiom ofte rompis sin ke cent partoj de li estas riparitaj, kaj li tute ne plu estas bela. Jen, li venas jam nun, vidu mem."

Efektive, gaja malgranda klaŭno nun venis marŝante direkte al ili, kaj Doroteo povis vidi ke malgraŭ liaj belaj vestoj el ruĝo kaj flavo kaj verdo lin tute kovris fendetoj ĉiudirekten irantaj kiuj klare montris ke li estis multparte riparita.

La Klaŭno metis siajn manojn en siajn poŝojn, kaj ŝveliginte siajn vangojn kaj kapoklinetinte al ili senrespekte li diris:

"Mia kara dam',
Pro kio jam
Okulo tre rigida?
Kvazaŭ estas vi
Nenio pli
Ol fajrŝovil' ridiga!"

"Silentu, sinjoro!" diris la Princino; "jen fremduloj respektendaj!"

"Mi venis ek', do jen respekt'" deklaris la Klaŭno, kaj tuj li surkapen stariĝis.

"Ne ĝenu vin S-ro Ŝercisto," diris la Princino al Doroteo; "lia kapo estas multe fendita, kaj tio malsaĝigas lin."

"Li tute ne ĝenas min," diris Doroteo. "Sed vi estas belega," ŝi pludiris, "certe mi amegus vin. Ĉu vi permesos ke mi reportu vin al Kansas, kaj metu vin sur la



kamenbreton de Onklino Em? Mi povus porti vin en mia korbo."

"Tio tre malfeliĉigus min," respondis la porcelana Princino. "Sciu ke ĉi tie en nia lando ni loĝas kontente, kaj ni povas paroli kaj ĉirkaŭmoviĝi laŭplaĉe. Sed kiam iu el ni estas forprenita niaj artikoj tuj rigidiĝas, kaj ni nur staras rekte kaj belaspektas. Kompreneble oni ne volas ion alian kiam ni estas sur kamenbretoj kaj

ŝrankoj kaj salontabloj, sed niaj vivoj estas multe pli agrablaj ĉi tie en nia propra lando."

"Mi neniel volus malfeliĉigi vin!" krietis Doroteo. "Do mi nur diros adiaŭ."

"Adiaŭ" respondis la princino.

Ili zorgoplene marŝis tra la porcelana lando. La bestetoj kaj homoj forkuris por eviti ilin, timante ke la fremduloj rompos ilin, kaj post proksimume horo la marŝantoj atingis la alian flankon de la lando kaj la porcelanan muron.

Ĝi estis malpli alta ol la unua, tamen, kaj starante sur la dorso de la Leono ili ĉiuj sukcesis grimpadi al la supro. Post tio la Leono kuntiris siajn krurojn kaj saltis sur la muron; sed ĝuste kiam li saltis li renversis porcelanan preĝejon per sia vosto kaj plene disfrakasis ĝin.

"Domaĝe," diris Doroteo, "sed mi vere kredas ke nur tre bonŝance ni ne pli damaĝis tiujn hometojn ol per rompo de kruro de bovino kaj de preĝejo. Ili estas tiom rompeblaj!"

"Tiel ja estas," diris la Birdotimigilo, "kaj mi dankemas ĉar mi konsistas el pajlo kaj ne estas facile rompata. Oni povas sperti multon pli malbonan en la mondo ol esti Birdotimigilo."



*"La homoj ĉiuj konsistis el porcelano."*

# Ĉapitro 21
# La Leono fariĝas la Reĝo de la Bestoj.





# Atinĝinte

la malsupron de la porcelana muro, la marŝantoj trovis sin en malagrabla lando, plena de marĉoj kaj kovrita de alta fiherbaro. Estis malfacile marŝi longe sen fali en kotoplenajn truojn, ĉar la herbaro estis densega kaj kaŝis ilin. Tamen, zorgante pri sia marŝado ili sukcesis sekure atingi solidan teron. Sed ĉi tie la lando ŝajnis eĉ pli sovaĝa, kaj post longa enuiga marŝado tra la herbaĵaro ili eniris alian arbaron, kie la arboj estis pli grandaj kaj pli malnovaj ol ĉiuj kiujn ili ĝis

tiam vidis.

“Jen arbaro vere belega,” deklaris la Leono, ĉirkaŭrigardante ĝojoplene; “neniam mi vidis pli belan lokon.”

“Iom deprima,” diris la Birdotimigilo.

“Tute ne,” respondis la Leono; mi volonte loĝus ĉi tie dum la tuta vivo. Rimarku la molecon de la sekaj folioj sub la piedoj kaj la riĉecon kaj verdecon de la musko kroĉiĝinta al la malnovaj arboj. Certe neniu sovaĝa besto povus deziri pli plaĉan hejmon.”

“Eble nun estas sovaĝaj bestoj en la arbaro,” diris Doroteo.

“Verŝajne jes,” respondis la Leono; “kvankam mi neniun vidas ĉirkaŭmarŝanta.”

Ili marŝis tra la arbaro ĝis fariĝis tro mallume por plia marŝado. Doroteo kaj Toto kaj la Leono kuŝiĝis por dormi, dum la Hakisto kaj la Birdotimigilo gardis ilin, kiel kutime.

Post la mateniĝo ili rekomencis marŝi. Antaŭ ol ili marŝis grandan distancon ili aŭdis mallaŭtan sonon, kiel de la muĝetado de multaj sovaĝaj bestoj. Toto ploretis iom sed neniu el la aliaj timis kaj ili plu laŭiris la multe uzitan vojeton ĝis ili atingis malferman lokon en la arbaro, en kiu estis kunen venintaj vidis centoj da ĉiuspecaj bestoj. Estis tigroj kaj elefantoj kaj ursoj kaj vulpoj kaj lupoj kaj ĉiu alia ebla besto, kaj dummomente Doroteo timis. Sed la Leono klarigis ke la bestoj diskutas, kaj laŭ ilia kriado kaj muĝado li supozas ke ili sentas

gravan minacon.

Dum li parolis pluraj bestoj ekrimarkis lin, kaj tuj la tuta bestaro eksilentis kvazaŭ pro magio. La plej granda tigro venis al la Leono kaj klinis sin, dirante,

"Bonvenon, Reĝo de Bestoj! Vi venis bontempe por batali kontraŭ nian malamikon kaj revenigi pacon al ĉiuj bestoj de la arbaro."

"Kio ĝenas vin?" demandis la Leono trankvile.



"Nin ĉiujn minacas," respondis la tigro, "feroca malamiko kiu lastatempe venis en ĉi tiun arbaron. Ĝi estas giganta monstro, kvazaŭ granda araneo, kun korpo tiel granda kiel de elefanto kaj kruroj longaj kiel de arbotrunko. Ĝi havas ok tiajn longajn krurojn, kaj dum la

monstro rampas tra la arbaro li kaptas beston per kruro kaj tiras ĝin al sia buŝo, kie li manĝas ĝin samkiel araneo manĝas muŝon. Neniu el ni estas sekura dum tiu feroca besto vivas, kaj ni okazigis kunvenon por decidi kiel prizorgi nin kiam vi venis inter nin."

La Leono pensis dummomente.

"Ĉu loĝas aliaj leonoj en ĉi tiu arbaro?" li demandis.

"Ne; ja ekzistis kelkaj, sed la monstro manĝis ilin ĉiujn. Kaj, krome, estis neniu inter ili eĉ iomete tiom granda kaj brava kiel vi."

"Se mi senvivigos vian malamikon ĉu vi klinos vin antaŭ mi kaj obeos min kiel la Reĝon de la Arbaro?" demandis la Leono.

"Volonte ni faros tion," respondis la tigro, kaj ĉiuj aliaj bestoj tie muĝegis per forta voĉo: "Nepre jes!"

"Kie estas tiu granda araneo via nun?" demandis la Leono.

"Tie for, inter la kverkarboj," diris la tigro, indikante per sia antaŭpiedo.

"Bone prizorgu ĉi tiujn amikojn miajn," diris la Leono, "kaj mi tuj iros kontraŭbatali la monstron."

Li diris "Ĝis revido" al siaj kamaradoj kaj kaj formarŝis fiere por kontraŭbatali la malamikon.

La granda araneo dormis kiam la Leono trovis ĝin, kaj ĝi aspektis tiom malbela ke ĝia malamiko suprenturnis sian nazon naŭzite. Ĝiaj kruroj ja estis longegaj kiel


diris la tigro, kaj ĝia korpo kovrita de densa nigra hararo. Ĝi havis grandan buŝon, kun aro da akraj dentoj duonan metron longaj; sed ĝian kapon ligis al la dika korpo kolo maldika kiel la talio de vespo. Tio indikis al la Leono la plej bonan manieron ataki la beston, kaj ĉar li sciis ke estas pli facile ataki ĝin kiam ĝi dormas ol dum ĝi estas veka, li saltegis kaj rekte trafis la dorson de la monstro. Per unu batego de sia peza piedo, armita per akraj ungoj, li batis la aranekapon de ĝia korpo. Desaltinte, li rigardis ĝis la longaj kruroj ĉesis moviĝadi, kaj li sciis ke nun ĝi estas tute morta.


La Leono reiris al la malfermaĵo kie la bestoj de la arbaro atendas lin kaj diris fiere,

"Vi ne plu bezonas timi vian malamikon."


Ĉiuj bestoj klinis sin antaŭ la Leono, nomante lin Reĝo, kaj li promesis reveni kaj regi ilin tuj kiam Doroteo estos definitive veturanta al Kansas.

# ĈAPITRO XXII.
# La Lando de la Kveluloj





Tra la ceteron de la arbaro pasis la marŝantoj sekure, kaj kiam ili venis el ĝia mallumo ili vidis antaŭ si krutan monteton, kovritan, de la supro ĝis la malsupro, de grandaj pecoj de rokoj.



"Estos malfacile grimpi," diris la Birdotimigilo, "tamen necesas transiri la monteton."

Do li kondukis kaj la aliaj sekvis. Ili estis preskaŭ atingintaj la unuan rokon kiam ili aŭdis raŭkan voĉon krii,

"Fortenu vin!"

"Kiu vi estas?" demandis la Birdotimigilo. Kapo

montris sin super la roko kaj la sama voĉo diris,

"Ĉi tiu monteto apartenas al ni, kaj ni ne permesas ke oni transiru ĝin."

"Sed ni devas transiri," diris la Birdotimigilo. "Ni iras al la Lando de la Kveluloj."

"Tamen ne!" respondis la voĉo, kaj venis el malantaŭ la roko la plej stranga homo kiun iam vidis la marŝantoj.

Li estis tre malalta kaj dika kaj havis grandan kapon, kiu estis supre plata kaj ĝin subtenis dika kolo plena de faldomarkoj. Sed li tute ne havis brakojn, kaj, vidante tion, la Birdotimigilo ne kredis ke tia senhelpa ulo povus malebligi ke ili grimpu la monteton. Do li diris,

"Mi bedaŭras ne plenumi vian volon, sed ni devas transiri vian monteton negrave ĉu aŭ ne tio plaĉas al vi," kaj li aŭdace antaŭenmarŝis.

Rapide kiel fulmo la kapo de la viro pafiĝis antaŭen kaj lia kolo etendiĝis ĝis la supro de la kapo, kie ĝi estis plata, batis la mezon de la Birdotimigilo kaj rulfaligis lin kap-super-kapen laŭ la deklivo. Preskaŭ same rapide kiel ĝi venis, la kapo reiris al la korpo, kaj la viro raŭke ridis dirante,

"Malpli facile ol vi supozas!"

Ĥoro de laŭta ridado sonis de la aliaj rokoj, kaj Doroteo vidis centojn da senbrakaj Martelkapuloj sur la monteto, ĉiu malantaŭ roko.

La Leono forte koleriĝis pro la ridado kaŭzita de la misfortuno de la Birdotimigilo, kaj laŭte muĝante li tondre suprenkuris la monteton.

Denove kapo rapide elpafiĝis, kaj la granda Leono ruliĝis malsupren laŭ la deklivo kvazaŭ trafita de kanonobuso.

Doroteo malsupren kuris por helpi la Birdotimigilon surpiediĝi, kaj la Leono iris al ŝi, iom kontuzita kaj dolorigita, kaj diris,

"Estas senutile batali kontraŭ homojn kun pafiĝantaj kapoj; neniu povas venki ilin."

"Kion do ni povas fari?"

"Alvoku la Flugantajn Simiojn," proponis la Stana Lignohakisto; "vi ankoraŭ rajtas ordoni al ili unu fojon pli."

"Bone," ŝi respondis, kaj surmetinte la Oran Ĉapon ŝi parolis la magiajn vortojn. La Simioj, kiel kutime, tujis, kaj post malmultaj momentoj la tuta bando staris antaŭ ŝi.

"Kion vi ordonas?" demandis la Reĝo de la Simioj, malalten klinante sin.

"Portu nin trans la monteton al la Lando de la Kveluloj," respondis la knabino.

"Tiel estos," diris la Reĝo, kaj tuj la Flugantaj Simioj prenis la kvar marŝintojn kaj Toton per siaj brakoj kaj fluge forportis ilin. Dum ili transflugis la monteton la Martelkapuloj kriegis ĉagrenite, kaj pafis

siajn kapojn altenaeren, sed ili ne povis trafi la Flugantajn Simiojn, kiuj portis Doroteon kaj ŝiajn kamaradojn sekure trans la monteton kaj surterigis ilin en la bela Lando de la Kveluloj.

"Nun la lastan fojon vi povis alvoki nin," diris la estro al Doroteo; "do adiaŭ kaj bonfortunon al vi."

"Adiaŭ, kaj tre grandan dankon," respondis la knabino; kaj la Simioj alteniris en la aero kaj post malpli ol momento ili estis jam for de vidpovo.

La Lando de la Kveluloj aspektis riĉa kaj feliĉa. Estis nenombreblaj kampoj de maturiĝanta greno, kaj inter ili estis bone pavimitaj vojoj, kaj belaj ondetantaj rivеretoj kiujn transiris fortikaj pontoj. La bariloj kaj domoj kaj pontoj estis ĉiuj brile ruĝaj, same kiel en la Lando de la Palpbrumoj ili estis flavaj, kaj bluaj en la Lando de la Manĝtuloj. La Kveluloj mem, malaltaj kaj dikaj, kompaktaj kaj afablaj estis plene vestitaj per ruĝo, kiu brilis kontraŭ la fono de verda herbaro kaj flaviĝanta greno.

La Simioj surterigis ilin proksime al kampodomo, kaj la kvar marŝantoj iris al ĝi kaj frapis sur la pordon. Ĝin malfermis la edzino de la kultivisto, kaj kiam Doroteo petis manĝaĵon la virino bone manĝigis ilin ĉiujn, donante tri specojn de kukoj kaj kvar specojn de dolĉaj biskvitoj, kaj teleron da lakto al Toto.

"Kiom distanca estas la Kastelo de Glinda," demandis la infano.

"Ne tre distanca," respondis la edzino de la kultivisto. "Laŭiru la vojon Suden kaj vi baldaŭ atingos ĝin."


Dankinte la afablan virinon, ili rekomencis marŝi laŭ la kampoj kaj trans la belajn pontojn ĝis ili vidis antaŭ si tre belan Kastelon. Antaŭ la pordegoj estis tri junaj knabinoj, vestitaj per belaj ruĝaj uniformoj ornamitaj per ora pasamento; kaj kiam Doroteo proksimiĝis unu el ili diris al ŝi,

"Kial vi venis al la Suda Lando?"

"Por konsulti la Bonan Sorĉistinon loĝantan ĉi tie," ŝi respondis. "Ĉu vi bonvolos konduki min al ŝi?"


"Diru al mi vian nomon kaj mi demandos al Glinda ĉu ŝi akceptos vin." Ili diris siajn nomojn, kaj la soldatino eniris la Kastelon. Post kelkaj momentoj ŝi revenis por diri ke Doroteo kaj la aliaj tuj eniru.





*“La Kapo pafiĝus antaŭen kaj batis la Birdotimigilon.”*

# Ĉapitro XXIII.
# La Bona Sorĉistino plenumas la deziron de Doroteo.





# Bonvole

antaŭ ol vidi Glindan, tamen, ili estis kondukitaj al ĉambro en la Kastelo, kie Doroteo lavis sian vizaĝon kaj kombis sian hararon, kaj la Leono elskuis la polvon el sia kolhararo, kaj la Birdotimigilo perfrape plej belaranĝis sin, kaj la Hakisto poluris sian stanon kaj oleumis siajn artikojn.

Kiam ili ĉiuj estis bonaspektaj ili sekvis la soldatinon al granda ĉambro kie la Sorĉistino Glinda sidis sur rubena trono.

Ŝi aspektis al ili kaj bela kaj juna. ŝia hararo estis riĉe ruĝkolora kaj pendis bukle sur ŝiajn ŝultrojn. ŝia robo estis purablanka sed ŝiaj okuloj estis bluaj, kaj ili afable rigardis la malgrandan knabinon.

"Kion mi povas fari por vi, mia infano?" Ŝi demandis.

Doroteo rakontis al la Sorĉistino pri si: pri kiel la ciklono portis ŝin al la Lando Oz, kiel ŝi trovis siajn akompanantojn, kaj pri la mirindaj aventuroj kiujn ili spertis.

"Mi plej deziras nun," ŝi pludiris, "reiri al Kansas, ĉar Onklino Em nepre kredas ke katastrofo detruis min, kaj tial ŝi surmetos funebrajn vestojn; kaj krom se la rikolto estos pli bona ĉijare ol pasintajare, mi certas ke Onklo Henriko ne havas sufiĉan monon por tio."

Glinda antaŭenklinis sin kaj kisis la dolĉan, suprenlevitan vizaĝon de la amema malgranda knabino.

"Benita estu via kara koro," ŝi diris, "certe mi povos diri al vi kiel reiri al Kansas." Post tio ŝi diris,

"Sed se mi faros tion, vi devos doni al mi la Oran Ĉapon."

"Volonte!" krietis Doroteo; "ĝi ja ne plu utilas al mi, kaj havante ĝin vi rajtos trifoje ordoni al la Flugantaj Simioj."

"Kaj mi kredas ke mi bezonos ilian servon precize trifoje," respondis Glinda ridetante.

Doroteo tiam donis al ŝi la Oran Ĉapon, kaj la Sorĉistino diris al la Birdotimigilo,

"Kion vi faros post la foriro de Doroteo?"

"Mi reiros al la Smeralda Urbo," li respondis, "ĉar Oz reĝigis min kaj la popolo amas min. Nur mi dubas ĉu mi sukcesos transiri la monteton de la Martelkapuloj."

"Per la Ora Ĉapo mi ordonos ke la Flugantaj Simiojportu vin al la pordo de la Smeralda Urbo," diris Glinda, "ĉar estus domaĝe forpreni de la popolo tiom mirindan reganton."

"Ĉu mi vere estas mirinda" demandis la Birdotimigilo.

"Vi estas nekutima," respondis Glinda.

Turninte sin al la Stana Lignohakisto ŝi demandis:

"Kion okazos al vi post la foriro de Doroteo?"

Li apogis sin per sia hakilo kaj pensis dum momento. Post tio li diris,

"La Palpbrumoj estis tre afablaj kaj petis ke mi regu ilin post la morto de la Fia Sorĉistino. Mi amas la Palpbrumojn, kaj se mi povus reiri al ilia lando, mi plej volonte regus ilin por ĉiam."

"Mia dua ordono al la Flugantaj Simioj," diris Glinda, "estos ke ili portu vin sekure al la Lando de la Palpbrumoj. Eble via cerbo ne aspektas tiel granda kiel tiu de la Birdotimigilo, sed certe vi brilas pli ol li—kiam oni bone poluris vin—kaj mi certas ke vi regos la Palpbrumojn saĝe kaj bone."

Post tio la Sorĉistino rigardis la grandan, vilan Leonon kaj demandis,

"Post la reiro de Doroteo al sia propra hejmo kion vi faros?"

"Aliflanke de la monteto de la Martelkapuloj," li respondis, "estas granda arbaro, kaj ĉiuj bestoj loĝantaj en ĝi reĝigis min. Se mi nur povus reiri al tiu arbaro mi tre feliĉe vivus mian vivon tie."

"Mia tria ordono al la Flugantaj Simioj," diris Glinda, "estos ke ili portu vin al via arbaro. Poste, ĉar mi eluzis ĉiujn povojn de la Ora Ĉapo, mi donos ĝin al la Reĝo de la Simioj, por ke li kaj lia bando eterne estu liberaj."

La Birdotimigilo kaj la Stana Lignohakisto kaj la Leono nun dankis la Bonan Sorĉistinon pro ŝia komplezo, kaj Doroteo krietis,



"Certe vi estas egale bona kiel bela! Sed vi ankoraŭ ne informis min kiel reiri al Kansas."

"Viaj Arĝentaj ŝuoj portos vin trans la dezerton," respondis Glinda. "Konante ilian potencon vi povus jam la unuan tagon kiam vi venis al ĉi tiu lando reiri al via Onklino Em."

"Sed tiuokaze mi ne havus mian mirindan cerbon!" kriis la Birdotimigilo. Kaj eble mia tuta vivo forpasus en la maizkampo de la kultivisto."

"Kaj mi ne havus mian belan koron," diris la Stana Lignohakisto. "Mi eble starus rustiĝante en la arbaro ĝis la fino de la mondo."

"Kaj mi por ĉiam estus malkuraĝa," deklaris la Leono, "kaj neniu besto en la tuta arbaro bonkore parolus al mi."

"Ĉio ĉi estas vera," diris Doroteo, "kaj plezurigas min ke mi povis utili al ĉi tiuj bonaj amikoj. Sed nun ĉiu el ili havas kion li plej deziris, kaj ĉiu el ili estas feliĉa havante regnon en kiu li povos regi, mi kredas ke mi deziras reiri al Kansas."

"La Arĝentaj ŝuoj," diris la Bona Sorĉistino, "havas mirindajn kapablojn. Kaj unu el iliaj plej kuriozaj aspektoj estas ke ili povas porti vin al iu ajn loko en la mondo per tri paŝoj, kaj ĉiu paŝo estos farita dum palpebrumeto. Vi nur devas kunfrapi la kalkanumojn trifoje kaj ordoni ke la ŝuoj portu vin kien vi deziras iri."

"Se estas tiel," diris la infano ĝojoplene, "mi tuj

petos ke ili portu min al Kansas!"

Ŝi ĉirkaŭbrakumis la kolon de la Leono kaj kisis lin, ame frapetante lian kapon. Post tio ŝi kisis la Stanan Lignohakiston, kiu ploradis kaj per tio multe endanĝerigis siajn artikojn. Sed ŝi ĉirkaŭpremis al si la molan, pajlopenan korpon de la Birdotimigilo anstataŭ kisi lian pentritan vizaĝon, kaj trovis sin mem ploranta pro ĉi tiu bedaŭroplena foriro for de siaj amantaj kamaradoj.

Glinda la Bona malsuprenpaŝis de sia rubia trono por adiaŭkisi la malgrandan knabinon, kaj Doroteo dankis ŝin pro la komplezoj faritaj al ŝiaj amikoj kaj ŝi mem.


Nun Doroteo prenis Toton sobre en siajn brakojn, kaj lastafoje dirinte adiaŭ, ŝi kunfrapis trifoje la kalkanumojn de siaj ŝuoj, dirante,

"Portu min hejmen al Onklino Em!"

* * * * *

Tuj ŝi flugadis tra la aero, tiom rapide ke ŝi povis vidi kaj senti nur la venton pasantan ŝiajn orelojn.

La Arĝentaj ŝuoj nur trifoje paŝis, kaj post tio ŝi haltis tiom subite ke ŝi ruliĝis plurfoje sur la herbaro antaŭ ol scii kie ŝi estas.



Fine ŝi sidiĝis kaj ĉirkaŭrigardis.

"Nekredeble!" ŝi kriis.

Ĉar ŝi sidas sur la larĝa ebenaĵo de Kansas, kaj tuj antaŭ ŝi estis la nova kampara domo kiun konstruis Onklo Henriko post la forportiĝo de la malnova de la ciklono. Onklo Henriko melkadis la bovinojn en la bonvinkampo, kaj Toto saltis de ŝiaj brakoj kaj kuris al la brutejo ĝoje bojante.

Doroteo stariĝis kaj trovis sin staranta en nur siaj ŝtrumpoj. Ĉar la Arĝentaj ŝuoj forfalis de ŝi dum la flugo tra la aero, kaj perdiĝis por ĉiam en la dezerto.



*"Vi devos doni al mi la Oran Ĉapon."*

# Ĉapitro XXIV.
# Denove hejme.



AKVUMONTE LA BRASIKOJN, Onklino Em estis ĵus veninta el la domo. Ŝi suprenrigardis kaj vidis Doroteon kuranta al ŝi.

"Mia amata infano!" ŝi kriis, prenegante la malgrandan knabinon en siajn brakojn kaj kovrante ŝian vizaĝon per kisoj. "El kie vi venis?"

"El la Lando Oz," diris Doroteo, sobre. "Kaj ankaŭ revenis Toto. Kaj ho, Onklino Em, mi ĝojegas reesti hejme!"

